
# Heleco

Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio

Numero 83 Septembro - 2008

# HISPANIO - 1808



Heleco

Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio

Numero 83 Septembro - 2008

**Astura Esperanto-Asocio**

Sidejo: strato **Tomás y Valiente**, 1 -2ª etaĝo
33201-GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: http://uica.info/esperanto

Retadresoj: easturias@telecable.es
mailto:esperanto@uica.info

**Astura Esperanto-Asocio** estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.
Nia agado disvolviĝas kadre de: **Cátedra JOVELLANOS de Extensión**

| Enhavo | Paĝo |
|---|---|
| **ASTURA ESPERANTO-ASOCIO.- Nia dumjara laborado** | **3-5** |
| **Je via sano, samideanoj!** | **6** |
| **Eŭropo Demokratio Esperanto** | **7-8** |
| **Firmaa translokiĝo kaj dungiteco: ludo per falsitaj kartoj** | **9-10** |
| **Hispanio 1808** | **11** |
| **Dekadenca kortego de imperio en dekadenco** | **12-13** |
| **Trafalgaro** | **14-15** |
| **La rabisto de Eŭropo** | **16-17** |
| **Insurekcio de Aranĥuezo** | **18-19** |
| **La 2a de majo en Madrido** | **20-22** |
| **Asturio kontraŭ Napoleono** | **23** |
| **Novtipaj politikaj institucioj: la Konsilioj** | **24** |
| **La reĝo Josefo. La Konstitucio de Bajono** | **25** |
| **Batalo de Bajleno** | **26-27** |
| **Napoleono en Hispanio** | **28-29** |
| **Plua militado ĝis la jaro 1814** | **30-33** |
| **La nedezirinda "Dezirito"** | **34** |
| **Rezenco de libroj pri la Milito je sendependeco** | **35-37** |
| **La Sekreta Manĝo** | **38-39** |
| **Parizo: majo de 1968 – IU REVOLUCIO EKSTER-TIPA** | **40-41** |
| **1968: Praga Printempo kaj ties sufokado** | **42-44** |
| **Kuirante kun Pilar** | **45** |
| **Don Kiĥoto, ĉiamdaŭra universala simbolo** | **46-47** |
| **Servi al Dio kaj al la riĉeco** | **48-49** |
| **Koncize pri la 67a Hispana Kongreso de Esperanto** | **50** |
| **Koncize pri la 93a Universala Kongreso de Esperanto** | **51** |
| **Ni iomete ridu pri ni mem** | **52** |

La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanto-Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.

Leĝa Registro 0/319/85



# Astura Esperanto Asocio

## NIA DUMJARA LABORADO

Jen nova numero de la revuo de nia **Astura Esperanto Asocio**. Inter la temoj pritraktitaj en ĝi, ĉefe elstaras tiu de la t.n. Hispana Milito je Sendependiĝo, komenciĝinta ĝuste antaŭ du jarcentoj. Krom aliaj materialoj, estas ankaŭ artikoloj dediĉitaj al aliaj eventoj, okazintaj antaŭ 50 jarojn: la Pariza revolucio de majo de 1968 kaj la Paraga Printempo de la sama jaro.




Ekde la eldonado de la 82a numero, en oktobro de la pasinta jaro, nia esperantista rondo plu plenumis siajn specifajn taskojn: propagando pri la Internacia Lingvo kaj organizado de Esperanto kursoj.

Nia plej potenca ilo por la propagando favore al Esperanto estas la interreta paĝo de **Astura Esperanto Asocio**, kies retadreso estas: **http://uica.info/esperanto/**

En ĉi tiu ret-paĝo aperas, krom la revuo HELECO mem (el kiu ni presigas malmultajn ekzemplerojn), ankaŭ aliaj, diversaj materialoj, per kiuj oni intencas montri ke pere de Esperanto oni povas pritrakti ĉiutipajn aferojn: informado, tradukaĵojn, artikoloj, recenzoj, kantoj, eseoj pri ĉia temaro... Tiel por la revuo kiel por la tuta ret-paĝo ĝenerale, ni akceptas kontribuaĵojn de la gesamideanoj kiuj dezirus sendi ion al ni por publikigo. Fakte, en ĉi tiu 83a numero de HELECO aperas, krom niaj propraj verkaĵoj, ankaŭ kunlaboraĵoj de gesamideanoj ne apartenantaj al nia E-rondo.

Temante pri aliaj aferoj rilate al nia Esperantista Asocio, menciindas tio ke en la jara periodo pri kiu ni raportas ni uzadis la novan sidejon asignitan al ni de la Universitata Katedro "Jovellanos". Per la antaŭa numero de la revuo ni informis pri tiu nova ejo de AEA. Temas pri tre ampleksa kaj komforta ĉambro bone provizita de meblaro kaj kaj eĉ komputilo. La unua akto okazinta en tiu loko estis la kunsido de la estraro de la Asocio por organizi Esperanto-Kurson por la nuna jaro. Poste okazis tie ankaŭ la ordinara Asembleo de la asocia membraro de la jaro 2008. Rilate al tiu Asembleo estis

nenio eksterordinara pri kio informi; laŭ la statutaro ĉi-jare oni ne devis elekti novan estraron de la Asocio. La E-kurso komenciĝis malpli frue ol kutime, konkrete en monato februaro. Post lia resaniĝo el la akcidento kiun Santiago Mulas suferis antaŭ pli ol unu jaro, li povis denove dediĉiĝi al la instruado pri Esperanto, sed tial ke estis novaj, komencantaj lernantoj, krom tiuj kiuj jam partoprenis en antaŭaj kursoj, estis necese sam-tempe gvidi duan kurson, pri kiu okupiĝis Carlos E. Carleos. La klasoj okazis kaj en la nova ejo, jam menciita kaj en aparta klasĉambro kiun disponigis al ni tiucele la Universitata Katedro en kiu estas enkadrigita nia **Astura Esperanto Asocio**. Ambaŭ kursoj ĵus finiĝis kiam oni estas preparante ĉi tiun informon por la revuo.



Nova sidejo de **Astura Esperanto Asocio**

Fine, inter la agado de nia Esperantista rondo decas mencii ankaŭ la renkontiĝojn kun esperantistoj de aliaj grupoj. Tiurilate, ni raportu unue pri la tradicie organiz-ata ĉiujare Festo de Esperanto, en dato proksima al la 15a de decembro, naskiĝ-dato de Lazaro Ludoviko Zamenhof, iniciatinto de la Internacia Lingvo. En la jaro 2007 la kutima renkontiĝo de la du esperantistaj grupoj de Asturio, tiuj de Avilés kaj Gijón, okazis dimanĉe la 16an de decembro en Avilés. Kvankam tiutage la vetero estis sufiĉe malvarma, estis plenumita en la Promenejo "Esperanto" de la tiuurba parko la tradicia flora omaĝo kaj sekve, el tie proksima restoracio okazis la, ankaŭ kutima, festeno de la geesperantistoj de ambaŭ urboj.

Tiuj renkontiĝoj estas gravaj por ni, la aktivuloj de la Esperantista Movado ne nur pro la kama-radeca etoso kiun oni ĝuas en ili sed ankaŭ pro tio ke ili estas konvenaj okazoj por interŝanĝado de sperto en nia aktivado favore al Esperanto.

Tiurilate speciale utilis iu alia renkontiĝo kiun havis kelkaj membroj de nia E-Grupo kun aro da geesperantistoj el diversaj landoj de la Eŭropa Unio. Tiu renkontiĝo okazis en Pruvjo, ĉe la bieno de la kuracisto Valentín Pérez, aŭtodidakta esperantisto, aliĝinta al la Pasporta Servo, tiu Internacia Gast-iga Servo per Esperanto. Antaŭe ni jam havis okazon renkontiĝi kun esperant-isto gastante ĉe li. En ĉi tiu okazo la gastoj estis dekduo da geesperantistoj el diversaj landoj de la Eŭropa Unio: Germanio, Britio, Polujo, kaj ĉefe Francio, kiuj adresiĝis, pere de buso speciale luprenita de ili, al Kompostelo. Inter-

parolante kun samideanino Michèle Abada-Simon, organizintino de tiu vojaĝo, ŝi diris al ni: Ni iras al Kompostelo sed tamen ni ne estas pilgrimantoj potiuloken; ni ankaŭ ne estas turistoj; ni estas manifestaciantoj favore al Esperanto. Dum ilia vojaĝo kaj en la lokoj kie ili haltas, ili disdonas propagandon favore al la Internacia Lingvo. En Hispanio ili faris tion en Bilbao la antaŭan tagon, kaj dum la mateno de la tago de nia renkontiĝo ili estis farinte tion ankaŭ en Oviedo. Similan agon ili planas efektivigi en Kompostelo kaj aliaj lokoj kiujn ili vizitos. Por similaj vojaĝoj en la sekvaj jaroj, ili invitas hispanajn esperantistojn.

Sed precipe interesa kaj instrua estis alia aktivado kiun ili realigas, kaj pri kiu oni pli detale pritemas en la sekvaj paĝoj pere de artikolo verkita de la sama Michèle Abada-Simon. Temas pri vere politika aktivado okaze de la balotado por la Parlamento de la Eŭropa Unio. La geesperantistoj de kelkaj eŭropaj landoj prezentadas proprajn kandidatarojn en la balotkampanjo, kio ebligas kaj rajtigas al ili propagandi dum iom da tempo per la publika televido de iliaj landoj kaj per afiŝoj favore al siaj kandidataroj kaj pere de tio, fakte, favore al la Internacia Lingvo. Ĉu ni kapablos organizi ion similan en Hispanio? La ideo ŝajnas interesa kaj indas ke oni pristudu ĝin. Nia presorgano, do, lanĉu la ideon al la geesperantistoj de Hispanio.

**Renkontiĝo en Pruvjo, la 5an de julio-2008, de membroj de nia E-Asocio kun geesperantistoj el diversaj landoj de la Eŭropa Unio.**









La franca profesorino Michèle Abada-Simon, ĉefa prizorgantino de la perbusa ekspedicio de geesperantistoj el la Eŭropa Unio, kun kiuj renkontiĝis en Pruvjo, la 5an de julio, kelkaj membroj de **Astura Esperantista Asocio**, estas aktivulino de la politika movado **Eŭropo Demokratio Esperanto**. Per tiu ĉi artikolo ŝi eksplikas al ni kio estas tiu movado kaj kiun celon ĝi havas.



# Je via sano, samideanoj!

Por danki vin, kiuj permesas al ni paroli per via ĵurnalo, ni proponas al vi tre bongustan koktelon (kun aŭ sen alkoholo, laŭvole): E.D.E. t.e. **Eŭropo Demokratio Esperanto**.

- Esperanton, kompreneble, vi tute bone konas!
- Pri demokratio, oni neniam havas tro…
- Ĉar la Eŭropa Unio diras ke ĝi celas, laŭ sia devizo, samtempe "unuecon kaj diversecon", ĝi bezonas Esperanton, ankoraŭ pli urĝe ol la tuta mondo, por komuniki libere kaj ŝpareme inter egalaj eŭropaj civitanoj.

Jen tial, en Francio, ni profitis eŭropajn balotojn en 2004. Kial nur, bedaŭrinde, en Francio? Ĉar nur Germanio provis, sed ne sufiĉe frue.

Tiun (frenezan? genian?) ideon havis Kristian Garino. Multaj francaj esperantistoj absolute rifuzis tiun proponon. Esperanta komunumo, ĉu ĉar tro persekutata, tro ofte timas novaĵojn kvazaŭ kiel "blasfemoj": ĝi posedas mirindan idealon kaj sekvas kaj ripetas ĉiam rutinajn kutimojn. Do, ni estis nur grupetoj de kuraĝaj Donkiĥotoj, sen mono, sen fortoj, sen politika sperto, sen iu ajn bonŝanco. Evidente ni ne kapablis. Tute ne eblis. Ni scias tion. Sed… tamen ni provis kaj… sukcesis fari! Jes ja!

Kiu celo? Laŭ la franca sistemo (vidu en via lando, kiel precize tio funkcias. En Germanio, ekzemple, estas tute alia organizo ol en Francio, pli favora ol la nia!) la partioj, kiuj kapablis starigi liston en minimume 5 el la 8 regionoj, rajtis havi senpage lokon, materialon, kaj eĉ specialistojn por krei reklaman filmeton. Ni havis 7 listojn (nur en "France d'Outre Mer" ni ne havis sufiĉe da tempo kaj fortoj). Do junuloj kreis du filmetojn, trifoje elsenditaj per du publikaj televidoj kaj ankaŭ radioj. Imagu la terurajn sumojn (kiom da nuloj?), se ni devintus pagi tian reklamaĵon! Tiel tion unue ni celis kaj trafis.

Sed ne nur: kvankam mono multe mankis por printi kaj disdoni sufiĉe da afiŝoj, programoj kaj voĉdoniloj, tamen voĉdonis por E.D.E. pli ol 25.000 civitanoj. Evidente tio estas ridinda nombro por esperi deputiton – kaj tion ni sciis. Sed jen jam bela "peticio" – des pli ke multaj personoj nek ricevis politikajn programojn nek trovis voĉdonilojn en balotejo; kaj ankaŭ des pli ke iaj esperantistoj, aŭ ne konsentis pri tiu iniciato, aŭ tamen preferis voĉdoni kiel kutime favore al sia preferata partio.

Precipe, la intereso vekita por Esperanto ("Do, ĝi ne mortis? Bonŝance!" – "Ho, kio estas tiu interesa lingvo kaj idealo?") pruvis, ke ni pravis, provante… neeblaĵon. Kaj ni ĝojis, kiam niaj eminentuloj, - kiuj antaŭe grumblis kontraŭ ni kaj rifuzis helpi – finfine honeste agnoskis, ke tiu nova agado profitis al Esperanto.

Sed Esperanto ne estas proprietaĵo de Francio, ĉu ne? La venontaj eŭropaj balotoj okazos en 2009. Ne facilas partopreni: esperantistoj ne estas spertuloj pri tio!

Tial ni ege esperas, ke en ĉiuj landoj esperantistoj kuraĝe intervenu por la komuna eŭropa bono (supre pravaj kutimaj politikaj preferoj, dekstruloj aŭ maldekstruloj, ktp).

Atentu, ke oni devas tien vigle klopodi, do ne malfrui kaj tuj serĉi informojn: unue, kiel en via lando organiziĝas eŭropaj balotoj? Poste, depende de tio, sin mem plej eble efike organizi.

Ni ne havas ĝeneralan programon, jes ja. Estas 785 eŭropaj deputitoj. Se ĉiuj el ili, ĉiufoje post 5 jaroj, kapablus alporti nur unu mirindan solvon al grava problemo de nia Eŭropa Unio, ĉi-tiu mirakle progresus! Esperantistoj estas fakuloj pri lingvaj homaj rajtoj. Kuraĝon! Ne lasu nin solaj! Justa Eŭropa Unio bezonas ĉiujn. Urĝas! "Kredu nin, gesamideanoj!" Ni spertis…

Michèle Abada-Simon, membro de E.D.E.

Por kontakti "Eŭropo Demokratio Esperanto":
E.D.E.
6 rue des Juifs
Fr-67000 Strasbourg
kontakto@e-d-e.org
http://www.e-d-e.org/

# Eŭropo Demokratio Esperanto

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

**Eŭropo Demokratio Esperanto** (EDE) estas politika movado kiu naskiĝis en Francio kaj Germanio en 2003 kiel eŭropa federacio de landaj sekcioj.

En 2004, tiu civitana movado partoprenis la eŭropan baloton en Francio. Milionoj da francoj vidis filmeton pri Esperanto sur la naciaj televidaj kanaloj kaj ricevis informfolietojn pri Esperanto kadre de la oficiala propagando. Dank' al tiu agado, pli ol 25.000 francoj (inter ili multaj neesperantistoj) voĉdonis por **Eŭropo Demokratio Esperanto.**

Nuntempe, estas aktivuloj en Francio, Germanio, Hungario kaj Nederlando. Kio en via lando?

## Nia programo:

- garantio de esprimorajto sen lingva diskriminacio kaj defendado de lingvaj rajtoj,
- uzado de la internacia lingvo Esperanto kiel pontlingvo kaj laborlingvo kadre de eŭropaj institucioj,
- kuraĝigo de la instruado de Esperanto por faciligi interkomunikadon,
- efektiva pritrakto de diverseco por kuraĝigo kaj ŝirmo de la minoritatoj.
- partopreno al la demokratio dank' al rekta referenduma premo pri leĝoj kaj agoj,
- leĝaro farita de reprezentantoj elektitaj de la popolo,
- realigo de la homaj rajtoj surbaze de la deklaracio de 1948.

# En 2009, ni voĉdonu por **Esperanto** en ĉiu lando de Eŭropa Unio!

## Kiel partopreni kaj agadi?

Por atingi siajn celojn, **Eŭropo Demokratio Esperanto** bezonas aktivulojn en ĉiuj landoj. Esperantistaj volontuloj por EDE agado:

- unue grupiĝu en sia lando kaj kreŭ EDE landan diskutliston por helpi sinorganizi, kaj poste krei landan EDE-sekcion,
- aliĝu al **ede-eu@googlegroups.com** kiu estas la eŭropa diskutlisto de **Eŭropo Demokratio Esperanto** – per tiu listo eblas doni kaj peti konsilojn por agado, organizado, ktp.
- ĉar ni bezonas aktivulojn, kaj multajn kaj politikemajn, ĉar estas 99,9% da neesperantistoj kaj nur 0,1% da esperantistoj **varbu ĉefe inter neesperantistoj** kaj **laboru nacilingve**; la varbintojn nur post aliĝo oni invitos lerni esperanton por eŭropaj rilatoj kun EDE-anoj kaj civitanoj de aliaj landoj,

## Kontaktoj:

- **Eŭropo Demokratio Esperanto** 8 rue de Cotte; FR-75012 Paris; Francio
- Retejo: **www.demokratio.eu**
- Retpoŝto: kontakto@e-d-2.org

**Por monsubteni Eŭropo Demokratio Esperanto ĝiru al ĝia UEA-konto: edee-k**

*Eŭropo Demokratio Esperanto*

Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE) estas politika movado kiu naskiĝis en Francio kaj Germanio en 2003. Tiu civitana movado sukcesis partopreni la eŭropan baloton en junio 2004.
Milionoj da francoj vidis filmeton pri Esperanto sur la naciaj televidaj kanaloj.

Dank' al tiuj senpagaj filmetoj kaj al la afiŝoj kaj gazetaj artikoloj, EDE ricevis 25.000 voĉdonojn. Multaj el tiuj voĉdonantoj ne estas esperantistoj sed simple opinias ke Esperanto estas bona ideo kaj ke ĝi estas utila por Eŭropo.
Por konstrui la Eŭropan Union, por ebligi debaton inter eŭropaj civitanoj, ni devas proponi demokratiajn ilojn. La unua estas Esperanto.

esperanto 2009



## Kiel partopreni nian agadon?

- aliĝi la retliston de EDE,
- starigi lokan diskutliston,
- starigi EDE-asocion/partion kun samideanoj en sia lando,
- publikigi artikolojn/agad-alvokojn en lokaj, landaj Esperanto-gazetoj,
- partopreni konferencojn pri lingva politiko, prezenti la vidpunkton de EDE tie,
- dissendi gazetarajn komunikojn,
- disdoni flugfoliojn okaze de prilingvaj, pri-eŭropaj aranĝoj…

## Ĉu pretaj por 2009?

La venonta eŭropa baloto okazos en junio 2009. Tiam la movado Eŭropo Demokratio Esperanto planas partopreni la baloton en multaj eŭropaj landoj. Tial via kunagado estas bezonata!

La efiko de balota kampanjo estas grandega: ĝi ebligas sendi balotilojn kaj informilojn al ĉiuj voĉdonantoj de iu lando. Tuteŭropa balota kampanjo estas la plej vastskala kaj efika reklamkampanjo por niaj ideoj.

La Eŭropa Unio bezonas novan iniciaton por pli bona integriĝo de la civitanoj. La debatoj kaj ideoj ne plu estu limigitaj je la nacia skalo. Ni proponu alian Eŭropon, pli partoprenigan!

## Kiel kontakti EDE?

Skribu al kontakto@e-d-e.org
Retejo: www.esperanto2009.eu
Poŝtadreso:
EDE, 8 rue de Cotte, FR-75012 Paris
Telefono: +33 668 33 78 14

Por aliĝi la retliston de EDE, sendu malplenan mesaĝon al :
Ede-eu-subscribe@googlegroups.com

Se vi deziras monsubteni EDE, ĝiru al nia UEA-konto: edee-k

Se la projekto **Eŭropo Demokratio Esperanto** interesas vin, plenigu la formularon:
Nomo:
Lando:
Retadreso:



# FIRMAA TRANSLOKIĜO KAJ DUNGITECO: LUDO PER FALSITAJ KARTOJ

*Verkis:* Juan Torres López (www.juantorreslopez.com)
*Tradukis:* Carlos Enrique Carleos Artime

Plej ŝokanta fenomeno kaŭzita de la tutmondiĝo estas ke la firmaoj tiel facile povas translokiĝi, tio estas, forlasi landon por elekti en aliaj kie ili trovas pli bonajn kondiĉojn por pligrandigi siajn profitojn. Serĉi pli favorajn teritoriojn por investi estis logika konstanto en la etendiĝa dinamiko kapitalisma kaj jen tio pliigis senĉese la direktan investadon eksterlanden en preskaŭ ĉiu freŝa historiepoko. Sed tiun procezon oni plenumis tradicie kreante kopiojn proksimume ĝustajn de la antaŭa agado en la novaj spacoj, kio ne ĉiam okazigis, tial, forlasi la agadon ĝis tiam plenumatan en la originaj lokoj.

En la lastaj jaroj, tamen, pli ĝuste okazas tio, ke la firmaoj fermas parte aŭ eĉ tute siajn fabrikojn kaj agadojn en iu loko por translokiĝi al aliaj kie ili trovos pli favorajn negocajn kondiĉojn.

La empiria analizo de la firmatranslokiĝo klare montras ke estas tre klaraj motivoj kaŭzantaj ĝin kiuj limiĝas al la eblo trovi pli malaltajn kostojn, ĉefe laborajn, kaj ankaŭ pli favoran etoson por amasigaj ekonomioj, tio estas, ŝparo de rimedoj pro koncentriĝo de agadoj en difinita teritorio.

### Pri ĝiaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj

La ekonomika teorio kutime konsideras la translokigon kiel simplan aŭ rektan esprimon de la movlibero de faktoroj kaj kapitalo al kiu oni tendencas, aŭ kiun oni klopodas trudi, pro la avantaĝoj kiujn supozeble ĝi kunportas je mezlonga kaj longa perspektivo.

Tio estas tiel ĉar supozeble pro perdi la laborojn plej simplajn kaj kun plej granda ŝarĝo de primaraj kostoj, la teritorioj el kiuj ili eliras havos kiel nuran alternativon necese tendenci specialiĝi pri aliaj kapablaj generi post longe pli grandan valoron kaj konkurencan avantaĝon. Kaj, krome, ĉar oni supozas ke, kun la paso de la tempo, la konsumantoj de la spaco de kie eliris la laboro povos profiti de la produktoj antaŭe tie akirataj kontraŭ pli malgranda prezo. Avantaĝoj kiuj, aldonitaj al tiuj kiujn ricevas la teritorio ricevinta la translokiĝintaj laboroj, implicas netan kreskon de bonstato laŭ tutmonda skalo je mezlonga kaj longa perspektivo.

Tiu estas la teoria pravigo ebliganta, ĉefe al la grandaj firmagvidantoj kaj al iliaj politikaj reprezentantoj, aserti ke la translokiĝo estas pozitiva fenomeno kiun oni stimulu por atingi ke la produktado estu "malpli kosta kaj pli konkurkapabla".

Konvenas scii tion ĉar pro tiuj motivoj, kaj kontraŭ tio, kion oni eble povus pensi, ne ĉiuj ekonomiaj subjektoj montras sin kontraŭaj al la translokiĝo. La direktoro de unu hispana institucio je la servo de tiaj interesoj, la Instituto pri Ekonomikaj Studoj, rekomendis antaŭ tri jaroj al la hispanaj firmaoj ke ili helpu sin per la translokiĝo al landoj kun laborfortoj malpli kostaj, helpo "neevitebla", laŭ tiu institucio, por "garantii la postvivadon" de la industrio je longa perspektivo (El País, 2005.12.20).

La realeco kaj la propra konduto de la firmaoj translokiĝintaj montras, tamen, ke tiuj analizoj havas malmultan sciencan fundamenton.

Laŭ la analiza vidpunkto, por ke tiuj antaŭsupozoj efektive eblu necesus akcepti ke estas ĝeneraligitaj la merkatoj de perfekta konkuro kaj ke estas reekvilibrigaj kaj rekompencaj meĥanismoj ebligantaj reasigni laŭ perfekte kompensa maniero inter tiuj teritorioj la perdojn kaj profitojn okazantajn en ili ĉiuj laŭ tre nesimetria maniero. Ekzemple, ke en la interno de ĉiu teritorio la profitintaj agantoj kompensus la malprofitintajn, ke la maldungitoj de la translokiĝintaj industrioj estus dungotaj en aliaj industrioj, ke la laborantoj enspezus ĉiam laŭ siaj kapabloj kaj, sekve, ke ili havus la saman salajron sendepen-

de de la loko kie ili estus dungitaj, aŭ ke ne estus strukturaj kostoj pro la ŝanĝoj kuntrenitaj de la translokiĝo.
Ne necesas esti ekonomika geniulo por kompreni ke tiaj kondiĉoj eblus nur en tre esceptaj kondiĉoj. Kion efektive ni scias nun tutcerte, kvankam ĝin ne volas aprobi kiuj defendas la simetrion kaj la privilegion per kiuj oni nuntempe agas en la internaciaj merkatoj, estas ke por eviti netajn perdojn de bonstato estas esence reguligi kun granda lerto ĉiujn tiujn movojn kaj eviti ke okazu kun tuta kaj senorda libero. Se oni ne reguligas ilin bone, kiel okazas nun, kiam la firmaoj agas laŭ sia volo serĉe de pli grandaj profitoj, okazas ja tre nesimetriaj situacioj, tutmonda kresko de neegaleco kaj tre drastaj perdoj de bonstato en la lokoj el kie eliras la firmaoj, sen ke la profitoj ricevitaj en la teritorioj al kie ili iras, estu gravaj, nek kompensu la damaĝon kaŭzita de la translokiĝo. Pruvas tion la fakto ke, kvankam kreskinte multe la kvanto de rekta investado en eksterlando ligita al translokiĝoj kaj irinta el la nordaj landoj en la sudajn dum la lastaj dudek jaroj, nun ĝi plu reprezentas preskaŭ saman proporcion (25%) rilate al la monda tutaĵo, kio signifas ke ĝi ne modifis la regulon de neegaleca distribuo de la kapitalo.



**La translokiĝ-libero estas la faktoro de la ega povo de la grandaj firmaoj. Fakte, ĝi ne estas necesa. Sufiĉas ke ĝi restu kiel konstanta minaco de detruo de centmiloj da laborpostenoj; kiel ĉantaĝilo pezanta sur ĉiuj laboristoj.**

Kelkaj firmagvidantoj konfesas, eble sen rimarki ĝin, la negativajn sekvojn kiujn havas la efektiva malobservo de tiuj teoriaj antaŭsupozoj liberalaj kiam klarege asertas ili ke la transokiĝoj estas neeviteblaj se oni ne malpliigas la netajn nivelojn de bonstato en la mondo. Tion klare diris, ekzemple, la prezidanto de Daimler Hispanujo, Carlos Espinosa de los Monteros, kiu antaŭ kelkaj semajnoj petis ke "la sociaj agantoj rezignu `siajn nunajn bonstatajn poziciojn' kaj adoptu poziciojn konformajn al la defioj de tutmonda industrio" (El Economista 2008.4.27).

### La falsitaj kartoj de la transnacia komerco

Kio efektive okazas ne estas ke la translokiĝoj realiĝu, kiel oni volas argumenti, por atingi tutmonde pozitivan kreskon de la efiko de la ekonomia sistemo. Eĉ malpli, tiun de la bonstato. Ĝi estas alia afero.

Kio okazas estas ke la grandaj firmaoj atingis starigi transnacian ne-sistemon kiu ebligas ilin liberigi sin de iu ajn obstaklo por profiti de la ekzisto de teritorioj kie estas riĉofontoj en kondiĉoj por havigi ilin per pli grandaj profitoj: jen ĉar la labormerkatoj estas pli malreguligitaj, jen ĉar estas malpli da obstakloj antaŭ la atencoj kontraŭ la natura medio, pli fortaj registaroj aŭ laborforto pli bone preparita kaj malpli bone pagita. Kaj tio havigas al ili ne nur la avantaĝon iri for, se fine ili bezonus ĝin, sed ankaŭ minaci por krei pli favorajn kondiĉojn en la lokoj kie ili estas.
Ne veras, ekzemple, ke ĉefe la grandaj firmaoj translokiĝantaj tiel faras por postvivi, sed por gajni multe pli. Spertintoj pri specifaj procezoj translokiĝaj (kaj en Hispanujo freŝas dekoj da ili), ni povis konstati multfoje ke la sama firmao pretekstanta ĉi tie perdojn por pravigi sian translokiĝon tamen ĝi obtenas milionajn profitojn se anstataŭ rigardi ĝian "nacian" rezultan kalkulon oni analizas, kiel necesas, la ĝeneralan de la grupo al kiu ĝi apartenas. La kontista inĝenierado, la fiskaj paradizoj aŭ la t.n. transdonprezoj (ebligantaj fakturi inter la malsamaj komponantoj de industria grupo tiel ke la rezultoj pozitivaj aŭ negativaj aperu tie kie ĝi pli interesas) estas kelkaj el la multaj rimedoj kiujn nun havas la grandaj firmaoj por kaŝi sian veran profitadon kaj povi pravigi la translokigojn.
Tiu libero nun preskaŭ ĝenerala estas la faktoro finfine difinanta la nunan grandan povon de la grandaj firmaoj. Efektive, la firmaa translokiĝo ne estas danĝera kaj damaĝa por la bonstato pro la specifa efiko kaŭzita de la detruo de centmiloj da dungoj, sed ĉar ĝi estiĝas konstanta kaj rekta minaco, ĉantaĝilo pezanta sur ĉiuj ceteraj laboristoj: se oni ne pretas akcepti pli postulantajn laborkondiĉojn, pli moderajn salajraltigojn, pli flekseblan labormerkaton, impostan moderigon aŭ liberigi la komercajn labortempojn, inter aliaj kondiĉoj, la firmaoj povus decidi iri aliloken. Kaj ili rajtos foriri se ili volos. Estas malfacile, trovi pli decidan argumenton por trudi al la laboristoj tiujn laborkondiĉojn. Kiel surprize estas, ke iuj pensas ke tiel oni atingas tutmondajn efikojn de kresko de la sociaj agado kaj bonstato.

# HISPANIO 1808




Vintre de la jaro 1807 la armeo de la franca imperiestro Napoleono eniris en Hispanion. Laŭteorie temis pri milita ekspedicio de la ĝis tiam alianculo destine al la okupado de la alia najbara lando, Portugalio. Tio okazis kadre de la strategio de Napoleono por la komerca kaj milita sieĝo al Britio. Tamen la politikaj eventoj en Hispanio kaj la evoluo de la internacia situacio okazigis ke la franca armeo, fakte, plenumis okupacion de la lando, okupacio kiun oni intencis legaligi poste per la reĝaj abdikoj en Bajono. Rezulte de tiu neatendita kulmino de la politika krizo, kiun la hispana popolo ne povis kaj ne volis asimili, fariĝis reĝo de Hispanio Josefo, frato de la imperiestro Napoleono.

La hispana rifuzo al tiu procezo ekmontriĝis per la perfortaj okazintajoj de la 2a de majo de la jaro 1808 en Madrido, kiuj tuj resonis en la tuta lando kaj vekis la popolan reziston kontraŭ la invadinto. De tiam la Iberia duoninsulo fariĝis infero por la francaj trupoj; la politikaj planoj de Napoleono por lia superregado sur tuta Eŭropo komencis fiaski.

En Hispanio, de tiam kaj ĝis la jaro 1814, la kontraŭfranca batalado havis la karakteron je sendependiĝ-milito, kaj tiele ĝi estis nomita de la historiistoj de tiu epoko. Sed, krom tio, la landa konvulsio de la jaro 1808 signifis ankaŭ grandan socian kaj politikan ŝanĝon. Efektiviĝis la rompiĝo inter la hispana socio kaj la antikva politika ordo de la reĝa absolutismo kaj komenciĝis alitipa maniero fari kaj vivi la politikon. De tiam, Hispanio jam ne plu estis la sama ol antaŭ tiu jaro. Simila procezo de ŝanĝado kaj rompiĝo kun la Malnova Reĝimo konkretiĝis de tiam, pli malpli frue, en ceteraj landoj de Okcidenta Eŭropo.

Memorante la eventojn, okazintaj en nia lando ĝuste antaŭ du jarcentoj, en la sekvaj paĝoj ni raportas pri la historiaj kaj politikaj antaŭaĵoj (kaj landaj kaj internaciaj) de la konflikto, ties eksplodo en majo de 1808, la sesjara disvolviĝo de la milito kaj ĝiaj sekvoj kaj efiko sur la posta historio de Hispanio.



# Dekadenca kortego de imperio en dekadenco

Komence de la 19a jarcento, la Borbona dinastio estis reĝanta en Hispanio de antaŭ ĝuste unu jarcento. La antaŭaj reĝoj de tiu dinastio lasis pri si ne malbonan memoron en la landa historio. Ekde la jaro 1788 –unu jaron antaŭ la komenciĝo de la Franca Revolucio– la hispana monarĥo estis Karolo la 4a. La reĝado de lia patro, Karolo la 3a, estis periodo de paco, ordo, progreso kaj disvolviĝo de la kultura kaj politika movado nomita "Klerismo", kiu celis disvastigi la lumojn de la racio.

Menciindas ke Hispanio estis tiam la metropolo de granda imperio kiu ampleksis, krom la Filipinan Insularon en Azio, ankaŭ grandparton el la Amerika kontinento, esceptante, en la sudo, Brazilon, kiu konstituis la kolonian imperion de Portugalio, kaj en la nordo Kanado, kolonio de Britio, kaj la jam emancipiĝinta Usono sen ties Ŭesta parto, ankoraŭ ne konkerita nek la statoj de Kalifornio, Florido, Teksaso kaj Nevado kiuj tiam ankoraŭ estis parto, ankaŭ ili, el la hispana imperio.

Karolo la 4a ne estis inda je la herenco kiun li ricevis. Lia reĝado karakteriĝis pro kortegaj konspiroj, koruptado, dekadenco… Sed la ĉefa kaŭzo de la politika perturbo en kiun falis la hispana nacio sendube estis la granda revolucio en la najbara lando, Francio, kie estis detruita la reĝa familio, ĉefa branĉo de la Borbona dinastio. Nek la lando nek ties reĝo, nek la politika sistemo, estis preparitaj por alfronti tian kataklismon, kiu signifis la finiĝon de la t.n. Antikva Reĝimo.

Karolo la 4a estis neinteligenta homo al kiu mankis intereso pri la publikaj aferoj propraj de lia alta posteno. Li emis nur la ĉasadon kaj la manlaboradon, kia la horloĝo-farado. Lia malnobla konduto en la krizo de la jaro 1808, kiun ni priskribos, eble estis rezulto de la ega influo, kiun sur li havis lia edzino Maria Ludovikino de Parmo.

Ĉi tiu reĝino estis ankaŭ kuzino de sia edzo. Ekde ŝia edziniĝo ŝi evidentigis emon interveni en la politiko. Pri ŝi restis en la historio bildo de vera Mesalina kun inklino al facilaj kaj adultaj amaferoj. Ŝi baldaŭ komencis intrigi en la hispana politiko, kaj inter siaj "geniaj" disponoj estis la promociado de iu juna kadeto de la palaca gvardio, nomita Emanuelo Godojo, kiu tre rilatis de tiam kun la malfeliĉo de la tiama hispana socio.

Emanuelo Godojo, dank' al la apogo de la reĝino, lia amantino, rapide prosperis en la hispana kortego. Dum la jaroj 1789 al 1808 li estis la ĉiopova favorato de la gereĝoj de Hispanio kaj ĉefa responsulo de la politikaj katastrofoj de tiu periodo. Kiam li estis 25-jaraĝa, sen eliri el la reĝa palaco kaj sen pliaj meritoj ol tiuj akiritaj en la lito de la reĝino (li estis la patro de kelkaj el la gefiloj de la reĝino), li estis atinginta la plej altajn politikajn, administrajn kaj honorajn titolojn de la hispana lando kaj ties kolonia imperio. Li, ja, estis komandoro de la ordeno de Sankta Jakobo, kampomarŝalo, servo-nobelo de la reĝa ĉambro, generalleŭtenanto, Granda Kruco de Karolo la 3a, duko de Alkudio, grand-nobelo de Hispanio… poste ankaŭ general-kapitano. Krome li decidis pri ĉiuj registaraj aferoj, inter ili la nomumo de guberniestroj por la tuta lando kaj la kolonioj: Filipino, Teksaso, Kalifornio, Meksiko, Peruo, Florido, Kubo, Ĉilio, Argentino, Kolombio, Venezuelo, Salvatoro, Nikaragvo… Poste, kadre de la politikaj eventoj kiujn ni priraportos, li gajnis ankaŭ la titolon de Princo de la Paco kaj havis esperon kaj pretendon esti kronata kiel reĝo de triono el la teritorio de Portugalio.


Emanuelo Godojo

Nu, tiu estis la homo kiu gvidis la aferojn de Hispanio en la komplika epoko de la prosperado de Napoleono Bonaparto kaj kiam ĉi tiu planis konkeri ĉi-tiun landon.

Ĝis la jaro 1789, la hispana politiko baziĝis sur du principoj. En la eksteraj, internaciaj rilatoj, Hispanio estis parto kaj subtenanto de la t.n. "Familia Pakto". Tiu pakto estis interakordo inter ĉiuj kronoj de la Borbona dinastio: Francio, Hispanio, Napolo… kiu garantiis ian ekvilibron en Eŭropo en rilato kun Britio kaj Aŭstrio. La interna politiko de la lando baziĝis en la principo de la antaŭe menciita "Klerismo" ("Ilustración" en la hispana lingvo). Tiu kultur-politika movado estis sufiĉe progresema en la kadro de la absolutismaj monarkioj de la Antikva Reĝimo, sed, kompreneble, ĝi ne estis tute demokratia en la moderna senco de la vorto. Ĝia dokrino estis: ***Ĉio por la popolo kaj favore al la popolo, sed sen la interveno de la popolo***. Ĉiukaze, tiu politiko, dum longa tempo-periodo, garantiis pacon kaj harmonion en la lando kaj en la kolonioj. Ambaŭ principoj, la "Familia Pakto" kaj la "Klerismo" ruiniĝis rezulte de la venko de la granda Franca Revolucio, jam preskaŭ je la komenciĝo de la reĝado de Karolo la 4a.

La perforto de la francaj revoluciuloj kun la detronigo kaj senkapigo de la reĝo Ludoviko la 16a vekis en la hispana kortego kaj en la superreganta klaso de la lando grandan timon kaj reagon. La hispana gvidantaro rompiĝis inter tiuj kiuj daŭre apogadis la klerisman ideon kaj simpatiis al la revolucio, kaj tiuj aliaj kiuj poziciiĝis favore al la monarkia tradicio. En la landa situacio tio konkretiĝis en la politika batalado inter ambaŭ partioj celante la kontrolon de la registaro, sed kun la fono de la indiferento kaj apatio de la hispana popolo.

La protagonistoj de la registaraj ŝanĝoj de tiu periodo estis la grafoj Arando kaj Floridablanko, gvidantoj de la kontraŭantaj partioj: klerisma kaj tradiciisma, sed la ŝanĝoj en la registaro tute ne efikis kontraŭ la situacio de Godojo. Fakte, estis li kiu decidis la ĉeson de tiu aŭ tiu ministro kaj la nomumon de tiuj aliaj. Similan kontrolon li posedis pri la farenda ekstera politiko. Rezulte de la pakto aŭ kontrakto de la hispana dinastio kun la Borbonoj de Francio, Hispanio deklaris militon kontraŭ la revolucia registaro de la najbara lando en la jaro 1793, kiam estis gilotinita la reĝo Ludoviko la 16a.

La milito, kiu daŭris ĝis julio de la jaro 1795, komenciĝis favore al la tri hispanaj armeoj kiuj invadis Francion tra la teraj landlimoj. Dume la hispana ŝiparo kunlaboris kun la brita eskadro en la atako al la fortika urbo Tolono. Ĉitie, post la konkero de la urbo fare de la brita kaj hispana mararmeoj, la francaj trupoj sukcesis reakiri la kontrolon de la fortikaĵo kaj faris amasmortigon inter la loĝantaro favora al la monarkio. Inter la franca soldataro distingiĝis iu juna oficiro je artilerio, nomata Napoleono Bonaparto, kiu tre famiĝos kaj prosperos en la sekvaj jaroj. Ankaŭ en la teraj frontoj sukcesis la franca reago venkante la hispanajn armeojn kaj konkerante kelkajn urbojn proksimajn al la limo inter ambaŭ landoj: kastelo de Figero en Katalunio, Bilbao, Vitorio, Donostio en Eŭskio…

Mise komandita de Godojo, kiu ne moviĝis el la reĝa palaco, la hispana armearo estis venkita en tiu milito, montrante al la mondo que la dekadenco efikis ankaŭ sur soldataro kiu iam, antaŭ pluraj jarcentoj, estis la plej potenca el la mondo.



# Trafalgaro

Per la subskribo de la t.n. "Paco de Basileo", la 22 de julio de la jaro 1795, Hispanio kaj la Franca Respubliko metis finon al la milito kiu, ekde la jaro 1793 alfrontigis unu kontraŭ la alian. Estis tiam, kiam la reĝa familio de Hispanio aljuĝis al Godojo la titolon de "Princo de la Paco". La rezulto de la milito estis speciale multekosta por Hispanio; ĉi tiu lando atingis neniun el siaj celoj. La revolucia reĝimo plifirmiĝis, la francaj gereĝoj estis senkapigitaj, la hispana loĝantaro restis dividita inter la partianoj kaj la kontraŭuloj de la novaj ideoj… kaj plej grave el ĉio ĉi: la nova alianco kun la revolucia Francio igis ke la antaŭa aliancano, Britio, fariĝis de tiam malamiko de Hispanio kaj dediĉiĝis al la damaĝado de ĉi ties interesoj en Eŭropo kaj Ameriko.

Poste evoluis la situacio en Francio. La revolucia reĝimo alprenis pli moderan teniĝon; estis la etapo nomita "Direktorio". Ene de ĝi pli kaj pli distingiĝis la figuro kaj la militaj sukcesoj de la korsika oficiro –poste generalo– Napoleono Bonaparto. Li fariĝis famkonata je internacia skalo pro siaj venkaj kampanjoj en Italio kaj Egiptujo. Sed sia politika kariero tiel estis brila kiel la militista. Li estis nomumita Unua Konsulo de la Respubliko, poste Konstanta Konsulo kaj fine Imperiestro (jaro 1804). Plej grandan famon donis al li siaj venkoj sur la armeoj germanaj, aŭstriaj, rusaj…

Ĉar dum tiu tempo la hispana regno daŭre estis en alianco kun Francio, la militoj kiujn deklaris al tiu lando la sinsekvaj koalicioj kiuj formiĝis kontraŭ ĝi subgvide, ĉefe, de Britio, domaĝe efikis ankaŭ kontraŭ Hispanio, ĉefe en la tereno kie Anglio estis pli forta, t.e. en la maroj. Tiuj domaĝoj igis ke pli kaj pli kreskadis la popolan malamon al la valido Godojo, responsulo de la hispana politiko.

Estante Unua Konsulo, Napoleono volis disponi je la ŝip-eskadro de Hispanio por batali kontraŭ la angloj. En la sferoj de la hispana mar-armeo estis ia rezisto kontraŭ tiu plano. Sekve de tio Napoleono trudis al la kortego de Madrido la elpostenigon de kelkaj militistoj kaj politikistoj kontraŭaj al la kunlaborado kun Francio. Godojo mem suferis dum iom da tempo la persekutadon kaj la premon de Parizo kiu igis ke la hispanaj gereĝoj apartigu lin dum kelkaj monatoj el la povo, sed fine li sukcesis resti en la favoro de la reĝino kaj konservi sian influon en la politiko de la lando.

Sed li lernis la lecionon kaj cedis al la petoj de Napoleono: la 13an de februaro de 1801 li subskribis, en Aranĥuezo, iun akordon kun la franca ambasadoro –Luciano, frato de Napoleono– per kiu Hispanio metis sian mar-armeon serve de Francio. Samtempe, la hispana registaro donis sian apogon al Napoleono en la premo sur Portugalio por ke tiu ĉi lando fermu siajn havenojn al la britaj ŝipoj.


Ĉiam serve de Francio, kie la stelo de Napoleono leviĝis pli kaj pli, la Hispanio regata de Godojo deklaris militon al Portugalio kiam ĉi tiu lando rifuzis obei la ordonon de Bonaparto pri la mara sieĝo al Anglio. En tiu ĉi milito batalis kune francoj kaj hispanoj kontraŭ Portugalio, kaj ĉi-foje, jes ja, la propra Princo de la Paco komandis la hispanan armeon. La kampanjo estis rapida kaj sukcesa ĉar la floto de Britio ne povis helpi sian alianc-

anon. Portugalio kapitulaciis kaj devis submetiĝi al la ordonoj de Napoleono kaj krome pagi al ĉi tiu altan mon-kompenson. Godojo eltiris el tiu kampanjo nur unu branĉon da oranĝ-arbo, kiun li tuj sendis kiel donaco al la reĝino Maria Ludovikino de Parmo. Tial tiu milita ekspedicio estis nomata “la milito de la oranĝoj”.



La malprestiĝo de Godojo senĉese kreskadis en la lando, kaj tiu ministro pli kaj pli dronis kaj enkotiĝis en tiu alianco kun la franca princo, el kiu li ne kapablis sin liberi. Li prave timis invadon de la francaj armeoj dislokitaj laŭlonge de la limo inter ambaŭ landoj. La 4an de januaro de 1805, estante Napoleono jam imperiestro, oni subskribis en Parizo novan interakordon franca-hispanan por meti la hispanan eskadron subordone de la franca admiralo kun la celo invadi la britan insularon.

Laŭ ordono de Napoleono, la franca floto eliris el la haveno de Tolono subgvide de Villeneŭvo por kuniĝi kun la hispana eskadro subgvide de Gravino. La angla admiralo Nelsono, komandante la britan ŝiparon, traserĉis la Atlantikon celante malhelpi la kuniĝon de ambaŭ aliancitaj eskadroj. Fine li trovis tiujn flotojn antaŭ la kabo Trafalgaro, proksime al la marbordo de Kadizo.



La admiralo Villeneŭvo klopodis apartigi la anglan mararmeon. Post diversaj manovroj, li rifuĝis en la haveno de Kadizo apogite de la hispanaj ŝipoj. Kontraŭ la konsilo de la hispanaj maristoj, la ŝiparo franca-hispana forlasis la havenon la 19an de oktobro, kaj trovis la floton de Nelsono frumatene de la 21a. La batalo komenciĝis tagmeze. Unu horon kaj duono poste mortis la angla admiralo Nelsono. Kelkaj francaj ŝipoj fuĝis el la batalo kontraŭante la ordonojn de Villeneŭvo. La angla floto, formante du paralelajn kolonojn, atakis perpendikulare la linion de la ŝiparo de Villeneŭvo; tio permesis al la angloj tranĉi la malamikan fronton kaj ĉirkaŭigi kelkajn el ties plej grandaj ŝipoj pere de kelkaj ŝipoj propraj. La spertaj maristoj de la angla floto ankaŭ sciis profiti siafavore la tiam blovantajn ventojn.




Dum la sekvintaj du horoj plejparto el la ĉefaj ŝipoj de la franca-hispana floto estis kapitulaciintaj kaj jam ne plu uzis siajn kanonojn, kaj estis jam mortintaj la hispana admiralo Gravino kaj kelkaj gravaj hispanaj maristoj kiel Galiano kaj Ĉurruko.



Je la sesa horo kaj duono la batalo estis finiĝinta restante la franca-hispana eskadro ĉiusence ruinigita. Iuj ŝipoj estis detruitaj dum la batalo, aliaj restis kaptitaj de la angloj. Pro ŝtormo okazinta en la sekva nokto dronis aliaj ŝipoj kun la vunditoj kiujn ili portis. Nur malmultaj sukcesis reveni al la malbordo de la golfo de Kadizo.

Francio perdis 12 el siaj 18 ŝipoj, kun 3300 mortintoj, pli ol 1200 vunditoj kaj 500 kaptitoj. Anglio havis 450 mortintojn, inter ili la admiralo Nelsono krom 15 gravaj ĉefmaristoj, kaj 1200 vunditojn. Hispanio perdis 10 el siaj 15 ŝipoj, kun 1025 mortintoj, 2500 vunditoj kaj 2500 kaptitoj. Villeneŭvo mortigis sin unu jaron poste.



# La rabisto de Eŭropo

Evidentas ke la problemoj de Hispanio fine de la 18a jarcento kaj komence de la 19a, pri kiuj ni raportas en ĉi paĝoj, estis rekta sekvo de la eventoj tiam okazantaj en Francio: unue la Revolucio kaj poste la Napoleona politiko. Do, por la plej ĝusta kompreno de tiu historia periodo de la hispana lando nepras iome atenti pri tio, kio estis okazante samtempe en la najbara lando. Verdire, la francaj okazintaĵoj, de la jaro 1789 al 1815 (kaj en aliaj, postaj, periodoj) efikis ne nur sur Hispanio sed, ĝenerale, sur tuta Eŭropo. Tiurilate pravas la diraĵo ke ***Kiam ternas Francio, kataras tuta Eŭropo***. Nu, tiuokaze Francio ne nur ternis sed suferis veran pneŭmonion. Disfalis la Antikva Reĝimo de la absolutisma monarĥio kiu, dum pli ol jarmilo, estis intime ligita al la historio de tiu lando kaj de aliaj landoj en Eŭropo. Se tiu politika kataklismo ja estis sufiĉe grava, la afero eĉ pli komplikiĝis pro la fakto ke la Respubliko naskiĝinta el la Revolucio traspertis nefirman kaj krizan situacion kiu kulminis per restarigo de persona povo: Ĉefa Konsulo, Konstanta Konsulo kaj fine Imperiestro. Tiurilate la procezo iamaniere similis al tiu de la antikva Romo: Monarkio, Respubliko kaj Imperio, sed Francio travivis en la daŭro de nur 11 jaroj procezon kiu en Romo okazis laŭlonge de pli ol 700 jaroj. Ankaŭ la daŭro de ambaŭ imperioj respegulas similan diferencon: la Romia imperio daŭris kvin jarcentojn en Okcidento kaj kroman jarmilon en Bizanco, dum la napoleona daŭris nur pluajn 11 jarojn.

Kaj estas ankaŭ aliaj kontrastoj en rilato aŭ komparo al la Romia modelo. Aŭgusto kaj ties unuaj heredintoj apartenis al la aristokrataj, patriciaj kaj riĉaj familioj de la Julioj kaj la Klaŭdioj, tamen la franca imperiestro devenis el humila kaj pleba familio en insulo kiu estis aneksita al la franca regno nur iomete antaŭ lia naskiĝo. Tio, sendube, atestus pri la merito de lia politika kariero se la starigo kaj subteno de lia imperio ne estus postulinta tiom da homa sango –de francoj kaj de aliaj eŭropanoj– kiom iam kostis la establo de la imperio de la Rom-Cezaroj. Tiurilate, ĉi artikolo, krom la titolo kiun ĝi portas: ***La rabisto de Eŭropo***, ankaŭ povus esti titolita: ***La (hom)buĉisto de Eŭropo***.

Ja, ne nur lia imperio sed preskaŭ lia tuta vivo estis signita per sango-verŝado. La Revolucio okazigis la morton de multaj personoj, ni memoru la gilotinon. Bonaparto ne partoprenis en la revolucia perforto en Parizo, sed tamen li, kiel militisto, intervenis, ekde lia junaĝo, en ĉiuj militoj antaŭ, dum kaj post la Revolucio, samkiel dum la Direktorio, dum lia konsuleco kaj dum la daŭro de lia imperio.

Kiam la revolucia armeo reakiris la francan urbon Tolonon, antaŭe okupita de la angla-hispana armeo, oni masakris multajn partianojn de la monarkio. Napoleono partoprenis en tiu milita operacio kaj post ĝi li estis promociita al generalo. Poste, dum la Direktorio, li gvidis militajn kampanjojn en Italio kaj en Egiptujo. Liaj militaj venkoj en tiuj kampanjoj utilis por lia progreso en la politika kariero. Multaj personoj devis morti por ke li prosperu en tiu kariero.

Oni povas diri ke lia imperiestra trono staris sur multaj miloj da mortintoj –tiel amikoj kiel mal-

amikoj– sed post lia atingo de la imperiestra krono la afero estis eĉ pli sanga. Kvankam la starigo de la imperio, fakte, estis perfido al la demokratiaj idealoj de la Revolucio, li, tamen, heredis ĉiujn malamikojn –kaj internajn kaj eksterajn– de la Revolucio. La militoj kiujn li gvidis kiel imperiestro okazigis pliajn mortintojn, vunditojn… Ekzemple, nur triono el la 15.000 francaj maristoj partoprenintaj en la batalo de Trafalgaro revenis iam al Francio. Eĉ pli sango-kostaj estis aliaj kampanjoj, kiel la retreto de la francaj trupoj el Rusio. Por Francio, ĉefe, kaj ĝenerale por tuta Eŭropo, la pasado de Napoleono tra la historio estis vera katastrofo.

Sed krom tiuj malamikoj, iamaniere neeviteblaj, kiujn li devis alfronti, li mem, per sia malprudento, ambicio kaj rabemo, kreis aliajn, kiuj, en aliaj cirkonstancoj, estus restintaj neŭtrale aŭ eĉ amike. Tia estis la kazo de Hispanio. La reĝa familio de tiu lando kaj ties favorato, Godojo, estis facile manipuleblaj de la franca imperiestro, kiel oni konstatis en la realo. Sed la ambicio de Napoleono, pretendante instali sian fraton Josefon en la tronon de tiu lando, vekis la perfortan reagon de la hispana popolo, kio tre komplikis la strategion de Bonaparto kaj tre ege kontribuis ruinigi la nestabilan ekvilibron kiun li pene estis aranĝinta en la Traktato de Tilsito, post liaj venkoj en Jeno, Aŭerstadto kaj Friedlando.

Li tre emis favori sian familion… kiel ĉiuj mafiestroj. Liaj geparencoj tre eltiris profiton el tiu ambicio lia rabi kronojn kaj tronojn en Eŭropo. Kiam li konkeris la regnon de Napolo, en la jaro 1806, li metis sur ties tronon sian fraton Josefon, Poste kiam li aljuĝis al ĉi tiu la hispanan kronon, li nomumis kiel novan regon de Napolo sian bofraton Muraton. Lia alia frato, Ludoviko, ricevis la kronon de Nederlando. En la jaro 1807 li asignis al sia frato Jeronimo la Vestfalian kronon.

## Napoleono Bonaparto



Ĉefa Konsulo



Imperiestro

Decas diri ke liaj gefratoj estis indaj gefratoj de ilia frato. Kiam, en la jaro 1801, la trupoj hispanaj kaj francaj invadis Portugalion en la t.n. ***Milito de la Oranĝoj***, kaj trudis al tiu lando submetiĝon al Napoleono, Luciano, frato de la tiam ankoraŭ Unuaranga Konsulo, ricevis de la Lisbona kortego la diamantojn de la princino de Brazilo. Tiam Portugalio pagadis al Napoleono 25 milionojn da frankoj, el kiuj, 10 milionoj iradis al la privata poŝo de la honesta kaj sobra Konsulo. La monavido de la familio Bonaparto estis senmezura. En la menciita okazo, la sama Luciano ricevis el la hispana reĝo, Karolo la 4a, 20 altvalorajn pentraĵojn, pension da cent mil frankoj kaj pliajn briliantojn. Ankaŭ la generalo Leklerko, bofrato de Napoleono, ricevis grandajn monsumojn kaj tre valorajn juvelojn por lia edzino.

Eble oni povas iome ekskuzi Napoleonon dirante ke plejparto el la viktimoj de lia prirabado –se ne ĉiuj– siavice estis rabistoj kiuj akiris laŭ simile malnobla maniero la povon kaj la monon je kiuj li senigis ilin. Ni traekzamenu, ekzemple, la hispanan kazon, kiu plej koncernas nin. Dum la sesjara okupado de Hispanio fare de la Napoleonaj armeoj, nia lando estis disrabita; ĝi suferis grandan detruon, multaj personoj estis murditaj kaj oni malrespektis niajn aŭtoritatojn kaj niajn politikajn instituciojn. Sed, ĉu estas necese memorigi ke tute simile faris, dum kelkaj jarcentoj, la trupoj de la hispana imperio en granda parto de Eŭropo kaj preskaŭ tuta Amerika kontinento?

La samon oni povas diri pri la rabado de Napoleono al la Papo de Romo kaj al aliaj princoj de Eŭropo. Kelkfoje en la historio okazas tiutipaj eventoj kiuj, ŝajne, obeas ian leĝon de Dia justeco kaj justico. Tiurilate, Napoleono, same ol iam Atilo, laŭŝajne plenumis taskon je skurĝo de Dio.

# Insurekcio de Aranĥuezo



Emanuelo Godojo povis ĝui senprobleme sian komencan etapon kiel valido de la reĝo (kaj de la reĝino). Tiam la princo Ferdinando, heredonto de la hispana krono, estis ankoraŭ infano, kaj la malamo al li de la hispana popolo samkiel la opono de la altrangaj klasoj de la lando estis ankoraŭ malgravaj. Sed iompostiom kreskiĝadis ĉio ĉi: la princo, la popola malamo kaj la politika opono de la nobelaro kaj la armeo-estraro.

Post la malvenko de Trafalgaro la malprestiĝo kaj nepopulareco de la valido tiom estis grandaj en la lando kiom katastrofa kaj ruiniga estis la menciita batalo. Kaj la princo Ferdinando tiom malamis la nekompetentan ministron kiom hontis pri siaj senhonoraj gepatroj. Fariĝis neeviteble ke ĉiuj ĉi faktoroj kuniĝu en komuna fronto kontraŭ la reĝa favorato kaj ties reĝaj gefavorantoj. Krome, la princino Maria Antonia de Habsburgo, unua edzino de la juna princo, estis tre malamika de la ministro Godojo kaj de la reĝino Maria Ludovikino de Parmo, ŝia bopatrino, samkiel partiana de la alianco kun Britio kontraŭ Napoleono.

Godojo konsciis pri sia malpopulareco inter ĉiuj tavoloj de la hispana socio, sed tamen li plu ĝuis la favoron de la gereĝoj. Fakte, ĉi tiuj plu honorigis lin per pliaj titoloj kaj sinekuroj: Prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro, Serenega Alteco... estis altrangigo ankaŭ por sia frato Diego, kiu estis nomumita Duko kaj por sia amantino, kiu ricevis titolon de Grafino. Plej strange kaj groteske estis tio ke oni asignis al Godojo, kiu neniam estis vidinta la maron eĉ ne de malproksime, la titolon de Admiralo de iu mar-armeo kiu jam ne ekzistis ĝuste pro lia politiko.

Sed eĉ pli freneza estis lia tiama pretendo. Li proponis al Napoleono, kiam ĉi tiu estis planante la invadon kaj konkeron de Portugalujo, ke ĉi tiu lando estu dividata laŭ tri partoj, kaj ke unu el ili estu donata kiel princlando al li, al Godojo. La franca imperiestro diplomatece akceptis sed ĉio restis prokrastita kiam formiĝis iu koalicio de Prusio kaj Rusio kontraŭ li. Godojo pensis ke Napoleono estos venkata de tiu koalicio kaj manovris por eltiri profiton el la franca ruiniĝo. Li entreprenis ian rearmiĝon de la lando, materie kaj emocie, sed ne menciante la celon kaj destinon de tiu rearmiĝo. Malfeliĉe por Godojo, Napoleono revenis venkinte en la bataloj de Jeno kaj Friedlando, kaj la Princo de la Paco ne trovis alian manieron repaciĝi kun li ol fariĝi eĉ pli servutema kaj meti ĉiujn rimedojn de la lando je la dispono de la franca imperiestro.

En la jaro 1806 mortis la princino Maria Antonia, edzino de la princo Ferdinando, kaj tiam komencis la intrigoj por elekti la novan princinon. Godojo klopodis ke oni elektu tiucele lian bofratinon, la fratino de lia edzino, la grafino de Ĉinĉono. La princo Ferdinando oponis al tiu edziĝo.

En tiu ĉi kunteksto kaj antaŭ la komenciĝo de la franca-hispana invado al Portugalio por certigi la sieĝon al Britio ekde tiu lando, okazis la tiel nomata “Konspiro de la Eskorialo”. Fine de oktobro de la jaro 1807, Sia Serenega Alteco, la Princo de la Paco, Duko de Alkudio, Prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro kaj Admiralo de la tiam neekzistanta hispana floto, eksciis pri komploto kontraŭ li preparita de la Princo Ferdinando kaj kelkaj altranguloj. Informinte la reĝon pri la afero, ĉi tiu disponis ke la princo estu enfermita en ties ĉambroj en la palaco de la Eskorialo, kie la kortego troviĝis tiam. Oni ellaboris planon por senheredigi la princon, sed la Godojo, mem timante la pliakriĝon de la abomeno de la tuta lando kontraŭ li, konsilis al la reĝo ke la princo estu pardonita, sed ne estis simila indulgo kun la ceteraj membroj de la konspiro.



La Princo Ferdinando

La tiama konduto de la princo Ferdinando montris tre malbonajn ecojn de lia karaktero. Kiam li estis arestita, kaj dum la tagoj antaŭ la pardono al li, li denuncis siajn kunulojn de la konspiro kaj deklaris ke li estis trompita de ili. Al la gereĝoj, liaj gepatroj, li skribis tre humilajn kaj flatajn leterojn petegante la reĝan pardonon kaj permeson kisi la reĝajn piedojn de lia patro.

Ĉi-tiuj okazaĵoj de la Eskorialo influis nenion en la planoj de Napoleono por Hispanio. Sub la preteksto adresiĝi al Portugalujo, la francaj trupoj daŭre eniradis en Hispanion kaj kampadis en ĉi ties teritorio, inkluzive en la kasteloj kaj fortresoj. La hispanaj komandantoj de tiuj fortikaĵoj ricevis ordonojn kunlabori kun la franca armeo. Ankaŭ la popolo kaj iuj aŭtoritatuloj ricevadis amikece la francajn soldatojn pensante ke ili venis por meti sur la hispanan tronon la princon Ferdinandon kaj deponi la malamatan Godojon.

En monato marto de la jaro 1808 la regantaro de Madrido ne havis dubon ke la intenco de Napoleono estis konkeri la tutan Iberian duoninsulon. La reĝa familio de Portugalio jam estis foririntaj el la lando destine al sia kolonio de Brazilo. Godojo konsilis al la gereĝoj de Hispanio ke ili entreprenu similan vojaĝon destine al Meksikio. Survoje al la sudo, cele de enŝipiĝi en Kadizo, la kortego haltis en Aranĥuezo, kie ekzistas iu reĝa palaco. Tie, la 18a de marto okazis la fama insurekcio. La loĝantoj de tiu urbo krom multaj aliaj alvenintaj el la ĉirkaŭaĵoj kaj el Madrido mem, kaj ankaŭ la nobelaro de la kortego kaj eĉ la soldataro de la reĝa gvardio, ĉiuj kune kaj akorde alsaltis la loĝejon de Godojo, kiu devis kaŝiĝi en iun mansardon por ne fali en la manojn de la insurektintojn. Tiunokte la reĝo Karolo la 4a, sub la premo de la cirkonstancoj, nuligis ĉiujn titolojn kaj oficojn de Emanuelo Godojo. Sekvint-matene la eksministro estis malkovrita kaj la homamaso volis linĉi lin. Estis la princo Ferdinando mem kiu trankviligis la amason kaj savis la vivon de Godojo, kiu estis tuj arestita kaj enfermita en la ejon de la palaca gvardio, al kiu iam apartenis li.

Sekve la reĝo Karolo abdikis kaj transdonis la reĝecon de la lando al lia filo, la princo Ferdinando. La eksreĝo skribis poste leteron al Napoleono informante al ĉi tiu pri la lastaj okazaĵoj kaj deklarante ke sia abdiko ne estis laŭvole kaj petante ke li intervenu laŭ lia kriterio en la aferojn de Hispanio kaj ties reĝa familio.


La jubilo estis grandega en Madrido kaj poste en la tuta lando kiam oni sciis pri la elpostenigo de Godojo kaj la abdiko de Karolo la 4a favore al sia filo. Laŭlonge de la sekvintaj tagoj la diversaj ambasadoroj akredititaj en la hispana kortego rekonis la novan monarkon, sed oni atendis vane la rekonon el la franca imperiestro. La afero de Aranĥuezo kaj ties rezulto renversis la planojn de Napoleono por Hispanio.

La nova situacio devigis Napoleonon ellabori strategion por ke la tuta reĝa familio de Hispanio eliru el la lando. Pere de lia ambasadoro en Madrido li invitis al la eksreĝo Karolo kaj al lia edzino adresiĝi al la franca urbo Bajono. Por ke ankaŭ la nova reĝo Ferdinando la 7a akceptu entrepreni saman vojaĝon oni igis lin kredi ke la imperiestro de Francio atendis lin en Bajono por rekoni lin kiel reĝo de Hispanio. Sub tiu fido Ferdinando akceptis iri tien por intervidiĝi kun Napoleono.

# La 2a de majo en Madrido



La 23a de marto, la generalo Marato (franc-lingve skribendas **Murat**), bofrato de la franca imperiestro kaj ties anstataŭanto en Hispanio, envenis en Madridon. Laŭ la strategio de Napoleono, la militista parto jam estis ŝajne plenumita. Mankis nur kulmini la politikan aspekton de la afero, kies lasta celo signifis la ŝangon de dinastio. Fakte, la teniĝo de la kamariloj, tiel tiuj de Godojo kiel tiuj de Ferdinando, asignis al Napoleono la rolon de arbitraciantо de iu situacio el kiu li tiam estis preta eltiri profiton.
Marato, neante la agnoskon de Ferdinando kiel nova reĝo de Hispanio, akcelis la disvolviĝon de la okazintaĵoj. Napoleono deziris ke la reĝa familio de Hispanio ne foriru al Ameriko. Li volis ke la membroj de tiu familio adresiĝu al la franca urbo Bajono, kie li povus legitimi sian propran projekton kiel fina epizodo de la pridinastia afero de Hispanio.
Ferdinando alvenis al Bajono la 20an de aprilo. Godojo, liberigita dank' al la premoj de Marato, prezentiĝis tie la 26an de aprilo. Siavice Karolo kaj sia edzino alvenis la 30an de tiu monato. La cetero el la reĝa familio devus eliri el Madrido la 2an de majo.
Dum la unuaj dek tagoj de majo okazis la t.n. "Abdikoj de Bajono", en iu hontiga etoso de konflikto inter la anoj de la hispana reĝa familio antaŭ Napoleono. La Krono, kiel simbolo de legitimeco, rapide pasis tra kelkaj manoj: Ferdinando la 7a redonis ĝin al Karolo la 4a, ĉi-tiu abdikis favore al Napoleno, kiu siavice elektis sian fraton Josefon, kiu, post longa dubado, akceptis ĝin la 6an de junio. Josefo la 1a estis la nova monarĥo de iu lando kiu tiele estus enmetita en la familian reton de satelitaj ŝtatoj kiun la imperiestro estis dezajninta por Eŭropo.
La 2an de majo la okazaĵoj en Madrido fiaskigis la strategion de dinastia anstataŭo de Napoleono. Iu neatendita popola ribelo komencis la rezistadon kiu estos evoluinta al longa milito konceptita kaj perceptita kiel milito de nacia sendependeco. Per la 2a de majo fiaskis la ĝenerala projekto de Napoleono bazita sur dinastia ŝanĝo, kies simbolo estis la eniro de Marato en Madridon kaj ĝia logistiko la militista okupado de la strategiaj lokoj de la hispana teritorio. Prave la historio asignis al ĉi tiuj eventoj la karakteron de nacia epopeo.
Antaŭ sia eliro destine al Bajono, Fernando la 7a lasis iun nomatan Regantar-Konsilion prezidita de lia onklo la infanto Antonio, kiu, poste, submetiĝis al Murato kaj kunlaboris en la eliro de la lastaj membroj de la reĝa familio destine al Francio, ĉefe la dekdu-jara infanto Francisko Paŭlo. La premo de Marato la 1an de majo submetis la



La abdikoj de Bajono

malfortan oponon de la Konsilio.
Tiuj aferoj transcendis al la popolo en tagon kiam en la urbo troviĝis multaj personoj de ekstere ĉar estis tago de merkato. Tial, matene de la 2a de majo, grupoj da urbanoj kaj vilaĝanoj kuniĝis antaŭ la pordoj de la reĝa palaco. Tiam estis jam tre disvastigita la ideo de la «sekvestro» de la reĝa familio kaj de la «franca trompo». En la popola menso, la eliro de la reĝa familio estis kvazaŭ simbolo de vakuo. La popola mobilizo de la urbo estis instigita de la palacaj servistoj, kiuj, kriinte «perfido», provokis egan tumulton kiu malpermesis la eliron de la sekvantaro.
La respondo de Marato estis tre perforta. Li uzis du kanonojn kaj multenombran soldataron por dispeli la hom-amason, efektivigante la buĉadon, ĉefe, inter la palacaj servistoj. De tiu momento la tumulto fariĝis ĝenerala ribelo kaj etendiĝis ekde la palaca placo al la tuta urbo. Rapide ĉiuj madridaj loĝantoj, jam sufiĉe ĉagrenitaj pro la teniĝo de la francaj trupoj, eksciis pri la okazaĵo. La ĉeesto de la francoj estis jam interpretita kiel invado kaj la kunlaborado kun ili kiel perfido.
La rapida interveno de la francaj trupoj indikas ke ili estis preparitaj por alfronti tiajn eventojn. Ilia strategia kampado ekstere de la ĉefurbo, ĉirkaŭante ĝin, atestas pri la antaŭvido je iu ebla malordo. Post malmulte da tempo Marato disponis je 30.000 soldatoj en Madrido.
La homamaso estis pelita al alian lokon, kiu fariĝus, ankaŭ ĝi, simbolo de la okazaĵoj de ĉi tiu tago: la SunPorda Placo. Tie okazis la ĉefa batalo inter tiel malegalaj fortoj, el kiu rezultis multaj viktimoj inter la civila loĝantaro. Dume, la hispanaj garnizonoj de la ĉefurbo restis pasivaj. Ili konsistis je proksimume 3.000 soldatoj, kiuj restis konsignitaj laŭ la ordonoj de la Generalo Ka-



Kontraŭfranca rezisto de la madridaj gepopolanoj




Kontraŭfranca rezisto de iuj madridaj garnizonoj

pitano Francisco Javiero Negreto. Same ol la teniĝo de la Regantar-Konsilio —iuj el kies membroj, kiel Azanzo kaj O'Farrilo, partoprenus en la registaro de la estonta Josefo la 1a— kaj de la Kastilia Konsilio, timigitaj de la graveco de la popola ribelo, apelaciante al la kvietiĝo kaj kunlaborado. Samtempe la singardemaj elitoj da korteganoj kaj aristokratoj provis navigi baborborden kaj triborborden: iliaj servistoj batalis en la stratoj, sed ili ankaŭ rigarde esploris la horizonton de Bajono, kien multaj el ili aliros laŭlonge de la sekvinta monato junio.

Post la SunPordo la ejo de la konflikto translokiĝis al la kazernoj de Monteleono. Tie la popola ribelo estis helpita de escepta kunlaboro de iuj oficiroj kiuj ne sekvis la pasivan tendencon de plejparto el la hispanaj garnizonoj. Estis heroaj scenoj de militista rezisto lideritaj de la oficiroj Daoizo, Velardo, Gojkoeceo kaj Ruizo. Vespere la militista supereco de la francoj supervenkis la reziston. Tiam komenciĝis feroca subpremo, inter la 2a kaj la 5a de majo, kiu vekis kaj provokis serion da ribeloj en la tuta lando.

La rezistado transcendis la limojn de la ĉefurbo. Napoleono ne atendis tiun gravecon de la popola respondo. La 2a de majo signifis la fiaskon de la militista puĉo kiel decida ilo en la procezo de dinastia anstataŭo. Eble lia granda eraro en la hispana afero estis la uzado de la forto kaj ne eluzi la diplomatian negocadon aŭ la eblecojn provizitajn de la politika krizo en la sino de la Borbona familio kaj en la hispana kortego. Evidentas ke li ne pensis ke povus esti tiom malfacila kaj altkosta ŝanĝi la sistemon de tiu ĉi lando kun koruptema ministro, nekapabla reĝo kaj iu diboĉema reĝino. Kaj estas evidenta ankaŭ ke Napoleono subtaksis la respondo-kapablon de la hispana popolo.

Kiam li ricevis en Bajono informon pri la okazintaĵoj de la 2a de majo en Madrido, li tre surpriziĝis kaj furioziĝis, konstatante la nacian senton en la Iberia duoninsulo. Kaj konstatis ankaŭ la mallertecon de Marato en la demarŝado de la hispana afero kaj en ties emo sin postuli kiel kandidato al la trono de Hispanio.

Napoleono ankaŭ ne komprenis tiun rifuzon de popolo kiun la raportoj de la vojaĝantoj kaj la informoj de la diplomatiistoj situigis en la sojlo de la subevoluo kaj la neklereco. En la menso de la Imperiestro estis naskiĝinta la ideo esti savanto kaj reformanto de Hispanio, laŭ la skemoj de la Klerismo de la 18a jarcento en kiuj oni povas enkadrigi lin.




Masakrado de la madridaj rezistantoj



# Asturio kontraŭ Napoleono



La gravaj eventoj de la 2a de majo-1808 en Madrido generis en la tuta lando spontanan reagon kontraŭ la entrudo de la francoj. Asturio havas la honoron esti la unua regiono kie oni iniciatis organizitajn politikajn kaj militajn formojn de rezisto kontraŭ la ĉeesto de la francaj trupoj.
En ĉi tiu regiono la kontraŭ-Napoleona milito havis ĝeneralajn karakteraĵojn similajn al tiuj de la cetero el la lando, sed samtempe havis ankaŭ ion specifan: krom milito por la tutlanda sendependeco, ĉi tie estis ankaŭ la komenciĝo de la burĝa revolucio. Ja, samtempe ol batali favore al la reveno de la reĝo Ferdinando la 7a, en Asturio la sama batalado estis ankaŭ kontraŭ la malnova ordo, la Antikva Reĝimo.
En Oviedo kaj Ĥiĥono (Gijón), la akra popola plendado, tuj post la ekscio de la okazaĵoj de la 2a de majo en Madrido, adresiĝis unuavice kontraŭ la tradiciaj aŭtoritatoj, kiuj subtenadis la juran legalecon kiu asignis al Josefo Bonaparto la reĝecon de la lando.
La popola mobilizo prenis formon en Oviedo la 9an de majo, kiam la oficialaj regionaj aŭtoritatoj esprimis sian intencon plenumi la ordonojn de la Kastilia Konsilio. La popolaj disturboj okazintaj en tiu ĉefurbo kaj en Ĥiĥono estis la starpunkto de movado kiu, iompostiom estis artikigita kaj orientita de nova politika organizaĵo –la Provinca Konsilantaro de Asturio– kiu ĵuris fidelecon al la enprizonita monarko Ferdinando la 7a, kaj deklaris la militon al Francio. Tiu institucio estis vere revolucia laŭsence ke ĝi poziciiĝis kontraŭ la Antikva Reĝimo kaj alprenis suverenan povon.
La unua guberniestro de tiu Konsilio estis Alvaro Flórez Estrada. Inter la disponoj prenitaj de tiu Konsilio estis la armigo de 18.000 homoj por la defendo kontraŭ la francaj trupoj, kaj la sendo, la 24a de majo, de diplomatiaj reprezentantoj al Anglio (Andrés de la Vega Infanzón kaj la vicgrafo de Matarroso) mendante helpon por la batalo kontraŭ la napoleona invado de Hispanio. En la sama tago, la 24an de majo, granda homamaso da asturianoj alsaltis la fabrikon de armiloj de Oviedo por sin provizi je fusiloj por la batalado kontraŭ la invadintoj.
Poste, kiam en la cetero el la lando oni organizis similajn instituciojn, kiel la Suprema Centra Konsilio, Asturio sendis al ĝi siajn reprezentantojn: Jovellanos kaj la markizo de Kamposagrado.
La disvolviĝo de la milito en Asturio havis grandan similecon kun tiu disvolvita en la cetero el la lando, eĉ en tio koncernanta al la ekzistado de gerilanoj. Post pluraj avancoj kaj retretoj, la francaj trupoj forlasis definitive la regionon en la somero de la jaro 1812, proksimume du jarojn antaŭ la finiĝo de la milito landskale.

# Novtipaj politikaj institucioj: la Konsilioj

La monarĥoj fore, la lando invadita de eksterlanda potenco, la oficialaj institucioj senkreditiĝintaj pro ties kunlaboro kun la invadinto… Temis pri neatendita, antaŭe nekonata, situacio kiu nepre devus krizigi la konscion de la lando pri si mem.
Tuj post la ekkono de la sangaj okazaĵoj de Madrido, en multaj lokoj de la hispana geografio estis spontana reago kuntraŭ la francaj entrudintoj. Fariĝis simbolo de ĉiuj la kiĥota, kortuŝa kaj heroa proklamo de la urbestroj de la vilaĝeto Mostoleso, kiuj, la saman 2an de majo, deklaris la militon al Napoleono.
La lando, do, devis organiziĝi startante de nulo en la politika kaj administra terenoj, kaj tio sub la urĝo de preparado de milito kontraŭ forta imperio kiu jam estis militiste okupinta grandparton el la landa teritorio. En tia drameca kunteksto la genio de la hispana popolo kapablis koncepti kaj ekfunkciigi novtipajn politikajn organizaĵojn: la t.n. "Konsilioj" aŭ "Konsilantaroj", vortoj per kiuj en Esperanto ni tradukas la hispanan vorton "Juntas". La unua el tiuj provincaj aŭ regionaj ***Juntas*** aŭ Konsilioj estis tiu de Asturio, kiu formiĝis jam ĝuste unu semajno post la eventoj de Madrido. Ekde tiu ĉi regiono oni incitis kaj kunlaboris en la starigo de similaj institucioj en la apudlimaj regionoj: Galegio, Leono… Iompostiome, en la parto de Hispanio ne kontrolata de la franca armeo: Valladolido, Avilo, Zamoro, Seviljo, Bada-ĥozo, Kadizo… instituiĝis tiutipaj Konsilioj.



Urbestro de Mostoleso

Oni devas klarigi, tamen, ke en iuj el tiuj provincoj la situacio estis iom konfuza ĉar, dum la popolo plejamase poziciiĝis kontraŭ la reĝo Josefo Bonaparto, la oficialaj aŭtoritatoj agnoskis lin kaj eĉ sendis deputitojn al la Korteso (Parlamento) kunvokita de Napoleono en Bajono. Simile okazis en la hispana armeo. La generalo Kastanjo (Castaños) estis la sola alta armeestro kiu rekonis la aŭtoritaton de la Konsilioj kaj metis sin je la ordonoj de la Konsilio de Seviljo. Alia superulo, la generalo Solano iris el Kadizo al Seviljo por konvinki lin ne kunlabori kun la ribeluloj. Kiam tiu Solano publikigis proklamon favore al la reĝo Josefo, la popolamaso linĉis lin kaj la garnizono ne intervenis liafavore. Ankaŭ tio ĉi estas simbolo de la tiama situacio en Hispanio.
Ankaŭ en Kartaĥeno oni elpostenigis la militistan komandanton. Albaceto, tamen estis escepto; tie oni daŭre obeis la ordonojn el la oficialaj aŭtoritatoj de Madrido. Ankaŭ Valencio estis escepto sed de alia signo. Tie la oficialaj aŭtoritatoj, post longa pridubado kaj cedante al la popola premo, sin deklaris favore al Ferdinando la 7a kaj gvidis la armiĝon por batali kontraŭ la francoj. Pli kurioza estis la kazo de Katalunio; tie formiĝis la kontraŭfrancaj Konsilioj eĉ estante la teritorio kaj la fortresoj sub la kontrolo de la franca armeo. Io simila okazis ankaŭ en Aragono.
Poste, ĉiuj ĉi Konsilioj kunordiĝis inter si por doni al la lando unuecan gvidon, konkretiĝinta en la Korteso de Kadizo, kiu meritas apartan atenton kaj priraporton.
Ĉi-tiu priskribo de la provincaj kaj regionaj Konsilioj ne povas esti finita sen ekspliki la koncernan situacion en la Amerikaj kolonioj. Ni ne forgesu ke Hispanio estis tiam la metropolo de granda kolonia imperio.
Tie la cirkonstancoj tre estis malsimiliaj al tiuj de la Eŭropa Hispanio, t.e. la franca armeo ne havis nek povus havi tie ian ajn ĉeeston. Por la tieaj loĝantoj la afero estis nur ĉu akcepti aŭ ne la disponojn, favore al Josefo la 1a, de la oficialaj organoj: Ŝtata Konsilio kaj Kastilia Konsilio, submetitaj al la franca povo.
La popola reago estis tute same ol en la metropolo. Oni rifuzis agnoski la fraton de Napoleono kiel reĝon kaj oni formis ribelajn Konsiliojn por la administrado de la teritorioj. Sed, eĉ sen la intenco je sendependiĝo el Hispanio, tiuj Konsilioj estis embrioj de ŝtata regantaro. Fakte, tiuj teritorioj sin deklaris, kaj devis funkciadi, sendepende de la francema regantaro de Madrido. Laŭteorie tiuj kolonioj daŭre agnoskis la reĝecon de Ferdinando la 7a, kaj ili sendis poste deputitojn al la Korteso de Kadizo, sed la semo de la senpendiĝo ekĝermis de tiam kaj konkretiĝadis poste, pro diversaj historiaj kaŭzoj (inter ili la volo de Ferdinando restarigi la absolutismon), laŭlonge de la 19a jarcento, sed tio… estas alia historio.

# La reĝo Josefo. La Konstitucio de Bajono

En monato junio-1808, dum la geeksreĝoj Karolo kaj Maria Ludovikino de Parmo, akompanitaj de Godojo kaj 200 servistoj, instaliĝis en Palaco kiun disponigis al ili Napoleono en Fontaineblo, kaj iliaj filoj Ferdinando kaj Karlo, kune kun aliaj geparencoj estis instalitaj en alia palaco en Valenco (Valençay). Josefo la 1ª, nova reĝo de Hispanio per la graco de Napoleono, adresiĝis al sia regno.

Stulta li ja ne estis. Tiam, en letero al sia imperiestra frato, li priskribis sian situacion tiele: ***Malamikas al mi nacio je 12 milionoj da enloĝantoj, kuraĝaj, ekstreme furiozaj. Oni publike parolas pri murdi min sed tiu ne estas mia timo. Ĉio farita ĉi tie la 2an de majo estas abomeninda. La honestuloj ne estimas min pli ol la friponoj. Ne, Siro, via Moŝto eraras: via gloro dronos en Hispanio.*** Kaj en alia skribaĵo li aldonas: ***Mi havas ĉi tie eĉ ne unu solan partianon.***

Pri ĉi-tio lasta li ne estis tute prava. Estis en Hispanio liaserve partio da valoraj kaj kompetentaj kunlaborantoj en la registaro kaj en la institucioj, kiuj servis lin kiel ministroj kaj funkciuloj, ĉu pro patriotismo, inteligenta modernismo, oportunismo, timo... Tiuj personoj estis konataj en Hispanio kiel franciemuloj aŭ francigitoj.



Josefo Bonaparto

Franciemaj estis ankaŭ tiuj kiuj aliris al Bajono por pridiskuti la Konstitucion por Hispanio proponitan de Napoleono. Verdire, neniu pridiskutis ion; oni aprobis la konstitucion ellaboritan de Napoleono kaj ties spertuloj. Tiu Ĉarto, kiun oni neniam aplikis poste –pro la cirkonstancoj kaj la evoluo de la situacio–, ne estis malbona leĝaro por la epoko kiam oni faris ĝin kaj por lando, kia Hispanio, kiu de antaŭ longe estis submetita al reĝa absolutismo. Ĝi establis egalecon inter la regatoj de Hispanio kaj tiuj de la kolonioj, ankaŭ la sendependecon de la juĝa povo, la unuecon de la leĝaro eĉ se respektante la tradiciajn leĝarojn (fueros), ekzistantaj en iuj regionoj. Tiu konstitucio estis inspirita en la ideаro de la Klerismo (Ilustración), tiom laŭmoda en tiu epoko. Napoleono mem povas esti konsiderata kiel kler(ism)a despoto. La devizo de la sekvantoj de tiu doktrino estis labori favore al la popolo sed kalkulante nenion kun la popolo.

La 8an de julio, post ĵuri kiel Reĝo kaj ricevi la ĵuron de la deputitoj, Josefo la Unua nomumis sian unuan registaron. La elektitaj ministroj estis tiutipaj adeptoj de la Klerismo. Ĉiuj elektitoj akceptis la oficon escepte la ĥiĥonano Jovellanos. Li preferis apogi la reĝon Ferdinandon. La klerisma movado estis tiam dividita inter la franciemaj, kiuj apogis Josefon Bonaparton kaj tiuj aliaj, kiuj, ekde la Regionaj Konsilioj gvidis la batalon favore al Ferdinando kaj poste, ekde la Korteso de Kadizo, ellaboris alian konstitucion por Hispanio.

Nuntempe, kun la perspektivo de la du jarcentoj pasintaj ekde tiu epoko kaj la kono kiun ni havas pri la disvolviĝo de tiu konflikto, estas tendenco juĝi severe la poziciîgon de la t.n. francigitoj aŭ franciemuloj, kiuj apogis la uzurpadon fare la Bonapartoj kaj kunlaboris kun ili en la regado de Hispanio. Sed oni povas kompreni ilian vidpunkton. La stariĝo de la nova dinastio tre similis al tio okazinta unu jarcento antaŭe, kiam la Borbonoj anstataŭis en ĉi tiu lando la ĝis tiam regintajn Habsburgojn. Krome tiuj Bonapartoj, kiel personoj kaj kiel regantoj, valoris pli ol la lastaj Borbonoj de Hispanio.

La 25a de julio, festo de Sankta Jakobo, patrono de Hispanio, estis en Madrido la solena ceremonio de la kronado de la reĝo Josefo. En tiu epoko la informoj iris tre malrapide, pro tio tiutage oni ankoraŭ ne sciis en la kortego ke, ĝuste unu semajnon antaŭe, iu franca armeo suferis gravan malvenkon en Bajleno en batalo kontraŭ hispana armeo. Kiam, post kromaj kvin tagoj, alvenis sciigon pri tiu evento, la frato de la imperiestro de Francio tuj forlasis la hispanan ĉefurbon kaj ekkuris norden, al la proksimaĵoj de la franca landlimo, kie estis pliaj napoleonaj armeoj.



# Batalo de Bajleno

Por submeti la ribelulojn, kiuj, en diversaj zonoj de la lando rifuzis agnoski kiel reĝon de Hispanio la fraton de Napoleono, ĉi lasta planis milititstajn operaciojn kies strategio estis kapti kaj la provincajn ĉefurbojn pere de armeaj kolonoj kaj kontroli ekde tiuj punktoj la koncernan teritorion.
Oni povas diri ke tiu plano bone rezultis al li en kelkaj lokoj en la centro kaj la nordo de la lando: Valladolido, Kantabrio… la francaj trupoj ankaŭ venkis, en Valdekuevo (Medino de Rioseko) iun relative potencan armeon, tien alveninta ekde Galegio. Tiu estis la unua vera batalo de tiu ĉi milito.
Tamen la menciita strategio fiaskis en aliaj lokoj, ekzemple, la urbo Zaragozo rezistis, kaj tiam komenciĝis la unua el la du grandaj sieĝoj, kiujn tiu regiona ĉefurbo suferis dum tiu ĉi milito. Pli malbone rezultis al la francaj trupoj en la kataluna teritorio; la tiea kolono de la napoleona armeo estis sub konstanta atakado fare de kombinitaj patroloj de gerilanoj kaj soldatoj, kaj fine estis tranĉita ĝian ariergarda vojo de komunikado kun Francio. Napoleono devis sendi tien novan kolonon je 8.000 soldatoj. Dume alia kolono je 9.000 soldatoj sukcesis alveni ĝis la urbo Valencio kaj atakis dufoje ties fortikaĵojn. Sed la atankantojn suferis hom-perdon kaj damaĝon kaj devis retreti sen atingi la celon.
Sed la plej granda bato, de militista, strategia, politika kaj psikologia vidpunkto, kiun ricevis la franca armeo en tiu ĉi etapo de la milito, kaj eble en la tuta milito, okazis en la sudo de la lando. Ĝi estis la tiel nomita Batalo de Bajleno.
La kolono je 20.000 soldatoj kiu marŝadis suden, komandita de Marŝalo Diponto (Dupont) celis alveni ĝis Kadizo por liberigi la francan eskadron, kiu troviĝis enfermita en la tiea golfeto. Napoleono bezonis tiun floton por alfronti la anglojn perŝipe. Sen tiuj ŝipoj li ne povus subteni siajn armeojn, kiuj okupadis la ŝlosil-lokojn de Portugalio.
La Konsilioj de la sudo de Hispanio rekrutis, organizis kaj ekipis armeon, kies komandon oni asignis al la generalo Kastanjo. Marŝalo Diponto entreprenis la enmarŝadon en la Andaluzian regionon kontraŭ ĉiuj reguloj de la militista scienco. Li iompostiome malproksimiĝis el siaj bazoj ne posedante rimedojn por subteni la komunikadon nek por defendi sian ariergardon. Li devis mendi helpo-trupojn al la generalo Savarjo, kiu anstataŭis Maraton kiel ĝenerala reprezentanto de la imperiestro en Hispanio. Post venki kelkajn malfacilaĵojn, la armeo de Diponto alvenis al Kordovo la 7an de junio. Tie la francaj trupoj dediĉiĝis al senbrida rabado dum preskaŭ dek tagoj. La frukto de la rabado tiome estis granda ke estis necese al ili, por ĝin transporti, aldoni al la konvojo pliajn 500 ĉarojn, kiujn ili ŝarĝis per ĉiuspecaj trezoroj kaj utilaĵoj. Disvastiĝinte tra tuta Andaluzio la scio pri tio, pliiĝis la malamo kontraŭ la invadintoj.

Konstatinte tion, la generalo Kastanjo organizis siajn fortojn por operi kontraŭ la armeo de Diponto, kiu restis neaktiva dum preskaŭ tuta monato en la ĉirkaŭaĵoj de Anduĥaro.
Marato, antaŭ sia foriro el Madrido, la 4an de junio, estis dirinta al Diponto: ***La unua kanon-pafo kiun vi faros sur tiuj mizeruloj devas redoni trankvilecon al tuta Andaluzio, kaj mi preskaŭ dirus al tuta Hispanio.***
Lia eraro estis kompleta, ĉar tiuj kanon-pafoj rezultis esti milit-signalo kiu ekmovigis la preskaŭ solajn laŭregulajn unuojn de la armeo de la Antikva Reĝimo kiuj ankoraŭ konservadis spiriton, organizon kaj gvidantaron. Al tiuj regimentoj aldoniĝis 2.000 volontuloj, kaj kromaj 12.000 estis rifuzitaj ĉar mankis al ili prepariĝo. En Granado formiĝis alia armeo-korpuso je 10.000 soldatoj de la provinco kaj Malago komanditaj de la sviso Redingo, kiu reunuiĝis kun Kastanjo. Do, ĉi-tiu generalo komandis 33.000 soldatojn, 2.000 el ili estis de kavalerio.
Diponto, kun la aliĝo de la divizio de la generalo Vedelo kaj la helpo-trupoj de la regimento de dragonoj pasis tra La-Karolino kaj instalis sian ĉef-stabejon en Bajleno. El tie eliris iu kolono por disrabi Ĥaenon (Jaén) same ol ili estis farinte en Kordovo.
Kastanjo, siaflanke, distribuis sian armeon en kvar diviziojn komanditajn de la generaloj grafo de Kompinjo (Compigny), Redingo, Joneso kaj La-Penjo (La Peña). Sia batal-plano estis preparita kun la generalo Moreno kaj ŝajnas ke ĝi estis multe pli trafa, laŭ la militistaj fakuloj, ol ties de Diponto, kiu estis dividinta siajn 20.000 soldatojn en tri grupojn, en Anduĥaro, Bajleno kaj La-Karolino, disperso de efektivaj fortoj kiu rezultis fatala en la batalo.
La strategio aplikita estis tranĉi ĉiun ligon inter la fortoj de Diponto kaj tiuj de Vedelo, peli ĉi-tiun al la nordo kaj ataki ambaŭflanke de la korpuso en Anduĥaro.
La 13a de julio komenciĝis la operacio. Tiam estis ega varmo en tiu regiono de Andaluzio. La hispanaj trupoj okupis la vilaĝojn Mengibaro kaj Villanovo, dum Vedelo retiriĝis por reunuiĝi kun Diponto.



Ekde la komenciĝo de la batalo prenis la iniciativon la hispana armeo. Ŝajnas ke la avantaĝo de la pozicioj de la hispanaj trupoj, laŭ la plano ellaborita de Moreno, estis decida por atingi la finan venkon. Diponto frakasiĝis tra sinsekvaj alsaltoj kontraŭ la linioj de la armeo de Kastanjo.
Iomete post la tagmezo de la 19a de julio, la franca marŝalo mendis milit-paŭzon, preta al la evakuo el Andaluzio. Komence Redingo sin oponis al la akordo. Fine Kastanjo akceptis kondiĉe ke la venkita armeo revenu al Francio marvoje kaj ne plu revenu por batali en Hispanio. Poste estis subskribita en Bajleno la totala kapitulaco: tuta armeo-korpo kapitulacis kun armiloj kaj ekipaĵo, pli ol 17.000 soldatoj, iu eksterordinara novaĵo en la Eŭropo de Napoleono. Menciinde estas tio ke en tiu batalo distingiĝis Josefo-San-Martino, la estonta liberiganto de Argentino, Ĉilio kaj Peruo, kiu tiam estis jam iu veterana oficiro de la hispana armeo.
Hontinde, la Konsilio de Andaluzio ne plenumis la kondiĉojn de la kapitulaco de Bajleno. La francaj militkaptitoj ne revenis al sia lando; ili estis senditaj al la insulo Kabrero, kaj restis tie en tre penigaj kondiĉoj ĝis la fino de la milito, sed preskaŭ duono el ili mortis tie.
Sekve de la rezulto de tiu batalo la francaj trupoj en Hispanio devis retiriĝi malantaŭ la linio de la rivero Ebro kaj decidis la kapitulacon de Junoto en Cintro (Portugalio) la 30a de aŭgusto kiam restis izolita la franca armeo operacianta ĉe Lisbono.
Sed tiu venko havis ankaŭ malbonan rezulton por la hispanoj ĉar igis ilin pensi ke la hispanaj trupoj kapablis konkuri kun la franca armearo de Napoleono en la batalkampo. Baldaŭ la propra imperiestro montrus kiom senbaza estis tiu revo.
Ĉiukaze la psikologiaj sekvoj estis gravaj. La venko stimulis en la hispanoj la spiriton kaj la volon je rezisto, kaj en tuta Eŭropo, ĝis tiam senkuraĝigita pro la nevenkeblo de Napoleono, renaskiĝis la batalanimo. Baldaŭ komenciĝis en Aŭstrio nova preparado por rekomenci la militon kontraŭ la franca Imperiestro. La angloj komprenis la intereson helpi la hispanojn kiel vojo por alveni al la definitiva venko sur Napoleono.

# Napoleono en Hispanio



La reago de la francoj al ilia malvenko en Bajleno estis retiriĝi al la linio de la rivero Ebro. La reĝo Jozefo mem forlasis sian ĵusformitan kortegon de Madrido kaj alkuris rifuĝi malantaŭ tiu linio. En la Hispanio kiu kontraŭrezistis la invadon ekregis ĝojego kaj optimismo. Bajleno estis granda bato al la prestiĝo kaj al la politika situacio de Napoleono en Eŭropo kaj tiele perceptis ĝin la mperiestro mem. La eŭropaj regantaroj komprenis ke la franca Granda Armeo ne estis nevenkebla, kaj la mesaĝo de Hispanio signifis ke oni povis kontraŭ-rezisti la rabiston de Eŭropo. Sur la milita tereno la rezultoj estis la fiasko de la francaj trupoj en Portugalio, kiu konkretiĝis dum la monatoj post la batalo de Bajleno, kaj ĉefe, la ĉeso de la sieĝo de la franca armeo al Girono kaj Zaragozo. Gvidis la reziston de tiu urbo la general Palafokso (Palafox).

La retiriĝo de la kortego de la reĝo Jozefo el Madrido permesis la reakiron de la ĉefurbo fare de la hispana armeo kaj la tiean kunvenon de reprezentantoj de ĉiuj Konsilioj formitaj en la lando, kiuj, la 25an de septembro, en la reĝa palaco de Aranĥuezo, decidis krei iun politikan enton kun jurisdikcio por la tuta lando (kaj ties kolonia imperio). Tiu organizaĵo nomiĝis: Centra Supera Konsilio por la Regado de la regno. Kiel estro de tiu Konsilio estis elektita la grafo Floridablanko, kiu estis ĉefministro dum la reĝadoj de Karolo la 3a kaj Karolo la 4a.

Napoleono decidis aliri li mem al Hispanio komandante sian Grandan Armeon. Por tion fari, li devis fari novan rekrutadon de junaj francoj kaj retiri trupojn el Italio kaj diversaj lokoj de centra Eŭropo, ĉefe Prusio, kio malfortigis sian strategian pozicion en la kontinento. Li devis ankaŭ alveni al nova akordo kun la rusa Caro, kion li faris en Erfurto la 12an de oktobro de la jaro 1808. Tiu akordo estis pli favora al la rusoj ol tiu antaŭa de Tilsito, kio respegulas la malfortiĝo de la negockapablo de la Imperiestro de Francio.

Sed tio permesis al ĉi tiu entrepreni sian marŝadon sur Hispanio, fine de oktobro, komandante pli ol 150.000 novajn soldatojn, kiuj aldoniĝis al tiuj jam batalantaj en tiu ĉi lando ekde la antaŭa jaro. La imperiestro dividis tiun grandan armearon en sep armeo-korpojn subgvide de siaj marŝaloj: (Saint-Cyr, Lannes, Lefebvre, Mortier, Ney, Soult kaj Victor). Plejparto el ili estis destinitaj plifortigi la francajn trupojn retretitajn en la linio de la Ebro-rivero. Dume iu duaranga kolono komandita de Sajntciro (Saint-Cyr) penetris tra la kataluna landlimo.

## Napoleono batalas en Hispanio kaj rekonkeras Madridon

La hispana armeo, post la venko de Bajleno, estis formita de tri ĉefaj korpoj: iu subgvide de Joakimo Blako (Joaquín Blake, hispano irland-devena) kun bazo en Espinoso de la Monteroj, tiu centra, komandita de Kastanjo, la venkinto de Bajleno, lokita sude de la rivero Ebro, kaj la alia subordone de la generalo Viveso, kun bazo en Katalunio. Krome estis iu rezerva armeo estrita de Palafokso, kaj kroma malgranda armeo en Ekstremaduro kies ĉefo estis la generalo Galluzo, entute 216.000 soldatoj. Napoleono disponis je 300.000 soldatoj kuniĝinte la noval-venintojn kun la jam batalantaj en la hispaniaj frontoj. Sed la vera supereco de la franca armeo sur la hispana estis la sperto kaj trejniĝo de la komandantoj kaj de la soldatoj mem krom la kvanto kaj kvalito de la armilaro.
La strategio de la hispanoj evidentigas ian ne-kredeblan optimismon. Ili pretendis tranĉi la retiriĝon al Francio de la napoleonaj armeoj instalitaj laŭ la linio de la rivero Ebro. Cele de atingi tion oni entreprenis ofensivon, subgvide de Blako, direkte al Bilbao kaj Kantabrio, kaj alia, subgvide de Palafokso, direkte al la Pirinea montaro. Tia strategio baziĝis sur ne-realaj supozoj. Unue estis la supozo ke la franca armeo celas retiriĝon, kio ne estis reala, fakte Napoleono estis venanta kun pliaj fortoj por daŭrigi la konkeradon de tuta Iberia duoninsulo. Due, estis ankaŭ la supozo ke la hispanaj fortoj kapablus sieĝi, venki kaj kapti la francajn armeojn, kiel okazis en Bajleno, kaj ankaŭ tio estis nereala.
Vidante tiun strategion, Napoleono ĝojis ĉar tia-maniere la hispanaj trupoj malproksimiĝis el la fronto de la Ebro-rivero kaj tiel li povus ataki iliajn flankojn. Li planis liberigi por siaj kolonoj la vojon al Burgoso por starigi tie sian ĉef-stabon kaj prepari la ofensivon direkte al Madrido.
Blako estis venkita de la marŝalo Lefebvro en Zorrozo kaj Espinoso de la Monteroj, kaj devis retreti al Reinoso. En tiu batalo Hispanio perdis pli ol 3.000 soldatojn, kaj multaj aliaj disiĝis, tia-maniere ke li perdis du trionojn el siaj efektivoj. Sed tiam okazis io ne-atendita. Multaj el tiuj soldatoj kiuj forlasis la armeajn kolonojn, tamen, ne forlasis la bataladon kontraŭ la francaj invadintoj. Ili dediĉiĝis batali laŭ sia propra iniciato kaj kriterio. Aperis tiele la unuaj geriloj, al kiuj poste aldoniĝis ankaŭ vilaĝanoj kaj ĉiutipaj batalantoj, kaj kiuj ludos gravan rolon en la batalado de la sekvintaj jaroj kontraŭ la napoleona imperio.
Dum la armeo komandita de la generalo Kastanjo batalis kontraŭ la armera korpo komandita de marŝalo Soulto en Gamonalo, kaj la ceteraj hispanaj fortoj batalis kontraŭ aliaj francaj kolonoj en diversaj lokoj de la nordo de la lando, la avangardo de la imperia armeo progresis direkte al Madrido. La Supera Konsilio forlasis Aranĥuezon kaj instaliĝis en Seviljo.
Sen multaj militistaj efektivoj, Madrido povis oponi nur malgrandan reziston al la trupoj de Napoleono, kiu eniris en la urbon post ties kapitulaco laŭ ne tre malmolaj kondiĉoj. Dume la diversaj francaj armeoj venkis la hispanajn trupojn en la norda duono de la lando.
En Madrido, Napoleono diktis kelkajn dekretojn, inter ili la nuligon de la feŭdaj rajtoj kaj la malapermesigon de la Inkvizicio. Tiuj disponoj multe diras liafavore, sed en la tiamaj cirkonstancoj la hispana popolo ne povis taksi la bonecon de liaj intencoj; pro lia antaŭa erara politiko, inter li kaj tiu popolo, estis nesuperebla abismo.
Tiam okazis la angla interveno en la milito en Hispanio, kio trudis al Napoleono restudi lian strategion por tiu ĉi lando. Li daŭrigis la bataladon en la nordŭesto de Hispanio, ĉefe por alfronti la novan situacion. Estante en Astorgo li eksciis pri problemoj en sia granda kaj komplika imperio. Do li devis forlasi Hispanion, en januaro de la jaro 1809, ne atinginte lian celon de konkerado de tuta Iberio Lia frato Jozefo reinstaliĝis kiel reĝo en Madrido, sed tiam li havis neniun povon en la suda duono de Hispanio, kaj la francaj trupoj daŭre devis bataladi, kaj suferi la atakojn de la gerilanoj en la zonoj kiujn ili kontrolis.

# Plua militado ĝis la jaro 1814



En februaro de 1809, pluraj semajnoj post la for-iro de Napoleono el la hispana teritorio, estis kap-tita de la francaj trupoj la urbo Zaragozo post dua sieĝo kiu daŭris kelkajn monatojn kaj kiu re-komenciĝis kadre de la ĝenerala ofensivo de la Granda Armeo komandita de la Imperiestro. La defendo de la urbo estis vera mirindaĵo de heroa rezisto de la zaragozanoj kaj de militista scienco de la komandanto Francisko Javiero Palafokso. Io simila okazis en Girono, subgvide de generalo Al-varo-de-Kastro. Ĉi-tiu urbo suferis tri sieĝojn laŭlonge de la jaroj 1808 kaj 1809. La kapitulaco ne okazis ĝis decembro de tiu lasta jaro.

Dum la jaro 1809 la ofensivo de la francaj trupoj koncentriĝis en la ŭesto de la duoninsulo celante konkeri Portugalion aŭ almenaŭ kontroli ties ha-venojn. La marŝalo Soulto eniris en tiun landon tra Galegio kaj okupis dum iom da tempo la urbon Oporton, sed baldaŭ li estis repuŝita de brita kon-traŭofensivo. Fiaskis ankaŭ alia provo eniri en Por-tugalion tra Ekstremaduro. En novembro de la sa-ma jaro la franca armeo atingis gravan venkon en Okanjo (Ocaña).

Tio ebligis ke en la sekvinta jaro, krom Portugalio, ankaŭ Andaluzio estis milita tereno. En ofensivo kiun komandis la reĝo Jozefo mem la 1a, la franca armeo okupis La-Karolinon kaj Ĥaenon kaj alvenis ĝis Seviljo, kiu estis konkerita la 1an de februaro kaj post pluaj kvar tagoj la marŝalo Viktoro komencis la sieĝon al la urbo Kadizo, kiu daŭris du jarojn. Dum tiu sama jaro 1810 intensiĝis ankaŭ la operacioj en Katalunio kaj Aragono.

Komence de la jaro 1811 plejparto el la hispana teritorio estis okupita de la trupoj de la imperio de Napoleono. Sed tio estis nur teorio, fakte, la teritorio tute ne estis kontrolita de tiu armeo. Te-mis pri nefirma kaj nestabila okupado senĉese ŝanĝiĝanta kaj sen ebleco kulminigi strategiojn, pro la karakteraĵoj de la hispana rezisto.

Tio estis io nova: la militmaniero de la hispanoj rompis la skemojn de la primilita konceptado de Napoleono. Ĉi tiu alkutimiĝis al rekta alfrontiĝo kun armeoj, surbaze de koncentriĝo de fortoj, ki-es rezulto okazigis negocadon kaj faktajn konke-rojn de la teritorio. Sed en Hispanio la francoj troviĝis antaŭ iu batalformo –la gerilo– por kiu ne utilis siaj taktikoj.

Ekster ĉiu primilita logiko, tiu popola respondo inaŭguris modelon batali en la nuna epoko. La ti-amaj gerilanoj senĉese atakis la francajn trupojn, baris interkomunikadon, distordis informojn, dev-igis la francojn destini soldatojn por protekti la kon-vojojn, fiksigis grandajn efektivojn sur la tereno. La geriloj estis malgrandaj grupoj kiuj agadis rapide

kaj surprizige, adaptitaj al la tereno, en operacioj sur spacoj teorie konkeritaj de la francoj. Tial la venkoj de la franca armeo kaj ties eniro en iu urbo havis neniun efikon kaj foje eĉ nek sencon, ĉar ili ne signifis la kontrolon de la spaco aŭ, por tion certigi, estis necesa la fiksado de multenombra trupo.

Se oni komparas inter rimedoj uzitaj kaj militaj rezultoj atingitaj, la milito de Hispanio estis por Napoleono pli alte-kosta, ĉiuaspekte, ol ĉiuj, kiujn li faris en Eŭropo, esceptante tiun de Rusio, tiel en kio koncernas al la homaj efektivoj kiel rilate al la financaj kaj logistikaj rimedoj. Iu franca principo pri milita strategio estis la movkapablo de siaj armeoj kiuj restas fiksitaj nur dum la tempo necesa por atingi militan venkon kaj trudi politikan solvon. Tamen en Hispanio la francaj trupoj estis senĉese pliigitaj ĝis la fino de la jaro 1811, kaj el tio ne sekvis la efektiva okupado de la teritorio aŭ la venko en decidaj bataloj. Se la francaj militaj efektivoj estis, meze de la jaro 1808 proksimume 170.000 soldatoj, post unu jaro estis jam 300.000. Tiuepoke estis venkaj kampanjoj de la imperiestro, sed ili ne estis decidaj, ĉar per ili oni apenaŭ atingis konservi relative libera la komunikad-linion inter Madrido kaj la franca landlimo, ĉiam minacita de la gerilo aŭ, tiumomente, de la armeaj trupoj hispanaj kaj britaj. Krome tiukaze temis pri trupoj forĝitaj en la kampanjoj de la "Granda Armeo". Per malpli da militistaj efektivoj la Imperiestro estis solvinta antaŭe malfacilajn situaciojn en Eŭropo. Meze de la jaro 1811 la kvanto da soldatoj estis 350.000, kiam jam oni estis fiaskinte en tiel gravaj celoj kiaj la konkero de Portugalio aŭ la efektiva okupado de la orienta kaj la suda partoj de la Duoninsulo. Ekde la komenciĝo de la jaro 1812 la preparado de la kampanjo kontraŭ Rusio postulis demeti trupojn de Hispanio, kun konstanta malpliigo de la kvanto da soldatoj tiel ke restis nur 90.000 en la jaro 1813.



Francisko Javiero Palafokso

Sed pli gravis la subutiligado de tiuj trupoj, almenaŭ laŭ la primilita konceptado de Napoleono. Proksimume 80 procento el la francaj soldatoj devis dediĉiĝi al logistikaj taskoj de protekto, viglado, eskorto, tio estas, sekurigi la ĉefajn retojn je komunikado kaj provizado ĉiam minacitaj de la geriloj, kaj spit' al ĉio ĉi la subtenado de tiuj vojoj estis tre febla. En grandaj bataloj, konsideritaj decidaj de la francoj por malfermi novajn spacojn, ili povis uzi ne grandan kvanton da efektivoj, tre malpli ol tiuj ekzistantaj en la hispana teritorio. Tamen, rilate al la gerilo, nur por la persekutado de EspoziMino (Espoz y Mina) en Navario oni uzis kontingenton je proksimume 40.000 soldatoj.

La francaj homaj perdoj estis tre altaj por la atingita rezulto. Proksimume cento da soldatoj averaĝe ĉiutage estis vunditaj, kaptitaj aŭ mortigitaj. La perdoj kaj la senmovigo de trupoj devigis Napoleonon fari eksterordinarajn rekrutadojn ekde la jaro 1809. Tio kontribuis damaĝi sian prestiĝon en Francio. En Hispanio Napoleono fiaskis en la "konker-milito", tiu efika militmaŝino kiu nutris sin mem kaj multobligis kaj certigis la rimedojn tra sinsekvaj kampanjoj. Fakte, sur tiu praktiko kuŝis sia tuta milita kariero ekde la epoko de la Konsuleco.

Ĝis la jaro 1809 Napoleono povis subteni sian venkan karieron dank' al la predoj al iu venkita malamiko por ataki aliajn cele de ilin predi siavice. Esceptante sian ekspedicion en la hispanan duonisulon, ĉiuj siaj antaŭaj kampanjoj estis tiel mallongaj kaj profitdonaj ke li sukcesis rembursi al si la elspezojn de ĉiu kampanjo kaj

**Aŭgustino de Aragono**

Agustina Raimunda María Zaragoza estis la nomo de heroino kiu distingiĝis en la unua sieĝo al Zaragozo kaj fariĝis mita simbolo de la popola rezistado kontraŭ Napoleono. Falinte vunditaj aŭ mortaj la defendantoj de iu urba pordo, la francaj trupoj pretiĝis alsalti tra ĝi. En tia senespera situacio, Aŭgustina, kiu partoprenis kun aliaj virinoj en la helpado al la vunditoj, sukcesis pafi per kanono kontraŭ la atankantoj. La francoj retretis timante embuskon, kaj novaj defendantoj alkuris tien por pludaŭrigi la rezistadon.



reveni kun iu trezoro kiu lin helpus ekipi por la sekva jaro siajn rekrutojn kaj subteni ilin en Francio ĝis ilia alveno al fremda lando. Sed trairinte la Pireneojn, li sin ĵetis al tiel multekosta entrepreno ke anstataŭ atingi en ĉiu kampanjo 250 milionojn da frankoj, li devis elspezi tiom altajn monsumojn, ke la skemo radikale ŝanĝiĝis, de la profito al la perdo, de la enspezoj al la elspezoj.

La francoj ĉiam sin sentis forvoj en la tereno kaj en la lando. La malamikeco de la loĝantaro estis ampleksita daŭrigo de la 2a de majo. Ili sin sentis subdanĝere en la vojoj, la montaroj kaj la urboj. Ili estis neadaptitaj por alfronti embuskojn anstataŭ batalojn. La generaloj ne sciis movi la ŝak-figuretojn en iu neregula ŝak-tabulo kaj ne vidante la malamikajn figuretojn. Ne utilis la racieco kaj disciplino aŭ la aŭdacaj kombinadoj de artilerio kaj infanterio kiujn ili estis elmontrintaj en Eŭropo. Ili devis zorgi kiamaniere protekti konvojojn aŭ komunikadojn, por kio ne utilis la simpla pliigo da soldatoj, por alfronti «fantomojn», «iun armeon da ombroj». Ili ankaŭ ne komprenis la rifuzon fare de la civila loĝantaro. Ili ne komprenis iajn teniĝojn estante plenkonvikitaj pri sia rolo de internaciaj soldatoj de la libereco kaj la batalado kontraŭ la tiranoj de la Antikva Reĝimo.



La gerilestro Empecinado

La popola milito, kaj ties gerilana esprimo, estis ellaborinta sian propran diskurson kaj iujn specifajn formoj je organizado. La gerilo, jes ja, identiĝis kun la popolo. Ĝia fundamenta bazo estis la popola kunlaborado. Kaj tiu socia dimensio alproksimigadis la militon al la kamparana loĝantaro kiu fariĝis protagonisto kaj ne simpla provizanto de rekrutoj. Ĝi multobligis la rezistadon, ilia kompliceco igis ke por la francoj ĉiu kamparano estis gerilano, kaj tiele la logiko de la reprezalio stimulis la pliigon de la rezistado. La organizformo de la gerilo deflankigis la militistan modelon de hierarkio, rango kaj disciplinrilatoj, por alpreni kondutregulojn de la kamparanaj sociaj interrilatoj: personaj ligoj, naturaj estroj, fideleco bazita en la amikeco, ideo de la valoro... kvankam laŭ la pasado de la tempo ĝi evoluis al pli granda grado je organizado laŭ la militistaj skemoj. La diskurso aglutinanta sian agadon estis aperinta jam en la respondo de la madrida majo.

El la gerilo eliris poste liberalaj aŭ absolutismaj versioj, kiel tiuj enkarnigitaj de la “Empecinado” aŭ la “Pastro Merino”. Sed la fakto estas ke la milito estis lernejo de “kolektiva ribeleco”, kiu, kun politikaj kaj ideologiaj horizontoj ne nur malsimilaj sed eĉ kontraŭdiraj, karakterigis formojn de socia respondo dum la tuta jarcento. Akordiĝis la “aspiroj al ŝanĝo” kun la “rezisto al la transformado”.

La gerilo ne nur atakis la malamikon kaj baris ties agadon, sed ankaŭ kunlaboris kun la armeaj fortoj provizante al ili informon, liberigante kaptitojn, predante milit-ekipaĵon aŭ stimulante la popolan reziston, en kiu ne mankis altrudon al la aliĝo. Kvankam komence la gerilo sin nutris je iu diversa socia ensemblo ligita al la formoj de popola respondo kaj de organizado kiel lokaj konsilioj, ek-

### La Konstitucio de Kadizo (1812)

Ekde la 24a de septembro de la jaro 1810 ĝis la 19a de marto de 1812, en Kadizo, dum la napoleona armeo sieĝis la urbon, la reprezentantoj de la Hispanio kiu kontraŭrezistis la invandintojn, studis kaj aprobis la unuan konstitucion de Hispanio kiu estis poste aplikita.

Inter ĝiaj disponoj, indas menci: la dividon de la povoj de la ŝtato, la nuligon de la Inkivzicio, la reprezentativecon, la unuecon de Hispanio kaj siaj kolonioj…

Inter la tiamaj deputitoj estis G.M.Jovellanos.



de la jaro 1809 la geriloj agadis pli aŭtonome kaj fariĝis la destin-loko ne nur de kamparanoj, sed ankaŭ de restaĵoj de la regula armeo venkita kaj de "romantikaj banditoj".
Laŭlonge de la milito funkciis proksimume 400 geriloj. Ilia membraro oscilis inter 50 kaj 1.000 gerilanoj, laŭ la zonoj, la cirkonstancoj, la sezonoj... En iuj okazoj superis 3.000 gerilanoj.
Tamen oni devas distingi inter gerilo kaj gerila armeo, ĉar en la kazo de Empecinado kaj EspoziMino, post la jaro 1.811, havis ĝis 13.000 gerilanojn.
La operacio de marŝalo Suĉeto (Suchet) kontraŭ Valencio en la jaro 1811, kiu kulminis per la konkero de la urbo komence de januaro, signas la lastan grandan francan ofensivon kiu sukcesis. Dum la jaroj 1812 kaj 1813 la milito prenis alian aspekton, kiu markis la francan malvenkon. La preparado de la napoleona interveno en Rusio kaj ties disvolviĝo postulis la retiradon de konsiderindaj militaj efektivoj el Hispanio. La 350.000 francaj batalantoj de la somero de la jaro 1811, perdis 100.000 soldatojn la sekvan jaron, kaj kromajn 100.000 en la printempo de la jaro 1813. Krome la anglo-portugalaj trupoj de Ŭelingtono (Wellington) faris ofensivon ekde Portugalio kaj aldoniĝis al la hispanaj batalantoj. Komence de la jaro 1812 la trupoj rekte komanditaj de Ŭelingtono nombris 70.000 soldatojn bone ekipitaj kaj trejnitaj. La ĝenerala batalado de ĉi tiu periodo prezentas jenan skemon. Iniciatemo de Ŭelingtono kaj entreprenado de grandaj ofensivoj hispano-anglaj. Ĝuante logistikon kiu inkluzivas la portugalajn havenojn kiel lokoj por provizado, la aliancanaj trupoj certigas al si la kontrolon de Ekstremaduro kaj kun tio eblas ankaŭ la kontrolon de la valoj de la riveroj Dŭero kaj Taĥo faciligante la penetradon direkte al Madrido kaj la norda altebeno. En la franca flanko la timo pri rompiĝo de la komunikado kun la nordo inspiris gradigitan retretadon ekde Andaluzio unue al Madrido, kaj ekde Valencio ankaŭ al Madrido kaj Katalunio.
En januaro de 1812 komenciĝis la granda ofensivo hispana-brita kun la decidaj konkeroj Ciudad-Rodrigo kaj Badaĥozo. La 19an de majo ili alvenis al Almarazo kaj fine de junio al Salamanko. Grava momento de la ofensivo estis la batalo de la Arapiloj kie interfrontiĝis, la 22an de julio de la jaro 1812, proksimume 40.000 batalantoj en ĉiu flanko, komanditaj de Marmonto kaj Ŭelingtono. Tiu estis iu el la plej decidaj okazaĵoj de la milito, kiu permesis al la aliancanoj eniri, por malmulte da tempo, en Madridon la 12an de aŭgusto, kaj entrepreni, la 19an de septembro la sieĝon de la urbo Burgoso. Tiu estis la definitiva ŝanĝo de la tendenco de la milito. La francoj estis komencantaj la longan retreton ekde la sudo al Madrido. Kaj faris tion ekde Kadizo, ĉesigante la sieĝon de tiu urbo, du monatojn post la aprobo de la fama Konstitucio de la jaro 1812.


Batalo de Arapiloj

La francaj trupoj venintaj el la sudo kaj el Valencio eniras denove en la ĉefurbon komence de novembro de la jaro 1812, dum la fiasko de Ŭelingtono antaŭ Burgoso bremsis la aliancanan ofensivon ĝis la printempo de la jaro 1813. Dume la francoj konservadis la akson Madrido-Burgoso-Bajono. En la jaro 1813 rompiĝis tiu akso kaj kun tio la definitiva franca retreto, simboligita per la migranta sekvantaro de Josefo la 1a ekde Madrido al Valladolido kaj ekde ĉi tie al la landlimo. Ja, la batalo de Vitorio la 21a de junio estis la nereira punkto. La afero sekvis en la eŭska teritorio. Inter la 25a de junio kaj la 31a de aŭgusto, fiaskinta la kontraŭofensivo de la marŝalo Soulto, nomumita ĝenerala anstataŭanto de la reĝo Josefo, la aliancanaj trupoj eniris en Donostio, por venki en la batalo de Sankta-Marcialo. La 7an de oktobro la aliancanoj transiris la Bidasoan riveron. La batalado en la franca teritorio inkluzivis agadon sur Bajono, Orthezo kaj Tarbeso por kunflui sur Tuluzo (Toulouse) en aprilo de la jaro 1814.
Kun la franca foriro el Valencio la 5an de julio de 1813 kaj la posta retreto de la marŝalo Suĉeto direkte al Tortoso komenciĝis la retreto el Katalunio, kiu restis plenumita nur komence de junio de la jaro 1814. Tio estas, en dato post la traktato de Valengajo (Valengay) de la 11a de decembro de la jaro 1813 per kiu Napoleono agnoskis Ferdinandon la 7an kiel Reĝon de Hispanio. La reveno de la monarko okazis ĝuste tra iu Katalunio ankoraŭ parte okupita de la francaj trupoj. La 16an de aprilo la marŝaloj Soulto kaj Suĉeto, kaj la ĝenerala estro de la aliancanoj, Ŭelingtono, subskribis la finon de la militado. La kastelo de Figueraso estis forlasita la 4an de junio de la jaro 1814. Tiele estis finiĝante la Milito je Sendependeco.

# La nedezirinda “Dezirito”

Dum preskaŭ ses jaroj la gehispanoj batalis heroece kaj sindone kontraŭ la tiama plej potenca imperio. Ni memoru la kuraĝajn gemadridanojn, kiuj, la 2an de majo 1808, kontraŭfrontis per nudaj manoj la dragonojn de la napoleona gvardio. Ni memoru la multajn milojn da soldatoj kaj gerilanoj volontuloj kiuj batalis en Bajleno, Somosierro, Arapiloj kaj multaj aliaj lokoj de la ampleksa hispana geografio. Ni memoru la malfeliĉajn gelogantojn de Zaragozo, Girono, Seviljo, Valencio… kaj aliaj lokoj, kiuj suferis la sieĝon kaj la kanonadon de la invadinta franca armeo. Ni memoru la deputitojn de la teritoriaj Konsilioj, kiuj pristudis kaj pridiskutis en Kadizo, sub la kanonado de la franca armeo, la unuan konstitucion de ĉi-tiu lando, Ni memoru la elstarajn gefilojn de Hispanio, kiaj Aŭgustina de Aragono, Daoizo, Velardo, Palafokso, Kastanjo, Empecinado, Jovellanos, Alvaro-de-Kastro, Pastro Merino… kaj multegaj aliaj kiuj, en la oficoj de la armiloj aŭ de la politiko, fordonis tion plej bonan de si mem favore al kaŭzo je kiu ili fidis.



Reĝo Ferdinando la 7a

Kiam oni penas kaj sin foroferas tiamaniere, oni faras tion favore al grava, sankta celo… aŭ io tiel taksata de la foroferantoj. Kiu estis, do, la kialo aŭ celo kiu tiamaniere mobilizis kaj inspiris niajn samlandanojn antaŭ 200 jarojn?

Ili donis iun nomon, aŭ pli ĝuste iun adjektivon al tiu celo: “La Dezirito”. La Dezirito estis la reĝo Ferdinando la 7a, kiun Napoleono altiris per mensogo kaj trompo al Bajono kaj tie kaptis lin kaj devigis lin rezigni la hispanan kronon laŭ hontiga abdik-procezo kiu kulminis per la kronado de Jozefo Bonaparto.

Poste, dum la hispana popolo batalis kaj suferis favore al “La Dezirito”, ĉi-tiu vivadis kiel princo en residejo kiun Napoleono havigis al li, dediĉita al festoj, dancoj, amindumado, ĉasado kaj… brodado. Jes, li lernis brodi kaj praktikis brodadon. De tempo al tempo li adresigis al Napoleono leterojn plenajn da flatado, kaj kiam la franca trupoj atingadis militajn venkojn sur la fidelaj hispanoj kiuj batalis favore al la Dezirita Ferdinando, ĉi tiu skribadis al la imperiestro gratulante lin pro tiuj venkoj.

Ni jam vidis lian malkuraĝan konduton okaze de la komploto de la Eskorialo kaj lian malnoblan abdikon en Bajono. Nun ni vidas lian humilaĉan tenigon rilate al Napoleono. Sed la plej malhonestan econ de lia karaktero evidentiĝis post lia liberiĝo kaj reveno al la lando.

Kiam li realprenis la reĝecon de Hispanio, lia unua dispono estis rifuzi kaj nuligi la Konstitucion kiun la hispanaj gecivitanoj estis donintaj al si por difini sian suverenecon kaj sian liberecon. Li restarigis la Inkvizicion, la absolutisman povon de la reĝoj. Li sin deklaris reĝo per la Dia graco kaj ne per la volo de la popolo kiu tiom batalis kaj fordonis favore al li. Laŭ lia volo, la gehispanoj devis perdi sian kondiĉon de civitanoj por esti denove nur regatoj.


Komenciĝis tiele la malstabilan politikan situacion de Hispanio, kie, laŭlonge de la tuta 19a jarcento estis peno, batalado kaj revolucioj por reakiri demokratiajn rajtojn certigitaj per Konstitucio. Komenciĝis tiele ankaŭ la politika malstabileco kaj militoj en la kolonia imperio de Hispanio laŭlonge de la tuta 19a jarcento celante ian liberecon kiun oni povis certigi nur per sendependiĝo el la metropolo.

Ja, Jozefo Bonaparto estus rezultinta pli bona reĝo ol tia “Dezirito”. Tion vidante, ŝajnas ke oni povas konkludi ke la militoj estas senutilaj, ke ne indas batali favore al tiaspecaj celoj. En la historio de nia lando, ***neniam tiom da personoj tiom suferis tiom senutile***. **NUNCA TANTOS SACRIFICARON TANTO TAN INÚTILMENTE.**

Jen la konkludo kiun oni povas eltiri du jarcentojn post la Milito je Sendependeco.

# Rezenco de libroj pri la Milito je sendependeco






## La husaro


**Aŭtoro:** Arturo Pérez Reverte
Unua novelo de la aŭtoro; verkita en la hispana lingvo kaj tradukita al kelkaj idiomoj.
**Unua eldono:** jaro 1986
**Paĝoj:** 224
**Temo:** Mallonga novelo priskribante batalon komence de la Milito je Sendependeco, en la jaro 1808. la unua eskadro de la napoleona armeo intencas submeti la andaluzajn kamparanojn kiuj batalas kontraŭ la francaj invadintoj.

La rakonto priskribas la travivaĵojn de iu juna vicleŭtenanto de la 4a regimento Husaroj nomita Frederic Glüntzs, el la nova rekrutado de imperiaj oficiroj sendita al Hispanio, kie la popolo rifuzas submetiĝi al Napoleono.
Kiam tiu oficiro alvenis al Hispanio jam estis okazintaj la eventoj de la 2a de majo en Madrido. La kolonoj de la franca armeo, estis trairante Andaluzion, la kamparanoj kaj la gerilanoj senkompate atakas la francajn soldatojn kiuj restas izolitaj. La regimento de Husaroj de tiu ĉi rakonto troviĝas en Kordovo. Ĝi estas konstituita de aro da spertaj veteranoj, kiuj bone konas la oficon kaj la riskojn de la milito, kaj alia grupo da junaj oficiroj, el altklasaj familioj, kiuj ne spertas pri militaj aferoj.
Je fino de la novelo estas priskribo de batalo -ŝajne en la kadro de la operacioj ĉirkaŭ Bajleno- kiu estas la unua por la juna oficiro Glüntzs; li tre emis entrepreni tian militan agadon kaj pere de ĝi akiri gloron. Laŭlonge de la disvolviĝo de la batalo, li konstatis ke la milito ne tiom estis glora afero kiom li supozis.
La rakontado estas amuziga kaj la priskribo de la etoso kaj la historiaj cirkonstancoj de la agado estas fajna. En la rakontado oni lerte kombinas la priskribadon de la batalo mem kaj ties antaŭaĵoj kun prikonsideroj rilate al la homa reago antaŭ la realaĵo de la milito kaj ties efiko sur la animo de la batalantoj. La aŭtoro krudece pentras la kruelecon de la bataloj kaj la obstinon de la hispanaj rezistantoj kontraŭ la imperio de Napoleono. Estas speciale menciinda la psikologia aspekto de la verko kiam oni priraportas la iompostioman ŝanĝadon de la juna oficiro Frederic, kiu evoluas ekde sia fiereco esti ano de la elita korpo de la Husaroj al nura homo kiu pli ĝuste pritaksas la valoron de la vivo kaj senespere batalas por savi la sian. Apartenas al tiu filozofio –aŭ prihistoria filozofio- ankaŭ tio, kion la aŭtoro prezentas pri la absurdeco de la militoj, la fakto ke la soldatoj estas kvazaŭ nuraj ŝak-peonoj kiujn la generaloj movas en siaj ŝak-tabuloj.
Sed precipe menciinda estas la lerteco de Arturo Pérez Reverte por prezenti literature historiajn okazaĵojn. Tion oni povas percepti en ĉiuj siaj verkoj kaj manifestiĝis jam en ĉi tiu, kiu estis lia unua novelo. Oni povas diri ke per tiu ĉi verko eniris vera majstro en la literaturan mondon de la historiaj noveloj.

## Rezenco de libroj pri la Milito je sendependeco



# Tago de kolero





**Aŭtoro:** Arturo Pérez Reverte
**Unua Eldono:** la 29an de novembro – 2007
**Eldonejo:** Alfaguara
**Paĝoj:** 400
**Temo:** Historia novelo pri la madridaj okazintaĵoj de la 2a de majo de 1808. Kvankam verkita laŭ novela stilo, la rakonto rigore baziĝas sur dokumentaro de la epoko: militistaj informoj, listoj da nomoj, raportoj de memoraĵoj de atestantoj, dokumentoj el oficialaj kaj partikulaj arkivoj…

La aŭtoro, A. Pérez Reverte, en la prezentado de la libro, pluraj monatoj antaŭ komenciĝo de la jaro de la celebrado de la Dua Centjaro de la eventoj, kiuj signifis la komenciĝon de la Milito je Sendependeco, diris ke li volis esti la unua centrigi la debaton, starigi iujn minimumojn, kaj ke por tio oni devas klarigi iajn interpretadojn, kiuj dum du jarcentoj makulis kelkajn veraĵojn, ekzemple, diras li; ni kreskis pensante ke estis la popolo gvidita de la armeo kiu eliris al la stratoj kaj ne estis tiele. La armeo estis konsignita en la kazernoj kaj sen municio.
Konvenas atenti ankaŭ pri la Eklezio. "Tiutage ĝi havis ian hontigan, abomenindan teniĝon. Ĝi malkonfidis pri la popolo. Por ĝi Napoleono reprezentis en tiu epoko la ordon. Poste ĝi transiris al la alia partio, kvankam oni devas diri ke kelkaj pastroj eliris al la stratoj por batali".
La 2a de majo "temis pri enorma kverelo kies ĉefroluloj estis personoj ĝisoste kolerigitaj pro la insolento kaj la malestimo de la francaj trupoj. Tamen oni devas ne forgesi ke la francoj reprezentis la modernecon, kaj la popolanoj kiuj kontraŭfrontis ilin sur la stratoj, estis iuj uloj kiuj defendadis la monarkion kaj la religion. Ili ne sciis ke ili estis kontribuante al la reveno de Ferdinando la 7a, la plej granda putinido de la lastaj jarcentoj de nia historio, sed mi ne povas eviti senti enorman teneron al tiuj kiuj mortis surstrate tiutage."
"La ordemaj personoj restis siahejme. Ekstere oni masakradis la friponojn de la Lavapiesa kvartalo, la fiularon de la mizeraj kvartaloj, iujn furiozajn virinojn kiuj mortigis per ĵetado de flor-potoj. Batalis proksimume 3.000 al 4.000 personoj, virinoj, infanoj, harditaj viroj, akra, brutala ularo, tiuj kiuj povis perdi nenion… Ili eliris straten ĉagrenitaj. Ĉio estis spontana, iu Intifado. Ili ne pensis pri la patrujo. Tio venis la 3an de majo".
La rakonto estas nek fikciaĵo nek historia raporto. Ĝi estas novelo-forma rakontado, kun historia rigoro, de dokumentitaj okazintaĵoj de iu tago, kiu, tamen, estas materio de legendo kaj havis multenombrajn anonimajn heroojn.
La libro samtempe amuzigas kaj ilustras; ĝi same konvenas por tiuj kiuj ŝatas legi pri aventuroj kaj tiuj aliaj kiuj deziras koni la historion. Rilate al la historio de Hispanio, ĉi tiu verko estas deca kontribuaĵo al la celebrado de la Dua Centjaro de la gravaj okazaĵoj kiujn ĝi prirakontas.

# Rezenco de libroj pri la Milito je sendependeco






## Hispanio, la infero de Napoleono

**1808-1814 Iu historio de la Milito je Sendependeco**

**Aŭtoro:** Emilio de Diego
**Unua Eldono:** januaro – 2008
**Eldonejo:** La Esfera de los libros, S.L.
**Paĝoj:** 590
**Priskribo:** Historia libro, verkita en la hispana lingvo. Sufiĉe ilustrita per bildoj de portretoj de la epoko kaj mapoj de la militaj operacioj. La raportado, tre detala, ampleksas la tutan daŭron de la konflikto, la politikan krizon kiu estis ĝia prologo kaj temaro koneksa kun ĝi.

Ĉi-tiu estas, ĉefe, iu milita historio de la franca-hispana konflikto, sed tamen ne malatentas pri aliaj aspektoj kiuj rilatas al la temo: la tiama internacia situacio, la ekonomiaj kaj la politikaj flankoj de la afero, k.s. Emilio de Diego pritraktas la diversajn faktorojn de la situacio kiu estiĝis en Hispanio komence de la 19a jarcento: la politika krizo kiun travivis Hispanio tiam, la eraraj politikaj pritaksoj de Napoleono rilate al Hispanio, la tiama internacia situacio, la politika propagando de la militantoj dum la konflikto, la graveco de la kolonia imperio de Hispanio, la homaj kaj materiaj rimedoj de ambaŭ intermilitantoj, naturo kaj graveco de la geriloj, la graveco de la kontrolo de la maroj, la mono, la logistiko.

Ĉiuj ĉi elementoj gravas por pli bone kompreni la konflikton, ties disvolviĝon kaj rezulton. Estas interese konstati ke oni gajnis la militon kvankam oni perdis preskaŭ ĉiujn batalojn, ĉar la hispanaj armeoj, eĉ kiam ili batalis aliance kun la angloj, estis detruitaj aŭ pelitaj al fuĝo, sed ili ĉiam reorganiziĝis poste kaj revenis batali.

En la verko oni klare eksplikas la gravecon de la kontrolo de la maro fare de la angla floto. La aliancanoj: hispanoj, portugaloj kaj britoj sukcesis, dank' al la menciita ĉemara supereco de Anglio, havi siajn bazojn je provizado en iu ajn loko de la duoninsula marbordo. Tamen la francoj dependis, por ilia provizado, de longaj surteraj linioj, konstante minacitaj de la gerilanoj.

Male ol aliaj aŭtoroj, Emilio de Diego konsideras ke la popola ribelo de la 2a de majo ne estis tute spontana kaj ne-atendita, sed organizita de la partio de Ferdinando. Tamen koincidas pri tio ke, esceptante la heroa interveno de la oficiroj Daoizo kaj Velardo de la kazerno je artilerio, ĝenerale la militistoj de la ĉefurbo restis marĝene de la ribelo de tiu tago.

La legado de la verko rezultas amuza, distra, ĉefe en ties unua parto, kiu pritemas la politikajn kaj internaciajn aspektojn de la milito. La dua parto, pli centrita en la milito mem, ties bataloj kaj operacioj, alportas grandan dokumentaron kaj ampleksan priskribon de la milita agado.

La aŭtoro trafe montras kiamaniere, dum la tuta daŭro de la milito, la hispana teritorio kaj la tieaj batalantoj konstituiĝis en infero por Napoleono. Tia estas, ĝuste, la titolo de la verko. Li mencias la paradokson ke la franca imperiestro mem, kelkaj jaroj antaŭ la invado de Hispanio, anoncis ke invadi ĉi-tiun landon estus grava strategia eraro.

Resume, la amantoj de la historio povas trovi en tiu ĉi libro grandan kaj interesan instruon, kiu, tamen, ne estas enuiga legi.



# LA SEKRETA MANĜO

**La sekreta manĝo** estas iu novelo, verkita en la hispana lingvo, de Javier Sierra, eldonita en la jaro 2004.
La intrigo disvolviĝas dum la pentrado de **La Sankta Manĝo,** mendita de Ludoviko la Maŭro al Leonardo de Vinĉo kiel parto de la ampleksigo kaj ornamo de la refektorio de la dominikana konvento de Milano inter la jaroj 1495 kaj 1497. La aŭtoro hipotezas pri la veraj fontoj de Leonardo por tiu verko kaj la ebla rilato de la artisto kun la kataristoj.

Frato Aŭgusto Lejro, dominikana inkvizitoro ekspertulo pri interpretado de ĉifritaj mesaĝoj, estis urĝe sendita al Milano por inspekti la pentraĵon kiun la majstro Leonardo de Vinĉo estis finante pro serio da sennomaj leteroj ricevitaj en la kortego de la papo Aleksandro la 6a, per kiuj oni denoncis ke De Vinĉo ne nur pentris la apostolojn sen ties kutima haloo je sankteco, sed krome la propra artisto sin portretis en la sanktan scenon, dorse al Jesuo.

**La aŭtoro baziĝas en tio ke la Lombardia regiono ricevis inter la 13a kaj la 15a jarcentoj la supervivintojn de Montseguro.**

**La Sekreta Manĝo**, titolo de la lasta verko de Javier Sierra kaj finalista de la 3a Premio pri Novelo **Urbo Torrevieja**, estas libro plena je misteroj per kiu la aŭtoro enkondukas la legantojn en intrigon ŝarĝitan je enigmoj, enkriptitaj mesaĝoj, proskribita saĝo, vatikanaj sekretoj, kaŝitaj signifoj, ekleziaj implikoj, konfuzo, krimoj, aventura agado, maĥinacioj, ruz-agado kaj, ĉefe, intrigo.

En la novelo oni montras ke la **Lasta Manĝo** de Leonardo de Vinĉo enhavas serion da anomalioj de vidpunkto de la tiama katolika ortodokso: ĝi ne montras la Sanktan Gralon, nek la establon de la Eŭkaristio fare de Kristo, kiu mansignas kvazaŭ aplikante la solan sakramenton kiun praktikadis la kataristoj en siaj ceremonioj, la t.n. ***Konsolamentumo***. Li ankaŭ prikonsideras la eblecon ke la disĉiploj de la pentraĵo estu portretoj de gravaj heterodoksuloj de tiu epoko. Ankaŭ ne la teniĝo de la disĉiploj en tiu verko respegulas tion kion priraportas la Evangelioj: Johano, la juna disĉiplo sidanta apud la Majstro, ne apogas sian kapon sur lia brusto, kiel asertas la Nova Testamento; sed male, ŝajnas malproksimiĝi el li.

Temas pri iu el la furor-libroj de la tiel nomata historia novelo pli hontindaj el ĉiuj eldonitaj ĉi-jare. Disvastigita sub la famo de la **Kodo Da Vinĉi**, ĝi centrigas la intrigon en la ellaborado, fare de Leonardo de Vinĉo, de la pentraĵo de la **Lasta manĝo**. Laŭ la novelo, tiel Leonardo kiel la dominikanoj de la konvento rezultas esti kataristoj (herezo malaperinta kelkajn jarcentojn antaŭ tiu epoko), kaj eĉ la inkvizitoro mem, sendita de Romo por esplori, fariĝas kataristo. Ĝi estas iu hontiga novelo malbone dokumentita kaj falsanta de la realo, kiu antaŭ kalkaj jaroj estus forrifuzita de ĉiu ajn eldonisto.

**La Sekreta Manĝo** estas gvidilo kiu celas malkaŝi la misterojn enkriptitajn en **La Lasta Manĝo** de Leonardo. Tiu pentraĵo estas pli ol nura art-verko; ĝi estas konglomeraĵo da signaloj indikantajn ke tiu artisto estis iu inicito (eble kataristo) kiu konis la sekretojn priskribitajn en libroj kaj verkoj kiujn la Katolika Eklezio katalogis kiel apokrifaj. **La Lasta Manĝo** plenas je signaloj indikantaj ke malantaŭ ĝia ŝajno estas multe pli ol farbo-miksaĵo.
Kion signifas la nodo de la tablo-tuko? Kie estas la haloj je sankteco kutime ornamantaj la kapojn de la apostoloj aŭ Jesuo en aliaj pentraĵoj de la sama sceno? Kie estas la paska ŝafido de la juda festo kiun ili estis celebrantaj? Kial Leonardo portretis sin mem en la pentraĵo, kaj krome li situas dorse al Jesuo? Kiu estas la vera perfidulo? Kaj ĉefe, Kie estas la Sankta Gralo?

En tiu ĉi neeltebla epidemio da spekulativa kaj pseŭdohistoria intrigo, de "saĝa esplorado kaj dokumentado", troviĝas **La Sekreta Manĝo**, trimila invento pri la enkonduko de supozitaj sekretaj kodoj en art-verkojn konataj de ĉiuj.
La intrigo, preter la pedanteco pri la priskribita pentraĵo kaj ia kapablo por la priskribado de la epoko, ne vekas tro da intereso, la priraporta nesufiĉo senmezure disvastigas iun historion kiun oni povus raporti per duono el la paĝoj.

Cetere, la libro rezultas sufiĉe elteneble, kvankam ĝi tute ne estas ia mirindaĵo, en ĝi ni havas iun historion kun iujn mortintojn. Kaj ian "misteron" kiu devas esti solvita. La intrigo estas enetosigita dum la pentrado de la verko fare de Leonardo, kaj se ni prinkonsideras la "historian" parton de ĉi tiu "historia novelo", rezultas ke la aŭtoro ankaŭ ne transdonas al ni multe da historio. Ni povas resumi dirante ke temas pri iu supozita novelo "nigra-historia" en iu ne tro originala kunteksto, kun iu historio ne tre alloga kaj sen rimarkinda historia intereso.

**Recenzo**

# La sekreta manĝo

La verko de Javiero Sierra pri kiu ni temas estas abunde priskribita en Interreto. Multaj opiniis pri la libro, ties ecoj kaj ties aŭtoro. Plejparto el tiuj opinioj estas favoraj al la verko kaj al la verkisto, aliaj, male, faras akran kritikon pri la verko, ties stilo kaj ties temaro. En la antaŭa paĝo ni prezentas areton da tiuj interretaj pritemoj de ***La sekreta manĝo***.

Tamen, ŝajnas ke ĉiuj tiuj kritikoj, ĉu favoraj aŭ malfavoraj, atentas nur pri parta aspekto de la verko. Grandparto el la opiniantoj prikonsideras la enhavon de la noveleska intrigo, t.e. la historio aŭ rakonto de la romano pri la okazaĵoj kiujn la verkisto situigas kadre de la pentrado, fare de Leonardo de Vinĉo, de **La Sankta Manĝo** en la refektorio de la dominikana konvento en la Milan-urbo estrita de Ludoviko la Maŭro. Prijuĝante nur tiun aspekton de la libro, iuj laŭdas la profundan konon de la verkisto pri la Renesanca epoko en kiun li enkadrigis la scenejon de la novelo, preskaŭ ĉiuj estimas tion ke la legado de la verko rezultas amuza kaj distra, kaj ne mankas tiuj kiuj konsideras ke la intrigo estas tro fantazia kaj seninteresa.



**Leonardo de Vinĉo**

Pli profundiĝas en la aferon tiuj kiuj atentas pri la strangaĵoj prezentataj de la pentraĵo de Leonardo, t.e. la netradiciaj elementoj de **La Sankta Manĝo,** la nekutima teniĝo de kelkaj apostoloj kaj Jesuo mem en la pentraĵo, la identeco, aspekto kaj situo de iuj el la apostoloj… Sed, eĉ tiuj kritikistoj kaj opiniantoj kiuj atentas pri tiu aspekto de la verko, faras tion nur konekse kun la intrigo mem de la novelo kaj de vidpunkto de ĝia rilato kun la protagonistoj de la rakonto kaj ties agado. Kaj de tiu vidpunkto, la demandoj kiujn la aŭtoro prezentas pri la kialoj de Leonardo kaj la afero ĉu tiu artisto estis aŭ ne membro de la mezepoka sekto de la kataristoj, konstituas nur parton de la intrigo de la novelo kaj kroman misteron inter tiuj multaj aperantaj en la romano laŭlonge de la disvolviĝo de la aventuroj de ties protagonistoj.

Nu, ĝuste ĉi-tie ni devas esprimi nian malakordon kun tiu vidpunko. Tio estas, ŝajnas al ni ke ***La sekreta manĝo*** de Javiero Sierra estas du verkoj en unusola libro… aŭ du temoj en unusola verko. Unuflanke estas la novelo mem, kun ties temo kaj intrigo, kun ties novelaj ecoj kaj kvalitoj kiaj amuza, distra, bone dokumentita de historia vidpunkto k.s. kaj, aliflanke, estas ankaŭ libro destinita prezenti kaj klopodi respondi demandojn pri la stranga teniĝo kaj sekreta celo de Leonardo de Vinĉo en la ellaborado de sia pentraĵo.

Kompreneble, tiaspeca pritemo de artverko tute ne estas novaĵo. Ni memoru, ekzemple, du verkojn de Sigmundo Freŭdo, la aŭstria kuracisto fondinto de la psikanalizo. Per iu el tiuj verkoj Freŭdo pristudas la statuon de Davido fare de Mikel-Anĝelo, kaj el ĝi li eltiras konkludojn pri la psiko de la artisto kaj ties celo ellabori la artverkon. Same faras la sama Freŭdo pri alia art-verko, ĉi-kaze de Leonardo mem; temas pri tiu verko titolita: ***Iu infana memoraĵo de Leonardo de Vinĉo***. Ĉi kaze la pristudita art-verko estis tiu pentraĵo nomata **Gioconda** kaj **Mona Lisa.** Disvolvante tiun temon, la kreinto de la psikanalizo psikanalizas Leonardon kaj alvenas al surprizigaj konkludoj pri la infaneco de **de Vinĉo** kaj la rilatoj de la artisto kun lia patrino.

Nu, ion similan faras Javiero Sierra en sia **Sekreta Manĝo** pri la **Sekreta Manĝo** de Leonardo, sed la novaĵo, ĉi-kaze, estas tio ke la esploro de Javiero Sierra kaj ties prezentado al la publiko ne estas dokta, sufiĉe teda eseo, simila al tiuj menciitaj de Freŭdo; sed, tio ke la psikologia, historia esploro kaj ties provizoraj konkludoj aperas enkadrigitaj en noveleska intrigo kiu amuzas la leganton samtempe ke oni enkondukas lin, distr-maniere, en la kernon de la esplorado.

Parizo: majo de 1968

# Iu revolucio ekster-tipa



Nun estas la kvardekjara datreveno de la francaj eventoj de majo de la jaro 1968, kiuj ege efikis sur aliaj terzonoj de la Okcidenta kulturo. Ankoraŭ nuntempe, post tiom longa periodo, oftas la diversaj interpretadoj pri la signifo de tiuj okazaĵoj.
La opinioj pri tiu signifo estas eĉ kontraŭdiraj. Ne estas interakordo difini tiun movadon kiel «revolucio»; por ilin mencii oni uzas ankaŭ la terminojn «kultura movado», «socia movado»…
Temis, sendube, pri revolucio, sed oni devas konstati ke ĝi estis iu revolucio ne laŭ-tipa, eĉ prikonsiderante ke ĉiuj revolucioj alportas iun aŭ kelkajn ne-tipajn, ne-atenditajn, nekonatajn elementojn… ĉar male ne eblus la revolucioj. Sed la pariza Majo-1968 prezentis eksterordinaran kvanton da cirkonstancoj kiuj igis neantaŭvidebla iun socian eksplodon de tia naturo kaj graveco. La mobilizado ne okazis kadre de soci-ekonomia krizo, sed en socio en plena ekspansio kaj kun sufiĉe alta grado je disvolviĝo kaj ekonomia prospero. Aliflanke la socia tavolo kiu iniciatis kaj ĉefrolis la tumultojn ne estis iu socia klaso tradicie ekspluatata kaj kun revolucia alvokiĝo kia la proletaro; nur 7 procento el la francaj gestudentoj devenis el laboristaj familioj (nuntempe la procento estas multe pli alta), kaj tamen la mobilizado havis ne-dudeblan karakteron de maldekstra kaj progresema inklino. Sed ĝi estis movado spontana kaj sen gvidantaro, sen iu revolucia partio, sen klara lidero kaj sen konkreta programo nek difinita ideologio. Ĝi ankaŭ ne havis politikajn celojn, kaj, iamaniere, eĉ ne sociekonomiajn celojn. Estis, jes ja, ia reago kontraŭ la aŭtoritatismo de la regantaro, sed la Francio de De-Gaulle ne estis diktaturo kiel la frankismo tiam ekzistanta en Hispanio aŭ kiel la Ŝaho de Persujo.
Ĉiuj-ĉi cirkonstancoj igas la revolucian movadon de la franca majo de 1968 io nekutima, anomalia, sed estis ankoraŭ pli da eksterordinaraj cirkonstancoj. La revolucioj sukcesas aŭ fiaskas. Sed ĉi-kaze, eble unuafoje en la historio, estis nek sukceso nek fiasko. La movado ĉesis kvankam ĝi ne estis sufokita. Ne okazis konkero de la politika povo fare de la revoluciuloj (ili eĉ ne prikonsideris la eblecon tion fari), nek estis necese detrui organizajn strukturojn de revolucia gvidado (tiuj malmultaj organizaĵoj kiuj enkadrigis gestudentojn dum tiuj tagoj formiĝis spontane laŭ la impulso de la mobilizado kaj krome ili gvidadis nenion).
La studado kaj interpretado de tiuj eventoj dumlonge perpleksigis la historiistojn kaj sociologiistojn, kaj ankoraŭ ne estas plena interakordo pri la signifo de tiu movado. Rezulte de ia peno kompreni tion, kio estis okazante, iu faris iun difinon kiu havis ioman sukceson, kiam li diris ke la amaso da gestudentoj ne konsciis pri tio kion ili deziris sed ili, jes ja, tre klare sciis kion ili rifuzis.
Tiu formulado de la situacio estis sufiĉe prava. Se ni devus precizigi kontraŭ kio mobiliziĝis la francaj gejunuloj ni dirus ke ili marŝadis kontraŭ la ideologiaj valoroj sur kiuj baziĝis la socio. Tiam ne sciis percepti tion la politikaj partioj de la klasika kaj tradicia maldekstrularo, inkludante la Francan Komunistan Partion. Eble eĉ ne la protagonistoj mem de la tumultoj sciis tiam konscie formuli tion.
Sed evidentis ke ili prenis inspiron el la teoria heredaĵo de maldekstrularo, el la majstroj de la marksismo kaj la anarkiismo. Ĉefe la verkoj de Marks, Mao kaj Markuso estis la fonto kaj la referenco de iliaj klopodoj –mallerte artikigitaj- de teoria poziciiĝo. Inter iliaj aspiroj, esprimitaj per sloganoj sur la muroj de la universitataj fakultatoj kaj la pri-kulturaj lokoj kiujn ili okupadis dum iliaj grandamasaj manifestacioj kaj koncentriĝoj, aperadis depostuloj de klara maldekstra inspiro: racia superado de la socio pri konsumo, mallongigo de la labor-tago (de la tiamaj 48 horoj semajne al 40), liberigo de la virinoj kaj egaleco je rajtoj inter ambaŭ seksoj, plibonigo de la instruado kaj superigo de la tre klasisma karaktero kiun tiam havis la Universitato, finigo de la usona milita interveno en Vjetnamio, forrifuzo de la aŭtoritatismo ĉiunivele, priseksa libereco kun rifuzo de la hipokrita moralo pri la kutimoj, plibonigo de la interrilatoj inter la Nordo kaj la Sudo, ktp.
Dum kelkaj semajnoj la ekzistanta politika povo, kiu ne estis antaŭvidinta ĉi-tiun eksplodon, ne sciis

reagi alie ol per polica subpremado. Post la aldoniĝo de pliaj sociaj tavoloj al la tumultoj kaj socia plendado, okazis du fenomenoj kiuj kontribuis sen-aktivigi la revolucian konvulsion. Unuflanke, atinginte la socia agitado la plej eble altan nivelon ne pasante al la fazo de la alsalto al la povo, ankaŭ ne la politikaj fortoj de la organizita maldekstrularo sciis provizi la movadon per iu politika solvo ene de la institucia kadro ekzistanta. Oni povas kompreni ke la instituciaj partioj de Maldekstro ne volis entrepreni la aventuron baziĝi sur strataj tumultoj por rompigo de la politika legaleco kun ne-antaŭvideblaj sekvoj. Sed ne tiel estas komprenebla tio ke tiuj fortoj ne kapablis politike artikigi la movadon alprenante ties justajn postulojn kaj profiti ĝian impulson por iniciati procezon de progresisma socia transformiĝo ene de la laŭleĝa kadro ekzistanta. Sen tiu perspektivo la revolucia agitado elverŝiĝis sur nenion kaj elĉerpiĝis sencele.

Aliflanke, la tagoj de socia plendado kaj batalado estis okazigintaj sufiĉe altan gradon je publika malordo kiun la politika povo, kiam ĝi kapablis reagi, povis propagande prezenti kiel ĥaoson kiu minacis ĉion detrui, atingante la regrupiĝadon de ĉiuj konservativaj sociaj fortoj kiuj rekonkeris la stratojn per grandamasa manifestacio sin prezentante kiel la reago de la silenteca plimulto de la lando kontraŭ la ĥaoso kaj la malordo. Antaŭe, la Generalo Prezidento De-Gaulle certigis al si la apogon de la armeo por alfronti ĉiun ajn eventualaĵon.

Kiel oni diris antaŭe, la franca movado efikis sur aliaj lokoj en la Tero. Se en iuj lokoj la burĝa povo sciis reagi tiel saĝe ol en Francio, en aliaj, male, ĝi ne povis restarigi la ordon sen la uzado de la perforto kaj okazigi masakrojn de revoluciaj gestudentoj, kiel okazis en Meksiko.

Se tiu estus la epilogo de la revolucia movado de la jaro 1968 oni devus klasifiki ĝin inter la multaj revolucioj kiuj fiaskis. Sed okazis ke la rezulto estis multe pli komplika kaj konfuziga. Plej eksterordinara estis la fakto ke sen alsalto al la povo kaj sen politika venko (la partioj de Maldekstraro suferis grandan fiaskon en la franca balotado post tiu jaro), la valoroj defenditaj de la revoluciuloj de majo de 1968 sin altrudis, nepercepteble sed nekontesteble, preskaŭ mondskale. Kiel asertis Danielo Kohn-Bendit, iu el la spontanaj lideroj aperintaj en tiu konjunkturo: ***tiu mobilizado generis la ekologiistan movadon, la feministan movadon kaj la kontraŭaŭtoritatisman sentiviĝon.*** La tuta morala hipokriteco pri la kutimoj kaj la vivmanieroj estis forbalaita fare de la kultura evoluado kaj de la mensaj skemoj naskiĝintaj el tiu revolucia impulso. Vole nevole, la superregantaj klasoj mem devis alpreni, por supervivadi kaj foreviti pluajn esplodiĝojn, multajn el la depostuloj de la revoluciuloj de la jaro 1968.

Sed ne ĉiujn. 40 jarojn post tiuj eventoj la homaro troviĝas en alia vojkruciĝo de la historio, el kiu povas rezulti aliaj sociaj konvulsioj. Nuntempe estas antaŭ ni malsama mondo kun malsama problemaro, sed daŭre estas necese serĉi, ĉiumaniere, alternativon al la kapitalismo. Hodiaŭ la mondo de la plenaĝuloj povas oferi nenion al la gejunuloj. Nuntempe estas nepre necesa iu revolucio por la rajto je laboro, por ekologia kaj ekonomia ordo mondskale, kontraŭ la rasismo kaj la ksenofobio, por la demokratio kaj la egaleco, por la homaj rajtoj…

Tamen pligrandiĝis la malakordo inter la politika kaj la civila socio. Por ampleksaj amasoj de la ekspluatitoj kaj marĝenitoj de la planedo ekzistas neniu perspektivo de alternativa socio. Urĝas pripensi kaj iniciati tiun alternativon. La senĉese kreskiĝanta fluso de enmigrantoj venantaj al la alte industriigitaj landoj el Afriko kaj aliaj mizeraj terzonoj estas signo kaj rezulto de la egaj ekonomiaj malekvilibroj mondskale. La ekonomia sistemo –kapitalista- kiu generis tiun problemaron, ne kapablas solvi tiun problemaron. Parizo, denove Parizo, montris per la akraj tumultoj fare de enmigrintoj, okazintaj antaŭ plurajn jarojn, kie troviĝas kaj amasiĝas la viktimoj de la ekonomiaj malekvilibroj kaj kiuj estos la protagonistoj de la estontaj mobilizoj. Ankaŭ estas signo de la malpreteco de nia socio solvi tiun problemaron la fakto ke estis elektita kiel nova Prezidento de Francio la homo kiu sufokis perforte tiujn justajn postulojn de la enmigrintoj de unua kaj dua generacioj. Ne estas hazardo ke tiu franca Prezidento, Sarkozi, esprimis sian volon kaj intencon mortigi la spiriton de majo-1968. Ĉu tiu kreteno konscias pri tio ke estas ĝuste dank´al tiu spirito de majo-1968 ke li, filo de hungaraj enmigrintoj, alvenis al tiu alta gvidposteno en la gastiga lando? Sen la venko de la valoroj de 1968 estus nepensebla tiu ebleco kaj la fakto ke en la nuna usona balotkampanjo konkuras –kun granda ebleco venki- unu virino kontraŭ unu nigrulo, kaj ke en tiu sama lando virino, krome nigrulino, estras la ministrejon pri fremdaj aferoj. Same estis neimagebla, sen la venko de la spirito de 1968, ke en la lastaj jardekoj la samseksemuloj atingis la rajtojn kiujn oni neis al ili dum jarmiloj kaj ili povas sen-honte montri publike sian seksan situacion. Kaj ĉiuj personoj ĝenerale ĝuas hodiaŭ je priseksa libereco kiun ne konis la antaŭaj generacioj.

Ke tiu spirito kaj tiuj valoroj daŭre kaj longe estu la instigilon de nia civilizacio por atingi pli altajn celojn de justeco kaj libereco.

# 1968: PRAGA PRINTEMPO KAJ TIES SUFOKADO



Sendube 1968 estis decida jaro. Krom la eventoj de la Pariza printempo estis ankaŭ la interesa politika procezo nomita «Praga Printempo». Ambaŭ procezoj, okazintaj en landoj lokitaj en kontraŭaj flankoj de la t.n. «Malvarma Milito», havis kiel komuna trajto la fakton ke ties ĉef-roluloj aŭ protagonistoj agadis pelitaj de emo al libereco.

Tiam la socio en Ĉeĥoslovakio estis politike kaj ekonomie gvidata de la Komunista Partio de tiu lando. Simila situacio ekzistis en la ceteraj ŝtatoj de la socialisma bloko subgvide la la granda Sovetunia potenco. Prezidento de Ĉeĥoslovakio kaj samtempe la unua sekretario de la Centra komitato de la K.P. tiam estis Antonín Novotnj, kiu pro sia stalinisma teniĝo metis kontraŭ si kaj la partia gvidantaro grandparton el la landa loĝantaro. Ankaŭ ene de la Kompartio mem ekaperis opono kontraŭ tiu gvidanto. En la lastaj monatoj de la jaro 1967 distingiĝis kiel kritikanto de Novotnj kaj ties politiko iu slovaka komunisto nomata Dubĉeko (Alexander Dubček).

En kunsido de la Centra Komitato de la Partio okazinta la 21an de decebro-1967, Novotnj demisiis el siaj partiaj respondecoj kaj postenoj. Kelkaj tagoj poste, jam komence de 1968, estis elektita Dubĉeko kiel unua sekretario de la K.P.

En monato marto Novotnj estis devigita demisii ankaŭ kiel Prezidento de la lando. Poste laŭ propono de Dubĉeko estis elektita por tiu posteno Ludvik Svobodo. Jam de tiam ekkomencis inter la ceteraj regantaroj de la sovetia bloko zorgo pri la politika evoluo de Ĉeĥoslovakio. La 23an de marto okazis en Dresdeno renkontiĝo de gvidantaj reprezentantoj de Bulgario, Hungario, GDR, Pollando kaj Sovetunio kun ĉeĥoslovaka delegitaro, en kiu oni faris akran kritikon pri "rampema kontraŭrevolucio" en Ĉeĥoslovakio.

Tamen la procezo sekvis. La ŝtata Asembleo decidis rehabiliton de civitanoj kiuj estis kondamnitaj de la antaŭaj aŭtoritatoj kaj oni ellaboris la dokumenton nomatan **Agadprogramo de KPĈ** kiu formulis la koncepton de **socialismo kun homa vizaĝo**. Ĝi enhavis ŝanĝojn, kiujn la K.Partio efektivigus, senĉese agante kiel gvidanta politika forto laŭ la konstitucio, en la politika sfero: civitanaj kaj politikaj rajtoj, en la ekonomia tereno: reformoj kadre de la socialismo, kaj en la kulturo kaj eksterlanda politiko. La tuto de la ŝanĝoj fakte konstituis demokratiigan procezon. Surbaze de tiu programo estis nomumita nova registaro estrita de Černík. Ĉio ĉi okazis jam en monato aprilo, meze de tiu printempo kiu donus nomon al la ŝanĝo-procezo. Menciindas ke plejparto el la landa loĝantaro apogis la procezon kaj simpatiis al la gvidantojn kiuj entreprenis la ŝanĝojn.

Male, la gvidantaro de la ceteraj komunistaj reĝimoj de la socialista bloko pli kaj pli malaprobadis la politikon de Prago. La 4a de majo, en Moskvo okazis ĉeĥoslovak-sovetia traktadoj sur la plej supera nivelo; ĉeĥoslovaka delegitaro aŭskultis de Breĵnev, Kosjgin kaj Podgornj tre akran kritikon de la politikaj disponoj en Ĉeĥoslovakio. Ili postulis energian agadon fronte al kontraŭsocialismaj kaj dekstrulaj fortoj, kiuj, laŭ ili, klare aktivadis. La akuzo ne estis tute malvera: inter la ĉekaj intelektuloj kiuj profitis la politikan malfermon por promocii dekstreman kaj burĝfavoran evoluadon troviĝis uloj kiaj Vacklav Havel kaj aliaj kies veran politikan vizaĝon oni povis vidi tridek jarojn poste, kiam definitive krizis la komunista reĝimo.

Du monatojn daŭris tiu cedo-malcedo inter la aŭtoritatoj de Prago kiuj plue profundigis en la demokratiiga procezo kaj la lideroj de la socialista bloko kiuj iompost-iom pasadis el la plendoj kaj admonoj al minacoj pri militista interveno de la trupoj de la Varsovia Kontrakto en Ĉeĥoslovakio.

La 15a de julio, reprezentantoj de Bulgario, Hungario, GDR, Polio kaj Sovetunio en kunveno en Varsovio aprobis koncepton de Breĵnev pri "limigita suvereneco", implicanta rajton interveni en la internajn aferojn de la socialistaj landoj por defendi la socialismon. Laŭ tiama enketo, la rifuzo de la aŭtoritatoj de Prago al tiu dokumento altiris la apogon de ne malpli ol 78 procento el la gecivitanoj de Ĉekoslovakio.

Fine, la 20a de aŭgusto komenciĝis la okupado de la lando per la armeoj de la kvin socialistaj landoj: Sovetunio, GDR, Pollando, Hungario kaj Bulgario. La Praga registaro aprobis ordonon por ke la armeo ne faru reziston kaj estis eldonita Proklamo al tuta ĉeĥoslovaka popolo, en kiu oni indikis, ke la soldataroj estas okupantaj Ĉeĥoslovakion kontraŭ volo de la konstituciaj organoj de la ŝtato. Sekvinttage estis okupitaj plimulto da urboj

en Ĉeĥoslovakio. La aŭtoritatoj de tiu ĉi lando sendis proteston al la registaroj de la kvin ŝtatoj, kiuj intervenis en la operacio. En la tuta lando kreskis amasa popola rezisto kontraŭ la invadintaj trupoj. Rezulte de tiu rezisto, kvankam ne perforta, estis 72 mortaj, 266 grave kaj 436 leĝere vunditaj ĉeĥoslovakaj civitanoj. Dubĉeko kaj aliaj regantoj estis fortrejnitaj en Sovetunion.

De la 23a ĝis la 26a de aŭgusto, Laŭ peto de Ludviko Svobodo, Prezidento de la Respubliko, okazis en Moskvo traktado de la ĉeĥoslovaka kaj la soveta politika reprezentantaro; la sekvantan tagon (la 24a de aŭgusto) partoprenis dum la interparoloj ankaŭ A. Dubček kaj ceteraj ĉeĥoslovakaj politikistoj arestataj ekde antaŭ pluraj tagoj. La traktadoj finis -sub ega sovetia premoper subskribo de la t.n. **Moskva Protokolo**, kiu enhavis devligajn taskojn por la gvidantaro de KPĈ (malpermeson de "kontraŭsocialismaj organizaĵoj" kaj socialan demokration, firmigon de organoj de Sekureco -tiama polico- kaj armeo, partian kontrolon de presaro kaj konkretajn partiajn ŝanĝojn) kaj promeso de laŭgrada foriro de la intervenaj soldataroj.

Dum la lasta semajno de aŭgusto konkretiĝis la politika cedo de Ĉeĥoslovakio al la sovetiaj postuloj. La popola rezisto kulminis per unuhora ĝenerala striko kaj la 31an tiumonate la centra Komitato de la KPĈ akceptis la **Moskvan Protokolon** kiel unusola elirpunkto el la donita situacio. Revenis al la lando la sekvestritaj politikistoj. Pro la okupacio kontraŭ Ĉeĥoslovakio kaj sekva politika cedo fare de tiulanda gvidantaro fakte finiĝis la procezo, konata kiel **Praga printempo**. Sekvis periodo, en kiu iompostiome plifirmiĝis politikistoj kiuj poste entreprenis la normaligon kadre de la socialisma bloko kontrolita de Moskvo kaj ene de ĉi ties politikaj skemoj.

Du faktoj rezultas tre evidentaj: unue, ke plejparto el la loĝantaro de Ĉeĥoslovakio estis preta apogi ĉiun ajn procezo je reformoj kiuj signifus la forlason de la ĝistiama sistemo de socialisma ekonomio ene de la sovetia bloko, kaj due, ke la regantoj de tiu sociekonomia bloko, konstatinte la perdon je popola apogo al sia sistemo, sin tenis je la defensivo, pretaj reagi eĉ per militista interveno kaj perforto.

Kiam oni alvenas al tia situacio estas facile antaŭvidi ke tiaspeca politika povo estas tre febla kaj ne kapablos persisti dumlonge. Ja, ĝuste tridej jarojn poste la situacio draste renversiĝis ne nur en Ĉeĥoslovakio sed en la tuta bloko inkluzive Sovetunio mem. Kaj ĉi-foje la ŝanĝoj ne limiĝis al kelkaj reformoj celante demokratiigon sed ampleksis la tutan politikan kaj ekonomian sistemon, forlasante la socialismon kaj restarigante la kapitalismon eĉ laŭ ties plej akraj aspektoj.

Nu, alveninte al tiu rezulto, la tasko de nura kronikisto pri la okazaĵoj de Prago-1968 kaj ties politikaj sekvoj povus fini per tio ĝis nun raportita pri la temo. Sed se oni rigardas la eventojn ne nur de vidpunkto de kronika raportado sed ankaŭ de historia studado, oni devas esplori la kialojn de la okazaĵoj por eltiri utilan instruon el ili. Krome, tiuj, kiuj interesiĝas pri pri la homa progresado laŭsence de la superado de la kapitalismo por konstrui novan, pli justan, sociekonomian ordon, devas sin demandi kial fiaskas porsocialisma reĝimo, aŭ io kio sin difinis tiele. Kaj ĉefe kaj lastinstance, prezentiĝas ankaŭ la demando ĉu la socialismo kaj la komunismo eblas aŭ, male, ĉiu provo tiudirekte estas kondamnita al fiasko.

Pri tiuj demandoj eblas, kaj fakte estas, diversaj respondoj. Personoj bone instalitaj en la nun superreganta sistemo dirus ke ne ekzistas alternativo al la kapitalismo kaj ke estas senutilaj ĉiuj penoj serĉi kaj starigi alitipan ekonomion. Kompreneble, la simpatiantoj de la porsocialismaj ŝanĝoj pritaksus tre negative tiujn procezojn, kiel la priskribita de Ĉeĥoslovakio kaj la refaliĝo en la kapitalismon de la iama sovetia bloko. Tamen, se ili ne ĝuste pritaksas ankaŭ la aferon de la demokratio kaj la esperon kaj aspiron de la amasoj al la demokratiaj liberecoj kaj ceteraj homaj rajtoj, ili restas kondamnitaj refali en samajn erarojn. Feliĉe, estas ankaŭ inter tiuj fortoj personoj kapablaj eltiri instruon el la historio por ne ripeti la erarojn. Ekzemple, tiurilate estas konata la teniĝo de la t.n. «eŭrokomunistoj». Laŭ ĉi-ties teoriistoj, la fiasko de la komunistaj reĝimoj de orienta Eŭropo okazis tial ke tiuj reĝimoj neglektis la civitanajn rajtojn de la popolanoj kaj entreprenis sian socialistan procezon ne atentante pri la necesa libereco de la personoj.

Estas justa la kritiko kiun tiu eŭrokomunista movado faris al la soveti-favoraj reĝimoj pri la manko de libereco kaj demokratio. Sed ŝajnas al mi ke en sia interpretado de la historio estas ia eraro: estas konfuzo inter kaŭzo kaj rezulto. Mi pensas ke tiuj reĝimoj ne fiaskis pro tio ke ili agadis diktatorece, sed male, ili komencis konduti diktatorece kiam la popoloj konstatis ke la socialista sistemo estis jam fiaskinta. Kiam okazis la kontraŭ-socialisma reago konita kiel "Praga Printempo" jam de antaŭlonge la socialisma reĝimo estis montrinta sian nekapablon plenumi la esperojn kaj aspirojn de la popolo pri progreso kaj komforta vivnivelo, ne nur en Ĉeĥoslovakio sed en la tuta socialista bloko kaj ankaŭ en Ĉinio.

Do, kiu estas la kaŭzo de tiu fiasko? Kial la komunistaj aŭtoritatoj perdis la konfidon de la amasoj, je kiu ili iam ĝuis? Ne estas malfacile kompreni ke bonveno de tiuj reĝimoj, fare de la popolo, respegulas la esperon kiun ili vekas pri novstila socio en kiu por ĉiam malaperos la ekspuatado kaj la maljusteco. Tiele difinita la celo kaj la plano de la revoluciuloj, ĝi nepre altiras la simpation kaj la apogon de la subpremitoj de la socio, t.e. plejparto el la loĝantaro. Sed post la konkero de la politika povo fare de tiuj progresistaj fortoj venas la provo en la praktiko, sur la reala tereno. Kaj la realo estas ke la popoloj ne fariĝas sanktaj nur pro tio ke ili konkeris la povon kaj atingis la kontrolon de la socio pere de kontraŭkapital-

istaj fortoj, kaj ankaŭ estas realo tio ke la riĉaĵoj kaj rimedoj de la lando ne tuj multobliĝas nur pro tio ke okazis la revolucia venko. Se dume ne estas ideologia edukado de la popolo konsciigante ĝin ke estas necesaj tempo kaj laboro por plifortigi la ekonomion kaj igi ke la pruduktig-aparato liveru abundon je vivrimedoj por ĉiuj, iompostiome venas elreviĝo, malkonfido kaj sen-espero de pli kaj pli granda nombro da gecivitanoj. Krom tio, estas ankaŭ la fakto ke la ekonomia egaleco kiu karakterigas de la porsocialismajn reĝimojn ne kon-gruas kun la laŭnaturaj homaj emoj.

Do, estas en la homa naturo mem io kio sin oponas al la frateco kaj egaleco inter la personoj. Ĉiu emas kaj pretas esti pli riĉa kaj pli potenca ol ceteraj homoj (se ne estus tiele, nia specio ne estus homa sed anĝela, kaj la anĝeloj ne bezonas la socialismon ĉar ili vivadas jam en la Ko-munismo). Ĉu tio estas solvebla pere de politika eduk-ado kaj priideologia kontrolo? En Ĉeĥoslovakio kaj ce-teraj landoj de Orienta Eŭropo, escepte Sovetunio, tiu kontrolo daŭris nur ekde la finiĝo de la Dua Mond-Milito. En Rusujo kaj ceteraj teritorioj iam konstituantaj Sovetunion, tiu kontrolo kaj ideologia edukado venis jam ekde la finiĝo de la Unua Mond-Milito, do proksim-ume 70 jaroj (pli ol du generacioj) kiam la komunismo disfalis en la jaro 1989. Tamen, laŭŝajne, la pensmanie-ro de la tieaj popoloj ne estis pli matura por la socialis-mo ol ĝi estis en la jaro 1917. Ĉu tio estas mirinde? Eble ne multe, ni prikonsideru tion ke 20 jarcentojn post la ekkristaniĝo de Suda kaj Okcidenta Eŭropo, la kristan-ismo de tiu socio estas kvazaŭ maldika farbo-tavolo, tio estas, nur supraĵa afero.

Do tio estas afero kiu dependas de la tempo de aplikado de edukado de la amasoj, kaj tiurilate la edukado por la socialismo troviĝas ankoraŭ en tre frua etapo de procezo kiu povos esti tre longa. Sed ĝi estas ankaŭ afero kiu dependas de la sistemo de edukado aplikata. Ĉu la pri-ideologia edukado de la amasoj en la socialista bloko de Orienta Eŭropo, kaj nun daŭre en Ĉinio, Vjetnamio, Ku-bo…, estas la plej konvena por krei en la koron de la ge-civitanoj solidarecon kaj amon al la justeco kaj egaleco? Ofte mi dubis prio tio vidante ke, ekzemple, la intereso kaj la pasio de la amasoj de tiuj landoj pri futbalo kaj aliaj konkur-luktoj estis tute simila al ties de la okci-dentlandaj amasoj. El saĝa homa kolektivo oni povas esperi pli saĝan teniĝon. Evidentiĝas ke ankaŭ ne la amasoj de tiuj landoj estis ideologie edukitaj por entre-preni seriozan kaj respondecan procezon kia la irado al la Socialismo kaj la Komunismo. Tiu necesa edukado devus kunporti ankaŭ konsciigon pri la neceso je sobra kaj modera konsumo. La amasoj de la socialista bloko montris avidon ĝui ian konsumnivelon tiom altan kiom tiu ekzistanta en la plej riĉaj landoj de la alte industri-igita mondo, kaj la ebleco etendigi tiun vivnivelon al la tutmonda loĝantaro preterpasas la kapablon kaj la dispo-non de la terglobaj rimedoj. Sed mi perceptas pluan mankon en la aplikita sistemo de amasedukado. Oni ne povas veki emon al solidareco kaj amon al la homaro kaj la justeco pere de ideologio kiu multe parolas nur pri klasbatalo, klaskonscio… t.e. uzante nur materiismajn konceptojn. La homo estas iom pli ol nura materio. Sur ateisma mondkonceptado oni ne povas konstrui homajn interrilatojn karaterigitaj per tiu amo kiu forrifuzas la maljustecon kaj la ekspluatadon inter la personoj kaj la popoloj. Kromanfoje okazis tio, kion la Biblio anoncas:

> **Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj,**
> **fariĝis ŝtono bazangula.**

Kristo, aplikante al si tiun profetaĵon, diris ke la homo kiu askultas lian mesaĝon kaj praktikadas ĝin, agadas tiel prudente kiel tiu, kiu konstruas sian domon sur roko por rezisti ĉiujn atmosferajn eventualaĵojn. Male, kiu neglektas la mesaĝon estas kiel malsaĝa homo konstru-inta ties domon sur sablo kaj kiam venas ŝtormoj kaj ventego la konstruaĵo ruiniĝas. Ne eblas ne memori ĉi profetaĵon kiam oni vidis la malsukceson de la Peres-trojko kiu signis la definitivan fiaskon kaj totalan ruinon de granda socialista bloko en kies ideologia bazo estis neglektata, kiam ne tute malpermesata, la instruado pri la religiaj valoroj.

La marksista suspektemo pri la religio kaj ties instruo havas historiajn kialojn. Multfoje en ĉiuj epokoj la reli-gio kaj ties pastraro estis uzataj por pravigi la ekzist-antan povon, eĉ la plej tiranecajn kaj ekspluatigajn povojn. Tion konsiderante, prave K.Marks diris tion ke la religio estis drogo por la popoloj. T.e. la postmorta feliĉo, kiun la religioj promesas, celas mildigi la pezan situacion de la subpremitoj de ciuj epokoj. La religio es-tas misuzata ankaŭ por aferoj kiel la subtenado de ne-demokratiaj regantoj kaj maljustaj ekonomiaj strukturoj. La konstruantoj de la Socialismo devas esti zorgemaj pri tiu afero ofte uzita de la klasa malamiko por ties ekspluataj celoj. Sed, tute forrifuzi la religion, kiel faris niaj Socialismo-konstruantoj de la lastaj jarcentoj, estas kvazaŭ forĵeti la bebon kune kun la malpura akvo.


Por la konstruado de la Socialismo estas necesaj la krist-anaj valoroj de hom-amo, kompato, sindonemo… Sen tiu angula ŝtono eblas konstrui nenion. Jes, la kapitalis-mo ne baziĝas precize sur tiuj valoroj, sed la kapitalis-mo ne bezonas ilin ĉar ĝi havas kiel aliancanoj la plej malbonajn ecojn de la homa naturo: egoismo, posed-emo, rabemo, ambicio, konkuremo… Tamen, kiam oni volas batali kontraŭ tiel potencaj inklinoj de la homa naturo estas nepre necesa la Dia helpo. Ĝuste tiel.

La batalado kiu devos pludaŭri por meti finon al la ka-pitalismo kaj la imperiismo devas eltiri historiajn ins-truojn el la pasinta sperto. Jen mi esprimis la prikonsi-derojn kiujn tiu sperto vekis ĉe mi.

Faustino Castaño Vallina.

Gijón-Asturio (Hispanio), printempo de 2008.

# Kuirante kun Pilar



## Gijona Torto

**Ingrediencoj**: 100 gramoj da migdaloj, 100 gramoj da aveloj, duon-litro da likva lakt-kremo, 200 gramoj da densigita lakto, 200 gramoj da sukero,
salo, du kovertetoj da kazea pulvoro.

**Ellaborado**: Oni devas mueli la migdalojn kaj la avelojn. Poste oni devas miksi la rezultitan pulvoron kun la ceteraj ingre-diencoj kaj kuiri la mason dum senĉese oni rulbatas ĝin. Ĉi-lastan operación oni povas fari ankaŭ per kuir-roboto Termomikso aŭ simila.

## Sardinoj laŭ mia maniero

**Ingrediencoj**: 6 grandaj sardinoj, muelitaj migdaloj, batita ovo, salo

**Ellaborado**: Oni purigu la sardinojn kaj demetu el ili la fiŝostojn. Tranĉu ilin tra ilia longeco apartigante ambaŭ lumbojn. Kovru la pecojn per la batita ovo. Kovru ilin poste per la pulvoro de la muelita migdaloj. Sekve, fritu la pecojn per varma oleo. Fine, metu ilin sur sorbo-kapabla papero.

# DON KIĤOTO, ĈIAMDAŬRA UNIVERSALA SIMBOLO



La hispana registaro decidis festi, antaŭ tri jarojn, la kvarcentjaran jubileon de la unua eldono de la Kiĥoto, la majstra verko de la hispana, kaj eble de la tutmonda, literaturo. Tiu jubilea celebrado estis omaĝo al la aŭtoro de tiu verko, Miguel-de-Cervantes. Mi pensas ke la hispanoj havas tiun ŝuldon, rekoni la valoron kaj enhavon de tiu mesaĝo sendita al la mondo de ĝia verkisto, bedaŭrinde ne ĉiam komprenita, eĉ ne de la fakuloj pri literaturo.
Don Kiĥoto estas la plej granda drama verko neniam antaŭe verkita, sed, kiel dirite, ne bone kom-prenita. Estas iuj  personoj, kiuj legas Don Kiĥoton por persona amuziĝo. Mi legis tiun verkon tri fojojn, unu en la kastilia lingvo kaj du en la Esperanta versio. Mi devas konfesi, ke je la unua fojo, mi serĉis avide tiujn rakontaĵojn, kiuj esplodigas la ridon, kaj mi multe amuziĝis. Sed kiam mi legis ĝin la duan kaj trian fojon, mia opinio tute ŝanĝiĝis. Mi konstatis ke tiu verko estas la dramo plej grava kaj interesa ĝis nun prezentita al la publiko. Kiam oni legas Don Kiĥoto-n, nepre oni devas ĝin legi trankvile, malrapide, kvazaŭ ĝi estus manĝaĵo bongusta per kiu nia palato donas al ni vivĝuon. Krome en Don Kiĥoto oni devas legi tion, kio ne estas skribita, ĉar la tuta verko estas kvazaŭ masko, kiu kaŝas la veron. Ofte Cervanto skribis la malon ol tio, kion li deziris rakonti. La verko, en tiu unika stilo estas ampleksa ekspono de la homaj travivaĵoj tiutempaj, multaj el ili bedaŭrinde aplikeblaj al nia nuntempa vivo-maniero.
Neniu devas ignori ke ĝi estis verkita en la obskura epoko de la fifama Inkvizicio, kiam la katolika eklezio starigis leĝojn kaj normojn, kies malobeo en multaj okazoj signifis torturadon, bruligadon, mortpunon. Kara amiko, legu sub ĉi tiu vidpunkto Don Kiĥoto-n kaj sendube vi havos aliajn kriteriojn pri la verko. Neniu el la epizodoj aŭ se vi preferas el la travivaĵoj restas for de la mizero de la ĉiutaga vivo. Jes, sed alitipe skribite! Cervanto inteligente mokis la tiutempan severan cenzuron. Li uzis elegantan stilon kaj esprimo-formon de rakontado tute nova ankoraŭ ne superita.
Li kaŝe kaj moke priskribis mondon de frenezuloj, kiuj deziras iri tra la mondo por restarigi justecon kaj pacon, kiuj sendube mankis tiutempe, sed, ĉu vi povas diri al mi, kio okazas hodiaŭ? Ĉu en nia tempo ne estas realaj tiuj eksponoj de Don Kiĥoto pri tiuj kiuj volas altrudi pacon kaj justecon pere de armiloj? Jes, Don Kiĥoto havis kiel forton sian brakon kaj sian lancon, hodiaŭ tiuj modernaj Don Kiĥotoj havas plej rafinitajn armilojn.
Don Kiĥoto reprezentis la sociordon, Don Kiĥoto estas la karikaturo, kiun inventis Cervanto pri socio freneza, aŭtoritata kiel estis Don Kiĥoto, militema ka avarema, ĉar ĉion li volis, eĉ se poste li estis preta al donacoj kaj eĉ mokema pri homoj, kiuj kritikas lin. Don Kiĥoto estas la spegulo de la vivsistemo tiutempa, ĉiam katenita al la ideoj kaj pensoj de absurda religia sistemo, kiu ne hezitis puni tiun, kiu dezirus, intencus eliri de sia orbito. Mi povas prezenti ĉi tie centojn da ekzemploj troveblaj en la verko, sed ne estas mia intenco klarigi tion, kion jam estas skribita, estas vi kara samideano, kiu devas kompreni la lingvaĵon kaj stilon de Cervanto, unikaj en la mondo kaj kiun li ŝprucigis pere de la komika figuro de Don Kiĥoto... Ne forgesu aldoni la altrangajn kavalirojn pretajn konkeradi kion ajn.
Don Kiĥoto oni povas diri ke li reprezentas la altrangulojn de la socio, ĉiam kapricemaj kaj pretaj fari siajn frenezaĵojn. Vi jam povas konstati, ke Don Kiĥoto ne volas eliri al la mondo sen servisto, ŝildisto. Tasko, kiu post multaj interkonsentoj estis akceptata de la vilaĝano Sancho Panza. Tie Cervanto bone rimarkigas la sociajn klasojn ekzistantajn tiutempe. Sancho nur serĉis vivrimedojn por subteni sian familion. Jen la konstanta dramo de tiu kaj nia nuna socia sistemo. La dramon manĝi ĉiutage tre bone klarigas tie Cervanto.

Sed ankaŭ Sancho komprenis ke li devas viví harmonie kan sia sinjoro kaj la eklezio. La figuro kaj rolo de Sancho Panza estas la kerno de la verko.
Ridi pri la diraĵoj de Sancho estas kvazaŭ priridi la popolon. Sancho reprezentis la popolon, kun ĝia saĝeco kaj mizero sed kun honesta koro. Ĉiuj ruzaĵoj faritaj de Sancho estis kaj estas ankaŭ unu el la multaj rimedoj, kiujn devas uzi la popolon por vivi ĉiutage, Estas terura la dramo de Sancho Panza, je unu flanko estas la mastro Don Kiĥoto, kun siaj frenezaĵoj kaj kapricoj, je la alia sia edzino kaj la hejmo, la filino, kaj eĉ la azeno. Estas momentoj en la travivaĵoj de Sancho plenaj je emocio, kiuj al sentema homo portas preskaŭ al plorado.



La dialogoj inter Don Kiĥoto kaj Sancho enhavas literaturan riĉecon neniam antaü atingita. Don Kiĥoto reprezentis la forton kaj la avarajn dezirojn ĉion atingi, starigi leĝojn. La tiutempaj vilaĝaj altranguloj, la barbiro kaj aliaj vilaĝanoj pretas haltigi Don Kiĥoton, kiu sin sentis kiel forton de la racio, racio kiun la aventuristoj tiutempaj ne volis rezigni kaj kiun vi povas apliki al niaj modernaj tempoj. Kiam el la buŝo de Sancho komencas eliri konsiloj, diraĵoj por forigi la frenezon de sia mastro, kun la replikoj kaj fizofiaj eksponoj de Don Kiĥoto estas kiam oni ĝuas la veran mesaĝon de la verko. Ĉiuj konversacioj inter Don Kiĥoto kun sia ŝildisto celas ordigi la mondon, kiun ruze scias prezenti Cervantes pere de tiuj du komikaj homaj figuroj. Kiom da saĝeco en la refrenoj de Sancho, mi bezonis tre ofte reiri malantaŭen, relegi paragrafojn de tiuj konversacioj, ĉar mia kompreno-kapablo ne povis digesti ĉion tuj, rapide.
Kiel supre dirite, mi legis tiun verkon tri fojojn kaj mi ciam trovis en ĝi ion novan: konsiloj de Sancho al sia mastro aŭ opinioj pri moraleco de Don Kihoto enhavas la saĝecon de la popolo kaj la rezonadon de kulta homo, kiu estis Don Kiĥoto. Ĉiu epizodo, ĉiu konversacio, ĉiu diskutado kaj eĉ la filozofado inter la du plej gravaj rolantoj de la verko, estas klara kaj ne diskutebla situacio en kiu troviĝis tiutempe la socio. Kiam aperas antaŭ vi tiuj paĝoj en kiuj ne estas apartaj punktoj, estas kiam oni devas legi malrapide kaj se necese, kiel mi jam diris, reiri malantaŭen. En tiu eleganta prozo estas la tuta valoro de la verko de Cervanto. Don Kiĥoto ne estas rakonto pri kiu ajn travivajo. Don Kiĥoto estas la pura filozofio aplikata al la ĉiu-taga vivo.
Don Kiĥoto estas la dramo de la homaro kun siaj mizeraj deziroj kaj kun sia maljusta funkciado. Ĉu vi pensas, ke Cervanto povis plenlibere klarigi la vivkondiĉojn de sia socio? Absolute ne. Li devis uzi ruzecon kaj lerti maski la veron. La cetero estas nia afero, estas la tasko de la leganto. Sed nia socio, laŭ miaj konversacioj kun multaj personoj ankoraŭ ne sciis trovi la valoron de la verko. Eĉ iuj diras, ke estas tro da literoj por ĝin legi. Al tio mi povas aldoni, ke se vi ankoraŭ ne legis Don Kiĥoto-n, estas kavzaŭ vi vivus en plena analfabeteco.

LUIS SERRANO PÉREZ



# Servi al Dio kaj al la riĉeco



Verkis: ***Antonio Zugasti***

"**Vi ne povas servi al Dio kaj al la riĉeco**". Ĉi tiu aserto de Jesuo ne estas fal-stelo kiu pasas tra la firmamento dummomente kaj malaperas. Ĝi estas unu el la centraj, permanentaj aksoj, de la Evangelio. En ĝiaj paĝoj foje kaj refoje aperas la nekongruecon de Dio kaj la riĉeco: "**Ve al vi la riĉuloj**"; "**Pli facilas ke kamelo pasu tra okulo de kuirilo...**" Paŭlo donas eksplikon: "Ĉar la radiko de ĉiuj malbonoj estas la emo pri mono"

Kontraŭ Dio Jesuo ne metas la ateismon kiu tiam, ja, estis apenaŭ konata, sed ankaŭ ne metas la orientajn diaĵojn, tiel disvastigitaj en la regiono, nek la oficialajn diojn de la imperio, kaj tio kion oni ŝuldas al la Cezaro ne estas kontraŭdira kun tio kion oni ŝuldas al Dio. Li ankaŭ ne metas kontraŭ Dio la hedonismo aŭ la diboĉado, kiuj ne estas teniĝoj tolereblaj por disĉiplo de Jesuo, sed tamen ne estas tio kion la Majstro metas kontraŭ Dio. Kontraŭas Dion tre konkreta idolo: la riĉeco.

Se por Jesuo tiel gravas la idolo de la riĉeco estas pro tio ke ĝi vere gravas. Sufiĉas konstati kiom multe estas al ni malfacile ĉesi adori ĝin. Estis enorme granda la invent-kapablo kaj talento kiu, ene de la Eklezio mem, manifestiĝis laŭlonge de la historio, por mildigi tiun sentencon de Jesuo kaj akordigi ambaŭ diojn. Iuj tiom multe estis radikalaj ke ili renversigis la Evangelion, kaj eĉ alvenis, kiel la kalvinanoj, al tio ke ili konsideras la riĉaĵon kiel Dia beno kaj signo de antaŭelekto.

En la katolikismo oni ne alvenis al tia ekstremo, almenaŭ en la teorio. En la praktiko estas alia afero. Persistis la kulto al la riĉeco, sed, por ke la kontraŭdiro ne tiom estu skandala, estis necese dece vesti la idolon, surmeti al ĝi ian maskon kiu kaŝu ĝian kruelan vizaĝon. Episkopoj, teologiistoj, moralistoj, eminentaj kristanoj, ĉiuj konkuris ellabori la plej allogajn maskojn.

Inter la plej sukcesaj maskoj troviĝas, kia ironio, tiu de **"Dia volo"**. Pretendante ekzalti la rolon de Dio en la homa vivo, oni asertadis ke la fakto esti riĉa aŭ malriĉa estis Dia volo. Li volis ke iuj naskiĝu malriĉaj kaj aliaj riĉaj. Fariĝu Lia volo!

Tiu estis masko sufiĉe bone akceptita en la tradicia socio. La ĉefa riĉaĵo estis la tero, ĉi-tiu estis normale posedata laŭ heredo. Ĝi pasadis el la gepatroj al la gefiloj kiel afero tute normala. En tiu kultura medio oni akceptadis sufiĉe bone la ideon ke oni ricevis la havaĵojn el la mano de Dio. Ĉiam Dio kun la sankta familio! Krome tiu estis ideo kiu tre konvenis al la posedantoj de la teroj. Kaj prefere ne pensi kiamaniere atingis la terojn la unua proprietulo. Kiu, ĝenerale, atingis ilin kiel profito de konkeroj kaj rabadoj. Kompreneble, oni povis diri ĉiam ke Dio helpis lin en la batalo Benata estu Lia volo!

Estis tre estimata ankaŭ la masko de la "**spirita malriĉeco", t.e.** "ne emi la havaĵojn". Ĉiam rezultis sufiĉe facile sin protekti en tiu rifuĝejo, ĉar moralistoj kaj konfesprenantoj neniam estis tro striktaj petante pruvojn pri tio ne emi la havaĵojn. Krome la spirita malriĉeco estas tre prestiĝa pro sia nedudebla evangelia origino. Sed neniam oni klarigis kiamaniere oni povas konservi kaj eĉ pligrandigi la havaĵon ne sentante emon al ĝi.

Iu provo montri ke oni vere malavaras estis la donacoj kaj legacoj al la Eklezio. Ankaŭ ne estas klare ke per tio oni atestas pri manko je riĉemo, ĉefe konsiderante ke multaj donacoj estis faritaj je la horo de la morto. Sed tiu maniero manifesti la riĉuloj sian malavaron ŝajnis tre bona al la hierarkoj de la Eklezio. Kaj tiamaniere tiu, kiu rezultis tre riĉa estis, kompreneble, la Eklezio. Sed, jes ja, ĉiam konservante la "spiritan malriĉecon".

Per tio prezentiĝas alia masko sub kiu sin kaŝis la idolo de la riĉeco, kaj kiu estis, ĝuste, tiu de la "**kulto al Dio".** La honoro de Dio, la majesto de Dio meritas tion plej bonan, ni devas montri nian adoradon al Dio laŭ maniero kiel eble plej grandioza.

Kompreneble, la Dia honoro postulis plenigi je splendoro pompo kaj riĉaĵoj Liajn ministrojn kaj reprezentantojn. Kaj ĉi-tiuj, por gardi la kulton al Dio Patro de Jesuo de Nazareto, fine ili marŝas man-en-mane kun la alia dio, la malamika idolo.

Kune kun la spirita malriĉeco marŝis la "**jura malriĉeco".** La rolo de la malriĉeco en la Evangelio estis tro evidenta por ke oni povu deflankigi. Por la gekristanoj kiuj volis sekvi laŭ pli radikala maniero la paŝoj de la Majstro, la mal-

riĉeco estis esenca elemento. Oni ne povis ignori ĝin. Sed ankaŭ ĉi tie oni devis mildigi la perturban aserton de Jesús: aŭ Dio aŭ la riĉeco. La masko uzita ĉi-kaze estis la “jura malriĉeco”. La gereligiuloj ne povis persone posedi ion, sed la religia ordeno ja povis akumuli riĉaĵojn senmezure, kaj la membroj de la ordeno povis uzi kaj ĝui ilin kun trankvila konscienco. Tiu ĉi masko estis speciale noca, ĉar ĝi efikis sur la grupoj kiuj intencis plej fidelece sekvi la evangelian spiriton. Krome, levante la malriĉecon al la nivelo de tiuj kiuj celis ian “perfektan staton”, oni apartigis ĝin el la simplaj kaj normalaj kristanoj. Por ĉi tiuj oni taksis normale la ĝeneralan aspiron al la riĉeco. Por ĉi tiuj konduti bone sufiĉis ian malavaron en la almozo al la malriĉuloj... kaj helpante la Sanktan Patrinan Eklezion.



Kaj tiele pasadis la jarcentoj. Sub siaj maskoj la idolo de la riĉeco, pluvivis, eĉ progresis, plifortiĝis, venkante rezistojn, tordante la vortojn de Jesuo, enfiltriĝante ĝis la fundamenton de la vatikana maso, firmiĝante en el spirito de tiuj kiuj nomiĝas kristanoj. Ĝi eĉ sin sentis sufiĉe forta por forpeli la malnovajn maskojn kaj senvuale postuli la tronon de la mondo.



“Dia volo”, sed ĝi vestiĝas per brila tuniko kiun siaj nunaj adorantoj konfekciis por ĝi, iu scienco kiun ili inventis por si mem: la ekonomio, iu supozita scienco konstruita laŭ siaj deziroj kaj siaj interesoj. Ia kompleksa strukturo de leĝoj kaj principoj, subtenita de matematikoj, statistikoj... kaj multe da mono por aĉeti cerbojn. Ia impona teoria korpo kiun siaj grandaj guruoj kaj kaj sia legio da sekvantoj intencas katalogi kiel natura scienco. Ili pretendas ke ĝi naskiĝas el la tuŝebla kaj eksperimentebla realo de la mondo, kiam siaj radikoj estas nur la malnova ambicio kaj emo al mono, la kulto al la potenca idolo.

Tiuj, kiuj sin proklamas oficialaj reprezentantoj de Jesuo de Nazareto ne kapablas rompi kun sia malnova amiko. La idolo jam ne plu devas sin kaŝi. Klaresprime ĝi proklamas siajn principojn kaj siajn valorojn: *ekonomia disvolviĝo, pliriĉiĝu, profito, rentumeco, ambicio, riĉeco! riĉeco! Konkuru unuj kontraŭ la aliaj por atingi ĝin, konkuru, pliriĉiĝu, akumulu kapitalon. Jen la sola moralo: egoismo, ambicio, batalo por riĉeco, jen la bono kaj la virto, subpremadi ĉiun kaj ĉion necesan, ne zorgu, la nevidebla mano de la merkato solvas ĉion, vi ambiciu, konsentu la avarecon, spite al ĉio. Pliriĉiĝu, pliriĉiĝu, ambiciu pli kaj pli, ekspluatu la homojn, elĉerpu la Terajn riĉaĵojn, vivadu lukse kaj riĉabunde, inventu plezurojn, disipu, tiu estas via paradizo. Kaj mi estas via vera Dio.*

Kion ni faras, Sinjoro? Kion ni faras? Kie estas hodiaŭ viaj vortoj: **Ne eblas servi al Dio kaj al la riĉeco**?

Kie ili estas, Sinjoro, kie ili estas? Kiu proklamas ilin? **Ne eblas servi al Dio kaj al la riĉeco**.

Kiun Evangelion ni anoncas, se ni ne proklamas tion? **Ne eblas servi al Dio kaj al la riĉeco**.

Kian lumon ni estos se ni ne krias ke la kapitalismo estas la malnova idolo de la riĉeco?

Ĉu ni estos la salo de la tero se ni timas kontraŭi la regnon de la riĉeco? **Ne eblas servi al Dio kaj al la riĉeco**.

Kie ili estas, Sinjoro, kie estas tiuj vortoj viaj? Kie ni kaŝis ilin? Demandas al ni la dronintoj en la Atlantikaj akvoj.

Kie ni kaŝis ilin? Demandas al ni tiu infano preta esti vorita de vulturo.

Kial ni silentas? Demandas al ni la kongolaj virinoj murditaj per la armiloj kiujn ni fabrikas kaj vendas.

Kion vi faris el tiuj vortoj de Jesuo? **Ne eblas servi al Dio kaj al la riĉeco**.

Kie ili estas, Sinjoro, kie ili estas? Demandas al ni la palestinaj geinfanoj. naskiĝintaj en la milito kaj por la milito. Kiel povas la kristanaj landoj esti la plej kapitalismaj landoj?

Kion ni faras, Sinjoro, kion ni faras?



## Koncize pri la

# 67a Hispana Kongreso de Esperanto

La Hispana Kongreso de Esperanto de la nuna jaro okazis en la urbo Kŭenko (Cuenca) de la 3a ĝis la 6a de julio kun 85 aliĝintoj. La kongresa temo estis: ***Lingvoj, trezoro de la homaro, ilo por dialogo***. La Kongreso estis tute malfermita al la neesperantista publiko en la spirito de la **Internacia Jaro de la Lingvoj**, kiun la Unuiĝintaj Nacioj proklamis por 2008.

Kiel kutime okazas en niaj landaj kongresoj kaj ĉiuj esperantistaj renkontiĝoj ĝenerale, estis en tiu Kongreso en Kuenko, inter aliaj kulturaj programeroj, iuj prelegoj: **- Esperanto kiel literatura lingvo,** *Antonio Valén kaj Miguel Fernández*. **- La akvo kiel fonto de konfliktoj**, *Rafaela Urueña*. **- 100 jaroj de la Zaragoza E-grupo FRATECO**, *Lorenzo Noguero*. **- Nuna situacio kaj kreskiĝo de Ĉinio**, *Augusto Casquero*. **- Cigana Romancaro**, *Miguel Fernández.*

Pri la historio de la hispana Esperanto-movado prelegis Lorenzo Noguero kaj Toño del Barrio. Krom tio menciindas ke Jorge Camacho gvidis interesan atelieron pri verkado de poezio kaj ke Pedro Hernández gvidis kurson de Esperanto kiu estis malfermita al la ĝenerala publiko. Dum la daŭro de la Kongreso estis ekspozicio de materialo, prizorgita de Pedro Sanz, rilata al Esperanto kaj ties cultura valoro. Miguel Gutiérrez Adúriz prezentis novan libron el la kolekto **Sferoj** kiun li kompiladas, kaj Jorge Camacho prezentis siajn poemarojn "Celakantoj" kaj "Saturno", kiuj aperis ĉi-jare.

En la jara Ĝenerala Asembleo de la **Hispana Esperanto-Federacio** okzinta kadre de la Kongreso, la HEF-estraranoj Miguel Ángel Sancho Izquierdo, Ana Manero kaj Toño del Barrio prezentis informaj projektoj de tiu landa Federacio de Esperanto. En la sama sesio estis elektita la nova estraro de tiu institucio por la periodo inter la jaroj 2008-2012, kiu restas jene:

*Prezidanto*: **Arturo Jiménez.** *Vic-prezidanto*: **Pedro Hernández Úbeda.** *Sekretario*: **Félix Jiménez Lobo.** *Voĉdonantoj*- **Boletín: Angel Arquillos, Miguel Hernández** *kaj* **Juan Trenado**



## Koncize pri la

# 93a Universala Kongreso de Esperanto



ROTERDAMO 19a-26a de Julio 2008

La nederlanda urbo Roterdamo estas sufiĉe ligata al Esperanto. Multaj E-kongresoj okazis en ĝi, kaj ĝi sidejas la Centran Oficejon de **Universala Esperanto Asocio,** kiu **nun, en 2008,** festas ĝian Centjaron per la 93a Universala Kongreso de Esperanto, dum la tagoj 19a al 26a de Julio.

En la solena inaŭguro de la kongreso partoprenis preskaŭ 1800 personoj (1845 aliĝintoj) el 73 landoj, inter ili Lois Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de la kreinto de la Internacia Lingvo. Inter la salut-mesaĝoj ricevitaj de la kongreso estis tiu de Koichiro Matsura, ĝenerala direktoro de **UNESKO**.

Kiel kutime okazas en la Universalaj Kongresoj de Esperanto, ankaŭ ĉi-tiu estis marko de asembleoj kaj kunsidoj de multaj el la diversaj esperantistaj rondoj kaj organizaĵoj kiuj konstituas la E-movadon: ILEI, IKEF, Vikipedio, COC, TEVA, IFEF, KAEM, UMEA, E-kat-amikaro, Infan-kongreseto, ISAE, MEL, TEJO, LIBE, IDE, IKUE, KELI, INA, EVA, ALE, EDE… Inter tiuj kunsidoj estas speciale menciinda la inform-kunveno pri DV (**Dua Vivo**). Temas pri interreta virtualejo, virtuala mondo… iu ludo kiu estas pli ol nura ludo. Uzantoj, post kontrakti konton kiu ebligas al ili "vivi" en tiu mondo, kreas figuraĵon kun elektita aspekto kaj pere de ĝi povas pasi kaj disvolviĝi en tiu virtuala realaĵo kaj interrilati tie kun la figuraĵoj de aliaj uzantoj, kaj kun ili interparoli, konferenci, partopreni en kursoj… La esperantistaj uzantoj de Dua Vivo uzas ĝin por korespondi, konversacii, interŝanĝi spertojn, kaj prpagandi favore al la Internacia Lingvo.

Krom tiuj kunvenoj kaj la prikulturaj amuzaĵoj, koncertoj k.s., kutimaj en ĉiu kongreso, estis krome interesaj prelegoj, ne nur pri esperantista kaj lingva temaro sed ankaŭ pri tre diversaj aferoj. Kaj funkciis, same ol en antaŭaj UE-kongresoj, la **Internacia Kongresa Universitato**.

La kongresa rezolucio, aprobita je la fino de la Kongreso, aludas la daŭran diskriminacion kontraŭ lingvoj je ĉiuj niveloj kaj aparte kontraŭ la lingvoj de indiĝenaj popoloj kaj malplimultoj. Emfazante la neceson doni egalan respekton al ĉiu lingvo, al ĉiu kulturo kaj al ĉiu homo en la mondo, la dokumento, nome de la Kongreso, invitas al respektado de la lingvaj kaj ceteraj homaj rajtoj, instigas ĉiujn agnoski la esencan valoron de la lingva diverseco, lige kun la kreskanta agnosko pri biologia diverseco, kaj proponas science esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj justa komunikado en la mondo.



# Ni iomete ridu pri ni mem

